

ISBN 9781595695154

ISSN 1311-3496

Esperantologio / Esperanto Studies

Nova Serio 6 (14)

New Series 6 (14)

**ESPERANTOLOGIO /
ESPERANTO STUDIES**

Nova Serio 6 (14)

New Series 6 (14)

Esperantologio / Esperanto Studies (EES)

estas interfaka revuo kiu publikigas esplorojn pri ĉiuj fenomenoj rilataj al Esperanto kaj Interlingvistiko. Kreita en 1949, EES eldoniĝas sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ekde 2019. EES aperigas kontribuojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto.

EES publikigas fakajn artikolojn, esplorajn notojn kaj libro-recenzojn en Esperanto kaj en la angla lingvo, sed estas principe malferma al kontribuoj ankaŭ en aliaj lingvoj – tiusence, ĝi aparte kuraĝigas la recenzadon de alilingvaj libroj.

EES celas stimuli novajn alirojn al Esperantologio kaj subteni fakan interŝanĝon kaj kunlaboron, instigante esploristojn plifortigi siajn kontribuojn kaj eventuale ankaŭ aperigi ilin en nacilingvaj fakaj revuoj post ricevo de komentoj de aliaj esperantologoj.

La revuo aperas presite kaj rete. La reta versio estas libere disponebla ĉe la retejo de CED (<https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/>). Presitaj versioj de la numeroj 3-8 estas haveblaj ĉe la eldonejo Kava-Pech (<https://www.kava-pech.cz/#/>), kaj la plej lastatempaj numeroj ĉe Mondial (<https://www.esperantoliteraturo.com/>).

Manuskriptojn kaj demandojn oni sendu al la du redaktoroj, Christopher Gledhill (christopher.gledhill@u-paris.fr) kaj Klaus Schubert (klaus.schubert@uni-hildesheim.de).

Manuskriptoj sekvu la gvidliniojn disponeblajn ĉe <https://interlingvistiko.net/kontribuantoj-ees>

Esperantologio / Esperanto Studies (EES)

is an interdisciplinary journal that showcases research on all phenomena related to Esperanto and Interlinguistics. Created in 1949, EES has been edited under the auspices of the Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED) since 2019. EES publishes contributions based on original studies about linguistic, historical, literary, psychological, sociological and political aspects of Esperanto.

EES publishes scholarly articles, research notes and book reviews in Esperanto and English, but is generally open to contributions in other languages as well – in this regard, it especially encourages reviews of books in other languages.

EES aims to encourage novel approaches to Esperanto Studies and to support scholarly exchange and collaboration, stimulating researchers to strengthen their contributions and perhaps go on to publish them in journals in national languages after receiving the comments of fellow Esperantologists, reviewers and readers.

The journal appears in print and online. The online version is available open access on the CED website (<https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/>). Printed versions of issues 3-8 can be ordered from the publishing house Kava-Pech (<https://www.kava-pech.cz/#/>), and the most recent issues, from Mondial (<https://www.esperantoliteraturo.com/>).

Manuscripts and questions should be forwarded to the two editors, Christopher Gledhill (christopher.gledhill@u-paris.fr) and Klaus Schubert (klaus.schubert@uni-hildesheim.de).

Manuscripts must follow the guidelines available at <https://interlingvistiko.net/kontribuantoj-ees>

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES

Nova Serio 6 (14)
New Series 6 (14)

**Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj,
kunlabore kun Mondial /**

**Centre for Research and Documentation on World Language Problems
in collaboration with Mondial**

Roterdamo, Nederlando / Novjorko, Usono
Rotterdam, Netherlands / New York, USA

2025

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES

Redaktoroj / Editors

Christopher Gledhill (Université Paris-Cité, Francio / France)
Klaus Schubert (Universität Hildesheim, Germanio / Germany)

Redakta Komitato / Editorial Board

Probal Dasgupta (Indian Statistical Institute Kolkata, Barato / India)
Guilherme Fians (University of Manchester, Anglio / England)
Sabine Fiedler (Universität Leipzig, Germanio / Germany)
Gotoo Hitosi (Tohoku University Tokyo, Japanio / Japan)
Ilona Koutny (Uniwersytet im. Adama Mickiewicza, Pollando / Poland)
Sergej Kuznetsov (Moskovskij Gosudarstvennyj Universitet, Rusio / Russia)
Haitao Liu (Fudan University, Ĉinio / China)
Kaori Nagai (University of Kent, Anglio / England)
Marc van Oostendorp (Radboud Universiteit, Nederlando / Netherlands)
Humphrey Tonkin (University of Hartford, Usono / USA)

Redakta Konsilanto / Editorial Advisor

Christer Kiselman (Uppsala Universitet, Svedio / Sweden)

**Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj /
Centre for Research and Documentation on World Language Problems**

<http://interlingvistiko.net>

Nova Serio 6 (14) / New Series 6 (14)

© 2025 Universala Esperanto-Asocio kaj la aŭtoroj

ISBN 9781595695154

ISSN 1311-3496

Eldonisto: Mondial, Novjorko / Publisher: Mondial, New York
mondialbooks.com / esperantoliteraturo.com

ESPERANTOLOGIO / ESPERANTO STUDIES

Nova Serio 6 (14)

New Series 6 (14)

Enhavo / Contents

<i>Christopher Gledhill kaj Klaus Schubert: Antaŭparolo. Multifaceta Esperantologio</i>	6
<i>Mark Fettes: Renato Corsetti (1941–2025), Nekrologo</i>	9
<i>Renato Corsetti: Esperantistoj fronte al afrikaj lingvoj</i>	14
<i>Iлона Koutny: La rolo de István Szerdahelyi en interlingvistiko kaj esperantologio</i>	28
<i>Martine Mussies: Fanfiction in Esperanto – Esperanto in Fanfiction</i>	45
<i>GONG Xiaofeng: Apliko de Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperantigita ĉina klasika romano <i>Ruĝdoma Sonĝo</i></i>	71
<i>Philippe Planchon: Evoluo de la afiksoj kaj de ilia memstara uzo en Esperanto</i>	91
<i>Bernd Krause: Inter arma lingvo kaj lingvo de paco. Observoj pri la uzado de Volapuko kaj Esperanto en la Duobla Monarkio de Aŭstrio-Hungario</i>	106
<i>Kristin Tytgat: La Internacia Asocio de Policistoj kaj Esperanto. Notico</i>	127
<i>Ulrich Lins: Recenzo de la libro Rapley, Ian. 2024. <i>Green star Japan: Esperanto and the international language question</i></i>	133
<i>Dan Savatovsky: Compte-rendu du livre Sarikaya, Mira. 2023. <i>Die bestmögliche aller Sprachen</i></i>	136
Esperantologio / La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)	142
Esperantologio / The Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED)	143

Antaŭparolo Multfaceta Esperantologio

La antropologo David Graeber kaj la arkeologo David Wengrow distingas tri fundamentajn tipojn de libereco:

[...] 1) the freedom to move away or relocate from one's surroundings, 2) the freedom to ignore or disobey commands issued by others, 3), the freedom to shape entirely new social realities, or shift back and forth between different ones.

(Graeber kaj Wengrow 2021, 503)¹

‘(1) la libereco formoviĝi aŭ translokiĝi de sia ĉirkaŭaĵo, (2) la libereco ignori aŭ malobei ordonojn donitajn de aliaj, (3) la libereco imagi tute novajn sociajn realaĵojn, aŭ migri tien kaj reen inter malsamaj.’

(nia traduko)

Al tiu triopo respondas – sed ofte ankaŭ kontraŭas – tri formoj de primitiva povostrukturo: suvereneco (konfirmata de fizika forto), burokratismo (legitimata per esoteraj scioj), kaj karisma politiko (dependanta de interpersona konkurado).

Laŭ Graeber kaj Wengrow, modernaj socioj karakterizeblas per amal-gamo de tiuj povotipoj; sed tio ne estis (nek estos) la nepra rezulto de nia historio. Skizante panoramon pri la socia organizado de prahistoriaj popoloj, la aŭtoroj montras, ke indiĝenaj gentoj ree konceptis originalajn politikajn sistemojn, ofte malakceptante la kutimojn de siaj najbaroj per procezo, kiun la aŭtoroj amuze nomas “skismo-genezo”.

La aŭtoroj aldonas, ke la retoriko de Okcidentanoj pri libereco kaj demokratio ne originis el debatoj inter Eŭropanoj, sed pere de kritika dialogo kun indiĝenaj gravuloj (precipe Kondiaronk, estro de la nord-amerika gento nomanta sin Wendat, kaj diplomato dum la jaroj 1680–1690). Laŭ la aŭtoroj, tiuj kritikoj spronis la antaŭulojn de Klerismo scivoli, kial modernaj socioj perdis la kvalitojn de fleksebleco kaj politika kreemo, kiuj ŝajne pli oftis en la pasinteco.

Kia konkludo por la Esperanta movado, kaj por Esperantologio pli precize? Unu leciono estas, ke eblecoj por socia emancipiĝo troviĝas en pli preciza kompreno de homa historio, surbaze de sciencaj pruvoj kaj debatoj. Tiel do povas roli movado kiel Esperantismo, kies imanenta modelo pri

1 Verko disponebla en la angla kaj pluraj aliaj lingvoj, inkluzive en la ĉina, franca, germana, hispana, itala, japana, rusa.

politika organizo implicas toleremon al sociaj alternativoj kaj malakcepton al provoj fiksi socian evoluon en ununuran trajektorion (Tonkin 2022). Kaj tiel povas ankaŭ utili revuoj kiel EES. Nur endas rigardi la enhavon de tipa kajero por konstati la diversajn manierojn, per kiuj manifestiĝas alternativemo kaj eksperimentemo en Esperanto kaj en la Esperantosfero.

Cetere en la diversaj biografioj kaj historiografioj, kiujn publikigis EES en la pasinteco, abundas ekzemploj de la tri liberecoj, kiujn proponis Graeber kaj Wengrow.

Pri la libereco translokiĝi, menciindas artikolo pri la totalisma periodo de la Soveta Unio, kiam la movado donis al kelkaj movadanoj – kelkaj por la unua fojo – eblecon vojaĝi internacie (Alcalde 2021). Pri la libereco malobei, ni citu la kazojn de Esperantistoj kiuj kuraĝe rezistis konformismon malgraŭ la ĉirkaŭa naciismo (Lins 2023). Kaj pri la libereco revii novan socion, inter multaj ekzemploj kompreneble, ni nur citu la rekomendon adopti helplingvon kiel Esperanton ĉe la Bahaanoj (Nordenstorm 2015), kaj la ideologian evoluon de la Mondlingva Klubo de Nurenbergo (Sikosek 2005).

Ni lasas al la legantoj juĝi, ĉu kelkaj el tiuj tri specoj de libereco respondas aŭ ne al la kontribuoj de la aktuala kajero.

La ĉi-jara volumo tamen komenciĝas funebre. Mark Fettes per konciza nekrologo memorigas pri la elstara aktivulo de la Esperanto-movado kaj de esperantologio, Renato Corsetti, kiu forpasis en februaro 2025. Sekvas artikolo, kiun Renato Corsetti pretigis surbaze de sia prelego en la Esperantologia Konferenco en Aruŝo (Tanzanio) en 2024. En ĝi la aŭtoro apudmetas Esperanton al aro da ĉefaj afrikaj lingvoj, studas la strukturajn similecojn kaj malsimilecojn kaj traktas la disvastigon de Esperanto en Afriko. La kontribuo de Renato Corsetti al la scienca interlingvistiko sendube plueŝos dum multaj jaroj. Same eŝas la interlingvistika laboro de István Szerdahelyi, pri kies scienca verkado kaj instruado Ilona Koutny ĉi tie prezentas novan studon.

Martine Mussies kondukas nin en la mondon de interreta fikcio, kie Esperanto aperas jen kiel ilo de komunikado, jen kiel ekzotika enplektaĵo en alilingvaj tekstoj. GONG Xiaofeng dediĉas sian atenton al alia formo de fikcio: Ŝi aplikas nuntempajn tradukologiajn kriteriojn al klasika ĉina romano el la 18-a jarcento, kies nuntempaj esperantaj tradukantoj devas transponti grandan lingvan, tempan kaj kulturen distancon. Philippe Planchon prenas sub sian lupeon karakterizan lingvan kapaciton de Esperanto. Li studas la memstaran uzon de afiksoj en historia kaj nuntempa perspektivoj.

En alian sferon nin invitas Bernd Krause. Lia historia studo analizas la proponojn kaj faktajn provojn pri interreta uzo de Volapuko kaj Esperanto en la armeo de Aŭstrio-Hungario fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj kaj, kontraste, en la tiuepoka pacmovado. Similan temon el la 21-a

jarcento tuŝas la notico de Kristin Tytĝat pri la uzo de esperantlingva devizo ĉe la Internacia Asocio de Policistoj.

La volumon kompletigas du recenzoj. Ulrich Lins analizas la libron *Green star Japan 'Verdstela Japanio'* de Ian Rapley, kiu temas pri la problemo de internacia lingvo inkluzive de la rolo de Esperanto en Japanio dum la 20-a jarcento. Dan Savatovsky traktas la hamburgan doktoran disertaĵon de Mira Sarikaya, *Die bestmögliche aller Sprachen 'La plejeble bona lingvo'*. La filozofia disertaĵo baziĝas sur la verkaro de Leibniz pri universala lingvo, analizas Esperanton kaj aliajn planlingvojn kaj proponas internacian konceptaron semantike difinendan.

Ni deziras fruktodonan legadon kaj invitas aŭtorojn sendi al nia revuo siajn esperantologiajn aŭ interlingvistikajn manuskriptojn.

Christopher Gledhill kaj Klaus Schubert

Bibliografio

- Alcalde, Javier. 2021. "Kio okazis en la komunismaj landoj de meza kaj orienta Eŭropo?" *Esperantologio / Esperanto Studies* 10, Nova serio 2: 65–74. <https://doi.org/10.59718/ees61542>
- Graeber David kaj David Wengrow. 2021. *Dawn of Everything. A New History of Humanity 'La Estiĝo de ĉio. Nova historio de la Homaro'*. London: Allen Lane.
- Lins, Ulrich. 2023. "Recenzo de la libro O'Keeffe, Brigid. 2021. Esperanto and Languages of Internationalism in Revolutionary Russia." *Esperantologio / Esperanto Studies* 13, Nova serio 5: 117–120. <https://doi.org/10.59718/ees11457>
- Nordenstorm, Leif. 2015. "Views on Esperanto in the Bahá'í faith: A revised subchapter in *Bahá'u'lláh and the New Era*." *Esperantologio / Esperanto Studies* 7: 41–60. <https://doi.org/10.59718/ees52479>
- Sikosek, Marcus. 2005. "Dokumente zum 'Weltspracheverein Nürnberg'." *Esperantologio / Esperanto Studies* 3: 45–54. <https://doi.org/10.59718/ees45731>
- Tonkin, Humphrey. 2022. "Esperanto: esploraj prioritatoj." *Esperantologio / Esperanto Studies* 11, Nova serio 3: 86–107. <https://doi.org/10.59718/ees62843>

Mark Fettes

Simon Fraser University, Kanado

Renato Corsetti (1941–2025) Nekrologo

La 1-an de februaro 2025 forpasis en Londono Renato Corsetti, eksa prezidanto (2001–2007) kaj honora prezidanto (2023–2025) de Universala Esperanto-Asocio kaj multjara kontribuanto al la interlingvistika literaturo, inter diversaj aliaj okupoj ligitaj al Esperanto. Kvankam oni verŝajne ne unuavice memoros lin kiel akademian verkiston, en pli larĝa senco li prezentas interesan kazon de "intellettuale organico" laŭ la koncepto de Antonio Gramsci – t.e. intelektulo, kies pensado kaj agado estas ankritaj en difinita socia klaso kiu strebas al socia transformiĝo. Konsentite, kompreneble, ke la esperantistoj ne konsistigas realan socian klason, nek socion kun internaj klasaj dividoj. Tamen, la diversaj intervenoj kaj kontribuoj de Corsetti ofte prezentis la esperantistaron kiel specon de socia avangardo, kies kerno estis la "ordinaraj" esperantistoj aktivaj en siaj kluboj kaj landaj asocioj, kvazaŭ la laborista klaso de la movado.

Corsetti venis iom malfrue al Esperanto, dudekelkjara, ĝuste en la socie tumulta epoko de la malfrujaj sesdekaj jaroj. Verŝajne jam tiam formiĝis liaj maldekstraj politikaj konvinkoj, kiuj ne ŝanceliĝis dum la posta duona jarcento. Doktoriginte pri ekonomia scienco en la Universitato de Romo "La Sapienza" (1964), kaj malgraŭ sia revolucio, li dum multaj jaroj laboris en itala banko. Lia esperantistiĝo malfermis novajn intelektajn horizontojn; ekde 1974 li komencis studi socilingvistikon, lingvopolitikon kaj lingvoplanadon en la sama universitato. En tiuj jaroj li ekkunlaboris kun la revuo *Language Problems and Language Planning*, interalie kiel recenzo-redaktoro, kaj publikigis kelkajn fruajn studojn pri lingvo kaj politiko (ekz. Corsetti, Cardona kaj La Torre 1974; Corsetti 1976). En 1981 li fondis esperantlingvan familion kun sia dua edzino Anna Löwenstein, kaj la edukado de du filoj en tia medio kondukis lin al esploroj pri psikolingvistiko kaj infana dulingveco. Pri tiuj temoj li instruis en la psikologia fakto de la universitato de 1991 ĝis 2009, fine kiel profesoro pri psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. (Ĉe itala eldonejo aperis lia lernolibro pri la fakto: Corsetti 2003.)

La esperantologiaj kontribuoj de Corsetti rilatas ĉefe al tri temoj:

1. infana lernado de Esperanto en plurlingva medio (Corsetti 1990; Corsetti kaj Taeschner 1992; Corsetti 1993; 1994; 1996b; Corsetti, Pinto kaj Tolomeo 2004; Corsetti kaj Nagata 2005; Corsetti 2005);
2. kiom kaj kiel la lernado de Esperanto faciligas la lernadon de postaj lingvoj (Corsetti kaj La Torre 1993; 1995; 2001; Corsetti kaj Pinto 2001a; 2001b; Corsetti 2009);
3. komparoj inter Esperanto kaj kreolaj lingvoj (Corsetti 1996a; Corsetti 1999; Corsetti 2010). Supozeble li venis al ĉi tiu komparo pro siaj observoj pri la uzado de Esperanto ĉe infanoj, i.a. la reguligaj tendencoj notitaj en Corsetti, Pinto kaj Tolomeo (2004); la temo estas esplorita pli detale en Corsetti (2005).

Jam frue en sia esplora kariero Corsetti ekinteresiĝis pri la leksika evoluo de Esperanto (Corsetti, La Torre kaj Vessella 1980), kaj tio poste fariĝis temo de diversaj publikaj elpaŝoj liaj, sekvante la aperon de *La bona lingvo* de Claude Piron (1989). En tiu libroforma polemika eseo, Piron prezentis detalan argumenton por maksimuma utiligo de la vortokreaĵoj de Esperanto, prefere al pruntado de “internaciaj vortoj” laŭ la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko. Sekve Corsetti kaj Löwenstein kunlaboris por starigi retejon por kuraĝigi kaj subteni tian evoluvojon por Esperanto; diversaj tekstoj de Corsetti estas plu legeblaj tie (<http://bonalingvo.net/>). Sur ĉi tiu kampo, kerne rolis la politika orientiĝo de Corsetti: li rigardis Esperanton kiel rimedon por antaŭenigi socian justecon kaj homajn rajtojn je monda skalo (Corsetti 2001a), kaj vidis ĝian leksikan plivastiĝon kiel minacon al tiu projekto, se ĝi baziĝus sur ekskluzive eŭropaj fontoj (Corsetti 2001b). En 2001 li kaj Löwenstein elektiĝis al la Akademio de Esperanto, kiel anoj de moderniga tendenco kiu celis proksimigi ĝin al la bezonoj de ordinaraj esperantistoj. En tiu kunteksto menciindas ankaŭ lia multjara okupiĝo pri “tabuaj kaj insultaj esprimoj” en Esperanto, kolektitaj en la glosaro *Knedu min sinjorino!* (Corsetti 2006) kies dua eldono aperis en 2008 ĉe La Kancerkliniko.

Renato Corsetti estis homo, kiu facile moviĝis inter ĉiuj tavoloj de la Esperanto-movado, kiel populara parolanto kaj aktivulo kun tutmonda renomo. Liaj interlingvistikaj kontribuoj (parte lokitaj en longa kaj elstara itala tradicio: Corsetti 1985; Corsetti 2008) konsistigis nur kelkajn facetojn de lia rimarkinda kariero.

La gamon de liaj interesoj kaj kontribuoj bele spegulis la festlibro por lia 75-a datreveno, *Lingua politica cultura* (red. F. Gobbo 2016), kun 29 kontribuoj traktantaj lingvopolitikon, esperantologion, lingvolernadon kaj aliajn temojn. Sed lia koro ĉiam hejmis inter la simplaj uzantoj kaj aktivuloj de la lingvo, kiujn li nelacigeble subtenis kaj ĉampionis, strebante ilin inspiri al solidareco kaj komuna agado.

Selektita bibliografio

- Corsetti, Renato, Giorgio Cardona kaj Mauro La Torre, red. 1974. *Raporto pri la Seminario "Lingvo kaj Socio"*. Amsterdam: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Vd. ankaŭ "Marksismo kaj lingva libereco", p. 1–4, kaj "Lingvistiko kaj politiko", p. 5–27.
- Corsetti, Renato, red. 1976. *Lingua e politica. Imperialismi, identità nazionali e politiche linguistiche in Asia, Africa, America Latina*. Roma: Officina Edizioni. Vd. ankaŭ "La lingua come strumento politico", p. 7–24.
- Corsetti, Renato, Mauro La Torre kaj Nino Vessella. 1980. "Pliriĉigo de la morfemaro en la internacia planlingvo." En *Miscellanea Interlinguistica*, redaktis István Szerdahelyi, 368–379. Budapest: Teknika Universitato Eötvös Loránd.
- Corsetti, Renato. 1985. "Konata lingvisto kaj konata interlingvisto." En Bruno Migliorini, *Lingvaj aspektoj de Esperanto*, 5–6. Pisa: Edistudio.
- Corsetti, Renato. 1990. "Early language development of a trilingual child: The role of contrast." En *Dimensions of Bilingual Development*, redaktis Jochen Rehbein kaj Traute Taeschner, 67–89. Clevedon: Multilingual Matters.
- Corsetti, Renato kaj Traute Taeschner. 1992. "Kiel trilingva infano lernas distingi inter lingvoj." *Internacia Pedagogia Revuo* 22, kajero 3: 1–10.
- Corsetti, Renato kaj Mauro La Torre. 1993. "Paderborn e dintorni: Possibili condizioni per un esperimento sul valore propedeutico della lingua internazionale esperanto." *Rassegna Italiana di Linguistica Applicata* kajero 3: 115–136.
- Corsetti, Renato. 1993. *Macchina Daddy Lampo: Alcune osservazioni su un caso di trilinguismo dalla nascita in italiano, inglese ed esperanto*. Speciala kajero de *L'esperanto*. Milano: FEI.
- Corsetti, Renato. 1994. "Kiun lingvaron vi parolas? Observoj pri multlingveco kaj Esperanto en ĝi." En *Internacia familio - utopio aŭ realaĵo*, redaktis Zlatko Tišljarić, 49–53. Maribor: Interkulturo.
- Corsetti, Renato kaj Mauro La Torre. 1995. "Quale lingua prima? Per un esperimento CEE che utilizzi l'esperanto." *Language Problems and Language Planning* 19, kajero 1: 26–46.
- Corsetti, Renato. 1996a. "Esperanto kaj kreolaj lingvoj: komunaj kaj malkomunaj trajtoj en la kreoliĝo." En *Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo*, redaktis Stanislav Košecký, 11–36. Bratislava: Esprima.
- Corsetti, Renato. 1996b. "A mother tongue spoken mainly by fathers." *Language Problems and Language Planning* 20, kajero 3: 263–273.
- Corsetti, Renato. 1999. "Kreoliĝo de Esperanto inter personaj gustoj kaj oficiala normo." En *Por aktiva lingvopolitiko*, redaktis Detlev Blanke,

- Roy McCoy kaj Osmo Buller, 43–60. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Corsetti, Renato kaj Mauro La Torre. 2001. “Ĉu klara strukturo estas instrua?” *Interface. Journal of Applied Linguistics* 15, kajero 2: 179–202. – ankaŭ en *Planned Languages: From Concept to Reality*, redaktis Klaus Schubert, 179–202. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst. <http://d-nb.info/1239423241/34>
- Corsetti, Renato. 2001a. “Homaj rajtoj, lingvaj homaj rajtoj, kaj Esperanto.” En *Studien zur Interlinguistik / Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*, redaktis Sabine Fiedler kaj Liu Haitao, 95–106. Dobřichovice (Praha): Kava-Pech.
- Corsetti, Renato. 2001b. “Esperanto en Eŭropo kaj Maleŭropo.” En *Esperanto en la 21-a jarcento*, redaktis Lee Chong-Yeong, 325–336. Seulo: Korea Esperanto-Asocio. <https://books.google.com>
- Corsetti, Renato kaj Maria Antonietta Pinto. 2001a. “Imparare l’esperanto e migliorare le capacità di riflettere sull’italiano. Un’esperienza a livello di scuola media.” *Rivista di Psicolinguistica Applicata* 2: 67–84.
- Corsetti, Renato kaj Maria Antonietta Pinto. 2001b. “Ricadute metalinguistiche dell’insegnamento dell’esperanto sulla lingua materna dell’alunno: Un’esperienza nella scuola media italiana.” *Language Problems and Language Planning* 25, kajero 1: 73–90.
- Corsetti, Renato. 2003. *Appunti di psicopedagogia del linguaggio e della comunicazione*. Roma: Edizioni Kappa.
- Corsetti, Renato, Maria Antonietta Pinto kaj Maria Tolomeo. 2004. “Regularizing the regular: The phenomenon of overregularization in Esperanto-speaking children.” *Language Problems and Language Planning* 28, kajero 3: 261–282.
- Corsetti, Renato kaj Hiroshi Nagata. 2005. “Influoj de gepatra lingvo sur la lernadon de Esperanto: psikolingvistika esploro.” *Esperantologio / Esperanto Studies* 3: 5–39. <https://doi.org/10.59718/ees35184>
- Corsetti, Renato. 2005. *L’esperanto dalla nascita: tra creatività e creolizzazione – alcuni aspetti dell’apprendimento della lingua internazionale dalla nascita*. Speciala kajero de *L’esperanto*. Milano: FEI.
- Corsetti, Renato. 2006. *Knedu min, sinjorino! Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto!* 2-a eld. 2008. Thaumier: LKK.
- Corsetti, Renato, red. 2008. *Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo*. Pisa: Edistudio.
- Corsetti, Renato. 2009. “La lernofaciliga valoro de Esperanto: De Szerdahelyi al Springboard to Languages.” En *Abunda fonto: Memorlibro omaĝe al prof. d-ro István Szerdahelyi*, redaktis Ilona Koutny, 256–265. Poznań: ProDruk / Steleto.

Corsetti, Renato. 2010. “Ŝanĝiĝo de vortaro en kreolaj lingvoj: La ekzemplo de Esperanto.” En *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 373–385. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

Corsetti, Renato kaj Anna Löwenstein. 2020. La bona lingvo. <http://bonalingvo.net/>

Aliaj menciitaj verkoj

Gobbo, Federico, red. 2016. *Lingua, politica, cultura. Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti*. Novjorko: Mondial.

Piron, Claude. 1989. *La bona lingvo*. Vieno: Pro Esperanto / Budapest: Hungara Esperanto-Asocio. http://claudepiron.free.fr/livres/La_bona_lingvo_pdf.zip

Pri la aŭtoro

Mark Fettes estas la direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado. Liaj esploroj traktas interalie la mastrumadon kaj revigligon de indiĝenaj lingvoj, la sociologion de la Esperanto-komunumo, kaj multlingvismon en la programoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Retadreso: mtfettes@sfu.ca

ORCID-numero: 0000-0003-4147-7879

About the author

Mark Fettes is the Director of the Centre for Research and Documentation on World Language Problems and Professor of Education at Simon Fraser University, Canada. His research deals with the management and revitalization of Indigenous languages, the sociology of the Esperanto community, and multilingualism in the programs of the United Nations among other topics.

Sur l'auteur

Mark Fettes est directeur du Centre de recherche et de documentation sur les problèmes linguistiques mondiaux et professeur d'éducation à l'Université Simon Fraser, au Canada. Ses recherches portent entre autres sur la gestion et la revitalisation des langues indigènes, la sociologie de la communauté espérantophone, et le multilinguisme dans les programmes des Nations Unies.

Renato Corsetti

(emeritiĝinta el)

Universitato de Romo “La Sapienza”

Esperantistoj fronte al afrikaj lingvoj

Resumo: Esperanto disvastiĝas tre rapide nun en Afriko kaj la entuziasmo pri ĝi eĉ superas tiun en aliaj kontinentoj. Intertempe la lingva situacio en Afriko komencas ŝanĝiĝi favore al uzado de lokaj lingvoj ankaŭ en Okcidenta Afriko. Estas kelkaj ĉefaj kaŭzoj pri tio, kiuj resumeblas per ŝanĝo de la politiko de la Monda Banko, kiu dum jardekoj donis pruntojn al evoluantaj landoj nur kun la kondiĉo, ke ili instruu grandajn internaciajn lingvojn. El tio sekvas, ke oni pli kaj pli ekuzas afrikajn lingvojn en edukado. Sekve nia movado bezonas la samajn komparajn studojn, kiujn oni jam faris en la pasintaj jardekoj pri la suahila, se oni volas vere produkti lerno-materialon efikan pri Esperanto en afrikaj lingvoj.

Ŝlosilvortoj: Esperanto, haŭsa, suahila, niĝeraj-kongaj lingvoj

1 Enkonduko

La libro de Heidi Goes (2007) bonege dokumentas la unuajn kontaktojn inter Afriko kaj esperantistoj.¹ Temis, kiel oni povas supozi, pri esperantistaj funkciuloj de la koloniaj potencoj en Afriko, kaj en la administra kaj en la armea sektoroj. Malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj ili atingis konsiderindajn rezultojn ĉefe en Norda Afriko, de Alĝerio al Egiptujo, sed plejparte inter kuneŭropanoj. En esperantistaj fontoj estas menciata la kapitano Auguste Capé-Montrosier, kiu en 1903 komencis fari “neordinare viglan propagandon per artikoloj kaj paroladoj” ... kaj kun Harold Tarry li fondis samjare la unuan Esperanto-grupon (Goes 2007: 16). Ankaŭ en Egiptujo tre frue, en 1901 artikoloj verkita de René Japiot en Aleksandrio aperis en *La Correspondence Egyptienne illustrée*, al kio sekvis aliaj agadoj ĝis la komenco de la unua mond-milito, kiam esperantistoj foriris al Eŭropo kaj la agado en Egiptujo preskaŭ estingiĝis (Goes 2007: 19).

1 Redakcia noto: Ni funebras la aŭtoron de ĉi tiu artikolo. Renato Corsetti forpasis en februaro 2025. Nekrologo aperas en ĉi tiu kajero de la revuo. La artikolo baziĝas sur prelego de Renato Corsetti eldirita en la Esperantologia Konferenco kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo (Tanzanio) en aŭgusto 2024. La manuskripton la aŭtoro submetis al nia revuo en aŭtuno 2024. La formalajojn de la revua stilo kaj de la bibliografio ni tamen devis finfari sen povi peti la aprobon de Renato Corsetti. Krom la redaktoroj la tekston redaktis la edzino de la aŭtoro, Anna Löwenstein. Ni ankaŭ dankas pro helpo de Michele Gazzola.

Simile en Sud-Afriko estis esperantistoj jam antaŭ la fino de la 19-a jarcento. Sed en tiu epoko tute neniel estis interesiĝo pri afrikaj lingvoj fare de la tiamaj esperantistoj, krom iom da materialo aperinta en Egiptujo en la araba, kaj la situacio restis tia ĝis la 1960-aj jaroj, kiam la ondo de sendependiĝo en Afriko post la dua mond-milito estis en plena progreso.

Post la Karavano de Amikeco de Tibor Sekelj, kiu tuŝis plurajn afrikajn landojn kaj faris kontaktojn kun politikistoj kaj intelektuloj, en 1962 aperis teksto de Sekelj mem. La broŝuro *Esperanto: Komuna Lingvo por Afriko – Komuna Lingvo por la Mondo!* aperis en la angla, la franca kaj la araba (Sekelj 1962a,b,c). Sed ĝi ne aperis en iu ajn afrika lingvo. Verdire jam en 1953 Unesko estis eldoninta siajn konsilojn al aziaj kaj afrikaj liberiĝintaj landoj pri ekuzado de la propraj lingvoj ĉefe en edukado, sekve de multaj studoj pri apartaj landoj kaj pri kunveno de fakuloj en 1951 (Unesco 1953), sed tiuj konsiloj restis neatentitaj dum duona jarcento.

En la menciita teksto oni simple alvokis afrikanojn esti ekzemplo por la mondo pri justa solvo de la komunikaj problemoj inter malsamlingvaj grupoj en Afriko.

Ĉiukaze de tiu periodo komenciĝis pli aktiva interesiĝo ĉe esperantistaj organizaĵoj pri Esperanto en Afriko. Oni komencis okupiĝi pri la kontaktoj faritaj de Sekelj dum la vojaĝo de la Karavano de Amikeco kaj fine en la 1970-aj jaroj broŝuro de UEA kaj TEJO aperis en 1979 ankaŭ en la suahila:² *Kwa kulinda tamaduni za Afrika 'Por defendi afrikajn kulturojn'* (UEA / TEJO 1979).

2 Nuna situacio

El la dua duono de la 1970-aj jaroj laŭgrade oni ekinformis afrikanojn pri Esperanto per anoncoj en loke legataj gazetoj. Hans Bakker, multe helpata de Germain Pirlot, okupiĝis pri la franclingvaj landoj de Afriko kaj Nino Vessella en la komenco de la 1980-aj jaroj pri la suahillingvaj landoj, kie aperis anoncoj en Kenjo kaj Tanzanio ekde 1981.³ Kaj en 1982 aperis la lernolibro en la suahila de Nino Vessella: *Jifunze lugha ya Kiesperanto 'Lernu la lingvon Esperanto'* (Vessella 1982), kiu de tiam estis utiligata en la landoj de Orienta Afriko, dum Hans Bakker uzis ĉefe franclingvajn lernolibrojn kaj foje anglalingvajn.

Ĉi tiu agado estis ĉiam pli sukcesa, komencis okazi afrikaj kongresoj kaj la movado tiom kreskis, ke oni alvenis en 2024 al la unua afrika Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio. Sed la rilato de esperantistoj kaj de la afrikaj

2 Redakcia noto: La nomo de la lingvo, kiu en PIV estas svahila, la aŭtoro sisteme literumas suahila.

3 *Jeune Afrique* estis la franclingva revuo pleje uzita de Hans Bakker, *Taifa Leo*, *Taifa Weekly* kaj *Uhuru* tiuj uzitaj de Nino Vessella.

registroj al afrikaj lingvoj restis apenaŭa. En la plejmulto de afrikaj landoj la ekskoloniaj eŭropaj lingvoj estis la sola lingvo uzata en lernejoj, kaj Esperanto estis instruata pere de tiuj lingvoj. Interalie la internaciaj premoj favoraj al tiuj lingvoj restis konstantaj dum jardekoj ĝis lastatempe. Fakte nur en 2021 la Monda Banko abrupte ŝanĝis sian politikon pri preferataj lingvoj en instruado kaj transiris de favorado de instruado per la grandaj internaciaj lingvoj al favorado de instruado en lokaj lingvoj per la politika deklaro aperinta en la 14-a de julio 2021: *Loud and Clear: Effective Language of Instruction Policies for Learning* ‘Laŭte kaj klare: politikoj pri efikaj lingvoj de instruado’ (World Bank 2021):

Poor Language of Instruction policies harm learning, access, equity, cost-effectiveness, and inclusion. Yet nearly 37% of students in low- and middle-income countries are taught in a language they do not understand. Massive learning improvements are feasible by teaching in a small number of additional languages. The World Bank’s first Policy Approach Paper on Language of Instruction offers an indication of the work that will be undertaken to support countries in introducing reforms that will result in more resilient, equitable, and effective systems by promoting teaching in the languages that students and teachers speak and understand best.

(Netaŭgaj politikoj pri instrulingvoj malhelpas lernadon, alireblon, justecon, kost-efikecon kaj inkluzivigon. Tamen preskaŭ 37 elcentoj de studentoj en landoj kun malaltaj aŭ mezaj enspezoj estas instruataj en lingvo, kiun ili ne komprenas. Enormaj lerno-pliboniĝoj estas atingeblaj per instruado en malgranda nombro da aldonaj lingvoj. Per sia unua ‘Dokumento pri la aliro al politikoj pri instruaj lingvoj’ la Monda Banko prezentas indikojn pri la laboro farota por subteni landojn, kiuj enkondukos reformojn, kie rezultos sistemoj pli elastaj, justaj kaj efikaj per antaŭenigo de instruado en la lingvoj, kiujn studentoj kaj instruistoj parolas kaj komprenas plej bone.) (nia traduko)

Preskaŭ samtempe la Organizaĵo de franclingvaj landoj, Organisation internationale de la Francophonie (OIF), ekfunkciigis similan programon, ELAN, kiu celas certigi

[...] l'accès de tous les élèves à un enseignement de base dans une langue qu'ils maîtrisent pour ensuite faciliter l'acquisition d'une ou plusieurs autres langues et faciliter également la maîtrise des autres disciplines scolaires et ainsi améliorer les performances scolaires y compris en français. Une telle offre permet ainsi non seulement d'améliorer la qualité des premiers apprentissages mais également de répondre au défi de l'éducation du 21ème siècle [...]. (IFEFE 2024)

([...] la eniron de ĉiuj lernantoj al unua instruado en lingvo, kiun ili mastras, por poste faciligi la akiron de unu aŭ pluraj aliaj lingvoj kaj faciligi samtempe la mastrumadon de aliaj lernejoj kaj tiel plibonigi la lernejajn rezultojn, inkluzive en la franca. Tia oferto permesas ne nur plibonigi la kvaliton de la unua lernado sed samtempe respondi al la defioj de edukado de la 21-a jarcento [...].)

La retejo de OIF informas, ke nuntempe la programo ELAN donas subtenon teĥnikan kaj financon al 13 landoj partneraj: Burkinafaso, Burundo, Ebura Bordo, Kameruno, Gvineo, Malagasujo, Malio, Maŭritanio, Niĝero, Konga Demokratia Respubliko, Senegalo kaj Togolando, dum Benino estis partnero nur de 2012 ĝis 2017 (informo laŭ IFEF 2024).

Do estas evidente, ke la du grandaj subtenantoj de la uzo de eŭropaj lingvoj ŝanĝis siajn sintenojn, kaj tio laŭgrade devos ŝanĝi la situacion en Afriko mem. Alivorte la eksaj koloniantoj pli rapide ol la afrikaj ministroj pri edukado, kvankam kun 70-jara malfruo, akceptis la rekomendojn de Unesko kaj de ĉiuj lingvistoj, kiuj okupiĝis pri la temo.

Nur malmultajn vortojn ni diru pri la situacio en orientaafrikaj landoj, kie la lingvo efektive parolata de ĉiuj en ĉiuj niveloj estas la suahila, kiel povis konstati la partoprenintoj en la Universala Kongreso, sed tie la suahila, malgraŭ sia uzateco, devas ankoraŭ kontraŭbatali la emojn al la angla. Fakte en la pasinta jarcento sub la prezidado de Julius Nyerere la suahila ricevis grandan impulson. Ni reprenas citaĵon el libro pri la evoluo de la suahila:

La dua politika periodo komenciĝas en 1967, sekve de la fama Aruŝa-deklaro kaj de la broŝuro de Prezidanto Njerere “Eduko al Memfido” [...] Ĝi [la suahila] do anstataŭas definitive la anglan kiel instrulingvon en la unuagradaj lernejoj. La angla restas kiel fremda lingvo [...] [sed post la foriro de Njerere] [...] la registaro petis la Britan Konsilantaron analizi la problemon kaj proponi solvon. [...] Do en la jaro 1983-a la esploro farita de la Brita Konsilantaro konstatis la samajn problemojn rimarkitajn de la tanzanaj esploristoj, sed konkludis ke la angla lingvo devas pluesti la instrulingvo. (Vessella 2024)

Kaj la situacio ankoraŭ restas la sama, kun la suahila uzata de ĉiuj, ĉie, kaj la angla uzata en la supera kaj universitata instruado.

Tia, mallonge priskribita, estas la nuna situacio en Afriko en 2024, en kiu Esperanto estas instruata per la franca, la angla kaj la suahila. Kursoj en portugallingvaj landoj apenaŭ ekzistas.

3 Esperanto kaj la suahila

Kiel mi skribis pli frue, la atento de esperantistoj pri la suahila lingvo komenciĝis en la komenco de la 1980-a jaroj per la apero de la lernolibro de Nino Vessella (1982): *Jifunze lugha ya Kiesperanto* kaj ĝi daŭris seninterrompe

ĝis la ĉi-jara Universala Kongreso en Tanzanio. Tra la jaroj aperis ankaŭ romano tradukita el la suahila (Topan kaj Husein 1984), eĉ speco de Parnasa Gvidlibro pri la suahilaj poemo-formoj (Vessella 1980), kaj kelkaj komparoj inter Esperanto kaj la suahila, pri kiuj oni povas legi en Vikipedio (Svahila lingvo 2025). Sed pro la daŭra disvastiĝo de Esperanto en suahil-lingvaj regionoj de Orienta Afriko, ILEI mem sentis la bezonon reeldoni la lernolibron de Vessella en 2021, kiel kvaran eldonon nove prilaboritan. Fine dum la jaro de la Universala Kongreso la intereso de esperantistoj pri la suahila vere eksplodis per pluraj kursoj por lerni ĝin per Esperanto.

Kaj malgraŭ la kompleta malsameco de la vorttrezoro oni povus ŝerce sin demandi: *Je Zamenhof alisema kiswahili? 'Ĉu Zamenhof parolis la suahilan?'* La respondo evidente estas: Nepre ne! Unuflanke ne estas informoj pri tio en la kelkaj studoj pri la vivo de Zamenhof, kaj duaflanke germanoj ekokupis Orientan Afrikon en 1885 kaj kvankam ili interesiĝis pri la suahila, starigis lernejojn [*shule* (lernejo) en la suahila estas klara atesto pri tio], ili bezonis iom da tempo por verki lernolibrojn en la germana, kiujn Zamenhof estus povinta akiri.

Sed pro hazarda koincido estas multaj similecoj inter Esperanto kaj la suahila. Unue la son-sistemo estas surprize simila. La vokaloj estas: /a, e, i, o, u/ precize kiel en Esperanto, sen distingo pri vasteco/malvasteco, longeco/mallongeco. Ili estas tiom similaj al Esperanto, ke lernolibro penas klarigi al franclingvaj kongolandanoj forgesi pri la franca elparolo de vokalo plus n: “an, on, en, in hutamkwa [‘oni prononcu:’] a-nn, o-nn, e-nn, i-nn” (Muhire 2024). Konsonantoj sen problemoj estas: b, d, f, g, h, k, l, m, n, p, r, s, t, v, z, kaj pri la ceteraj ĉefe oni devas instrui kiel literumi ilin: C kiel ts; Ĉ kiel ch; Ĝ kiel j; Ĥ kiel kh; J kiel y; Ŝ kiel sh; Ŭ kiel w. La sola problema sono restas Ĵ kiel ʒ aŭ j en la franca. Kaj la akcento estas precize kiel en la pola kaj en Esperanto sur la antaŭlasta vokalo. Sekve de tio suahil-lingvanoj lernantaj Esperanton elparolas ĝin pli bone post du semajnoj ol francoj post du monatoj kaj angloj post du jaroj. Kaj tio ĝenerale validas por ĉiuj bantu-lingvanoj.

Sed la profundaj similecoj estas troveblaj en la morfologio kaj iugrade en la sintakso. La morfologio de la suahila – kaj de ĉiuj aliaj bantuaj lingvoj – sekvas ĉi tiun modelon: radiko, kiu donas la ĝeneralan ideon, kiu per prefiksoj kaj enfiksoj (antaŭmorfemoj kaj enmorfemoj) ricevas sian faktan signifon en la frazo. Jen ekzemplo:

infanO	Mtoto
infanOJ	WAtoto
infanECO	Utoto
InfanE	Kitoto

Esperanto uzas finaĵojn kaj la suahila komencaĵojn, sed la principo estas la sama, kiun abunde uzas instruistoj de Esperanto en suahillingvaj regionoj. Ni donu ankoraŭ ekzemplojn pri la verboj:

mi vojaĝas =
nasafiri = *ni*-NA-safiri = *mi*-AS-vojaĝ

mi vojaĝis =
nilisafiri = *ni*-LI-safiri = *mi*-IS-vojaĝ

mi vojaĝos =
nitasafiri = *ni*-TA-safiri = *mi*-OS-vojaĝ

vojaĝi =
kusafiri = KU-safiri = I-vojaĝ

Kaj la sistemo funkcias same regule por ĉiuj tempoj kaj ĉiuj verboj. Ni citu ankoraŭ kelkajn ekzemplojn:

mi manĝus =
ningekula = *ni*-NGE-kula = *mi*-US-manĝ

mi estus leginta =
ningalisoma = *ni*NGALI-soma = *mi* US-INT-leg

kaj iom da infinitivoj:

kusema, kusoma, kula, kwenda, kufika, kupika
diri, legi, manĝi, iri, alveni, kuir

Kompreneble ekzistas aliaj kampoj de la du lingvoj, en kiuj ili komplete malsamas, ekzemple la vortaro. La suahila vortaro konsistas, krom el bantuaj vortoj, 15-elcente el arabdevenaj vortoj, proksimume 5-elcente el angla-devenaj vortoj, proksimume 4-elcente al persdevenaj vortoj kaj iom malpli el hinddevenaj vortoj kaj fine malmultaj vortoj portugal-devenaj kaj eĉ malagas-devenaj.


Ankoraŭ pli malsama rilate al Esperanto estas la enklasigado de la mondo. Dum Zamenhof sekvis la eŭropajn lingvojn kaj sisteme distingis la vortojn inter substantivoj (*o*-vortoj), adjektivoj (*a*-vortoj), verboj (*i*-vortoj), kaj adverboj (*e*-vortoj), bantuaj lingvoj dividas la mondon kaj la vortojn laŭ malsama sistemo, laŭ semantikaj aŭ signifaj klasoj: homoj, arboj, fruktoj,

bestoj, abstraktaj vortoj – inkluzive de landoj (abstrakta ideo el la nomo de loĝantoj), lokoj (kp. Knappert 1996; Muhire 2024). Kompreneble pro la amaso da pruntoj kaj la uzo de la suahila fare ankaŭ de nebantuoj, la pura klas-sistemo akiris multajn esceptojn, pro kio la signifo-klaso de multaj vortoj estas aparte lerninda.

Ĉiuokaze la simileco de la funkciado de Esperanto kaj de la suahila estas evidenta kaj faciligas la akiron de la internacia lingvo fare de tanzanianoj kaj iom pli malfacile ĉefe pro la vortara malsimileco la akiron de la suahila fare de esperantistoj, kiel montris kaj la retaj kursoj en 2024 kaj la ĉeestaj kursoj en Aruŝo dum la Universala Kongreso.

Sed la rilatoj inter esperantistoj kaj la suahila ŝajne estas la tuto de la rilatoj inter esperantistoj kaj afrikaj lingvoj. Pro la historio de la disvastiĝo de Esperanto en Okcidenta Afriko, la afrikaj lingvoj de tiu parto de Afriko ne aparte interesis la esperantistojn, inkluzive de la afrikaj parolantoj de tiuj lingvoj, kiuj estis ĉiuj loĝantaj en landoj, en kiuj la lernejoj lingvoj estis eŭropaj lingvoj.

La venontaj sekcioj de ĉi tiu artikolo traktos tiujn lingvojn.



Bildo 1:
La vortaro de Baldi (2024)

4 Esperanto kaj la lingvoj de Okcidenta Afriko

La komenca instigo por la prelego en la Esperantologia Konferenco en Aruŝo, el kiu fontas ĉi tiu artikolo, estis kiel kutime laŭokaza. Emerita profesoro de la universitato en Napolo, Sergio Baldi (2025), kiu instruis tie la haŭsan kaj sudanajn lingvojn, esperantisto dum sia juneco, volis eldoni en Esperanto version malpligrandigitan de sia vortaro haŭsa-itala kaj itala-haŭsa (Baldi 2015), kaj do mi devis plonĝi en la haŭsan por revizii la parton en Esperanto. Kaj fine ankaŭ danke al la helpo de haŭsa-parolantoj la vortaro aperis (Baldi 2024, vd. bildon 1).

Sed por mi kaj por la rilatoj inter Esperanto kaj la haŭsa kaj la najbaraj lingvoj la sperto estis unika kaj estis nur la komenco de pli longa pripensado.

4.1 La haŭsa

La lingvo haŭsa estas lingvo apartenanta al la lingvogrupo ĥamida-ŝemida⁴ kaj aparte al la okcidenta branĉo de la ĉadaj lingvoj,⁵ alivorte ĝi estas parenca lingvo de la pli konata berbera lingvo aŭ malproksime parenca al la antikva egipta lingvo. Ĝi estas parolata de la haŭsoj en la norda parto de Niĝerio, Ganao, Kameruno, Benino kaj Togolando kaj en la sudaj partoj de Niĝero kaj Ĉado, kun signifaj malplimulto en Eburna Bordo kaj malgranda malplimulto en Sudano. La lingvo havas la plej interesajn trajtojn por lingvisto sed ne por lingvolernanto. Malgraŭ tio, ke ĝi originas de sen-tona lingvo, ĝi utiligas ton-altecon kaj aliajn rimedojn pri kiuj ni parolos tuj poste. Laŭ *Ethnologue* oni taksas je 54 milionoj la denaskajn parolantojn kaj je 34 milionoj la parolantojn de ĝi kiel dua lingvo, kio portas la tutan nombron de parolantoj de la haŭsa al pli ol 80 milionoj (Hausa 2025).

Mi ne scias kiel longe mi rajtas profiti el via pacienco, sed en la haŭsa:

- la vortoj estas inaj kaj viraj pro la deveno el aziaj-afrikaj lingvoj [komparu kun la araba];
- la vokaloj estas mallongaj kaj longaj;
- la vortoj havas tonojn kiel la ĉina kaj aliaj okcidentafrikaj lingvoj;
- la frazoj havas ton-ĉenojn de kiuj dependas la signifo;
- laŭ konata lernolibro oni ne lernu la sistemon de pluralo, sed ĉiujn pluralojn unuope;
- la verboj havas tempojn kaj aspektojn;⁶
- la pronomoj havas la distingon viran/inan ankaŭ en la dua persono, kiel en la araba, sed krome ili havas la taskon kunligiĝi kun morfemoj, kiuj indikas la aspektojn de la verbo, kiu en si mem ne estas konjugaciata.⁷

Estas klare, ke redoni la haŭsan en Esperanto ne estas io simpla, sed en la realo la disvastigo de Esperanto en Niĝerio, en kiu ekzistas eĉ landa asocio de esperantistoj, okazis ĉefe per la angla sen konsidero pri la haŭsa aŭ pri la aliaj lingvoj de Niĝerio aŭ de Okcidenta Afriko.

4 Konata ankaŭ per la nomo ‘afrika-azia lingvo-grupo’ kaj ankaŭ per aliaj variaĵoj.

5 Komparu Almansa-Villatoro kaj Štubňová Nigrelli (2023).

6 Vidu kion diras lernolibro: “The intricacy of the Hausa verb system is one of the more fascinating aspects of Hausa grammar.” (Kraft kaj Kirk-Greene 1973; ‘La implikaĵoj de la haŭsa verba sistemo estas unu la plej fascinaj aspektoj de la haŭsa gramatiko.’)

7 Ĉiuj ĉi tiuj elementoj de la haŭsa estas troveblaj en la libro Kraft kaj Kirk-Greene (1973).

4.2 La aliaj lingvoj de Okcidenta Afriko

Pro la malkovro de tiom interesaj lingvaj fenomenoj en la haŭsa mi ekinteresiĝis pri la aliaj lingvoj parolataj en Niĝerio, ĉar la plejmulto da niĝeriaj esperantistoj loĝas en tiuj regionoj, kie oni parolas la joruban aŭ la igban. Kaj denove mi malkovris lingvajn fenomenojn tre malproksimajn de Esperanto.

La joruba

Ne estas tute samaj problemoj kiel en la haŭsa, ĉar ĝi apartenas al la familio nomata niĝera-konga kaj do, ĝi havas tonojn, estas izola lingvo, havas unu-silabajn verbojn kun aspektoj, ne konjugaciatajn per finaĵoj sed per antaŭmetitaj morfemoj, nombradan sistemon je bazo 20, dividon de la substantivoj inter homoj kaj nehomoj, ktp. Ĉu nia Esperanto kun sia banala nombradsistemo bazita je 10, sen tonoj, aglutina kaj ne izola, ne povas aspekti facile lernebla de la 50 milionoj da parolantoj de la joruba (Yoruba 2025)? Aldone al tio la vorto-trezoro, lastatempe tre influita de la angla kaj de kristanismo estis en la pasinteco influata de islamo kaj de la araba, tiel ke *sanma* = paradizo aŭ ĉielo el la araba السماء; *alubarika* = beno el البركة; *alumaani* = riĉeco el riĉeco, mono, rimedoj el المال; kaj la tagoj de la semajno kiel *Atalata* (الثلاثاء) por mardo, *Alaruba* (الأربعاء) por merkredo, *Alamisi* (الخميس) por ĵaŭdo, kaj *Jimoh* (الجمعة), *Jumu'ah* por vendredo.⁸ Ĉi tio aldonas alian tavolojon de malsamecoj inter Esperanto kaj afrikaj lingvoj, kiuj estis ĉiuj influitaj de arabaj pruntvortoj alvenintaj kun islamo (Baldi 2008).

La igba

Pri klasigado de afrikaj lingvoj estas daŭraj debatoj inter lingvistoj, kaj la aparteno de la igba al la grupo niĝera-kongo estas de kelkaj el ili pridubata, dum oni preferas enklasigi ĝin en la grupon atlantan-kongan. Ĝi estas ne tute simila al la joruba, ĉar ĝi havas bone distingeblajn vortokategoriojn: nomoj, pronomoj, numeraloj, verboj, adjektivoj, konjunkcioj kaj nur unu prepozicio tre elasta, kiu alprenas plurajn prepoziciajn signifojn. Sed se la prepozicio estas nur unu, ankoraŭ pli surprizaj estas la adjektivoj, kiuj estas en fermita klaso de 8 adjektivoj: *ukwu* (granda), *nta* (malgranda), *oji* (malluma), *oĉa* (luma), *oĉuru* (nova), *ochie* (malnova), *oma* (bona), *njo* (malbona) dum la aliaj adjektivoj estas farataj per stato-verboj aŭ abstraktaj kvalito-vortoj (Emenanjo 1978).

Verboj, aliflanke, ŝajnas esti la bazaj vorto-formoj, el kiuj oni derivas aliajn vortojn, sed inverse ĝenerale oni ne faras.

Pronomoj ne distingas inter viraj, virinaj aŭ aĵaj subjektoj. *o maka can* signifas laŭ la kunteksto 'li, ŝi aŭ ĝi estas bela'.

8 Pri *Jumu'ah* vidu *Wikipedia*: Friday prayer (2025).

Konklude la igba estas izola lingvo kun tre malmulta vortfleksio sed kun sistemo de sufiksoj regataj de la signifoj kaj de ne fiksita vort-ordo en la frazo. Aliflanke la sufiksoj origine derivitaj de aliaj vortoj nun ne plu rajtas esti uzataj sendepende. Fine laŭ la kutimaj statistikoj de *Ethnologue* la parolantoj de la igba estas pli ol 30 milionoj (Igbo 2025).

Ĉiuokaze la igba kaj Esperanto havas rekte malsamajn funkci-manierojn.

La volofa

Se ni turniĝas al lingvoj parolataj en aliaj najbaraj landoj, kie ĉeestas relative multaj esperantistoj, ni unue renkontas la volofan, alian lingvon de la sama grupo niĝera-konga. Ĝi estas ĉefe parolata en Senegalo, Gambio kaj Maŭritanio kun malplimulto en aliaj landoj (Wolof language 2025). Ĝia ĉefa dialekto, tiu de la ĉefurbo Dakaro, estas forte influita de la franca kaj de la araba. Malsame ol aliaj niĝeraj-kongaj lingvoj ĝi ne estas tona lingvo.

Sed la sola kontaktpunkto kun Esperanto ŝajnas esti la vorto *banano* veninta al Esperanto el eŭropaj lingvoj, kiuj ricevis ĝin el la volofa (Etymonline: *Banana* 2025). Ĉio cetera ne kongruas kun la fenomenoj de Esperanto. Ekzemple, por nia artikolo *la* ekzistas dek difinaj artikoloj postmetitaj kaj malsamaj laŭ la speco de vortoj: pruntovortoj el la franca aŭ aliaj lingvoj uzas *bi*: *butik-bi* (la vendejo), *xarit-bi* (la amiko), dum certaj substantivoj, i.a. islamaj religiaj, uzas *-ji*: *Jumma-Ji* (la moskeo), *jigéen-ji* (la knabino), sed la pluralo uzas *-yi*: *jigéen-yi* (la knabinoj), *butik-yi* (la vendejoj).

Ni jam diris ke la volofa ne havas tonojn, sed ĝi kompensas tion per longaj kaj mallongaj vokaloj kaj konsonantoj kaj per vokala harmonio. Krome la verba konjugacio bazita sur la pronomoj estas simila al tiu de la haŭsa. Por doni ideon pri la sistemo, ni imitu ĝin per esperantaj morfemoj. Tiel *ni ne irus* iĝus en la volofa *nineus ir*, kaj *vi manĝas* estus *vas manĝ*.

Lasta apartaĵo: la nombrad-sistemo havas du bazojn, 5 kaj 10, pro kio 16 iĝas *dek kaj kvin kaj unu*.

La fonua (fɔ̃ngbè)

Alia lingvo en la sama parto de Afriko, kie tradicie estis multaj esperantistoj, estas la fonua, stabiliĝinta nomo en Esperanto por la propra nomo (fɔ̃ngbè), kutime simpligata je *Fon* en eŭropaj lingvoj. Ĝi apartenas al la grupo Gbe en la pli larĝa grupo de la atlanta-konga familio. Ĝi estas unuavice parolata en Benino, sed ankaŭ en Niĝerio kaj Togolando de ĉirkaŭ 3 milionoj da parolantoj (Fon 2025). Kiel la aliaj lingvoj Gbe, la fonua estas izola lingvo kun baza vort-ordo SVO, subjekto, verbo, objekto.

Ĝiaj apartaĵoj estas similaj al tiuj de aliaj lingvoj de tiu grupo jam viditaj, kvankam nazaj vokaloj prenas la lokon de longaj vokaloj. Krome la bazaj tonoj estas du: alta, malalta, sed en la vortoj ili kombiniĝas tiel ke oni povas

trovi sinsekvojn alta/alta, alta/malalta, ktp. kaj kiel en la haŭsa la sinsekvo de tonoj en la frazoj havas signifon.

5 Konkludo aŭ prefere pravigo pri ĉi tiu artikolo

Oni nun rajtas sin demandi, kiu estas la celo de ĉi tiu listigo de okcidentafrikaj lingvoj kaj de ties apartaj trajtoj. Tiu listigo volas reliefigi la absolutan malsamecon inter tiuj lingvoj kaj Esperanto. Estas historia fakto, ke la esperantigo de okcidentafrikaj landoj okazis per la koloniaj lingvoj, kiuj estis tiam kaj ankoraŭ nun la lingvoj instruataj en la lernejo kaj do konataj de kleraj afrikanoj, kiuj povus interesiĝi pri Esperanto. Tio estis periodo, kiam afrikaj infanoj estis devigataj citi el francaj lernolibroj frazojn senrilatajn al iliaj vivoj, kiel “Niaj antaŭuloj, la gaŭloj”, kaj nenio alia estis ebla (Binet 1967). Sed nun 70 jarojn post la rekomendo de Unesko ankaŭ tiuj afrikaj lingvoj trovas ĉiam pli da spaco en lernejoj kaj baldaŭ ni estos devigataj uzi ilin por instrui Esperanton. Kaj por vere komprenigi la sistemon de Esperanto, oni devos klarigi kiel malmunti la sistemon de la lokaj lingvoj kaj transiri al la sistemo de Esperanto, pli simpla sed malsama, kaj tion devos unuvice kompreni la lokaj instruistoj. Por povi fari tion oni bezonas la komparan laboron faritan por la suahila kaj tio estas tasko de esperantistaj lingvistoj kunlabore kun lokaj esperantistoj parolantaj tiujn lingvojn.

Alia instigo verki ĉi tiun artikolo fakte venis de mia partopreno pri la redaktado de verko ankoraŭ eldonota por klarigi la lingvon fonuan al esperantistoj (Gbadamassi, aperos). La verkinto estas esperantisto el Benino, parolanto de la fonua, kaj instruisto en beninaj lernejoj, plena konanto de la franca kaj de ĝia gramatiko. Nun, en tiu pionira laboro estis klare, ke la tuta gramatika armilaro de la franca, simila al tiu de Esperanto, estas komplete neutila por klarigi la fonuan. Sama ĵonglado necesos por komprenigi al parolanto de unu el tiuj lingvoj, kiel funkcias Esperanto.

Bibliografio

- Almansa-Villatoro, M. Victoria kaj Silvia Štubňová Nigrelli. 2023. “Comparative Afroasiatic Linguistics and the Place of Ancient Egyptian within the Phylum.” *En Ancient Egyptian and Afroasiatic: Rethinking the Origins*, redaktis M. Victoria Almansa-Villatoro kaj Silvia Štubňová Nigrelli. University Park: Eisenbrauns / Penn State University.
- Baldi, Sergio. 2008. *Dictionnaire des emprunts arabes dans les langues de l’Afrique de l’Ouest et en swahili*. Paris: Éditions Karthala.
- Baldi, Sergio. 2015. *Dizionario hausa: Hausa-italiano, italiano-hausa*. Milano: Hoepli.

- Baldi, Sergio. 2024. *Vortaro haŭsa-esperanto kaj esperanto-haŭsa*. New York: Mondial.
- “Baldi, Sergio.” 2025. *Orcid*. <https://orcid.org/0000-0003-4099-1497> (15.04.2025)
- “Banana.” 2025. *Etymonline*. <https://www.etymonline.com/word/banana> (15.04.2025)
- Binet, Jacques. 1967. “L’Histoire africaine et nos ancêtres les gaulois.” *Outre-Mers. Revue d’histoire* 54, kajeroj 194–197: 209–218. https://www.persee.fr/docAsPDF/outre_0300-9513_1967_num_54_194_1449.pdf (15.04.2025)
- Emenanjo, Nolue. 1978. *Elements of Modern Igbo Grammar – a descriptive approach*. Ibadan: Oxford University Press.
- “Fon.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/fon/> (17.04.2025)
- “Friday prayer.” 2025. *Wikipedia*. https://en.wikipedia.org/wiki/Friday_prayer (17.04.2025)
- Gbadamassi, Latifu. Aperos. *La fongbea en 12 lecionoj por esperanto-parolantoj*.
- Goes, Heidi. 2007. *Afero de espero – Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- “Hausa.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/hau/> (15.04.2025)
- [IFEF] Institut de la Francophonie pour l’éducation et la formation. 2024. Enseignement bi-plurilingue. <https://ifef.francophonie.org/elan/> (03.04.2025)
- “Igbo.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/ibo/> (15.04.2025)
- Knappert, Jan. 1996. *Vortaro Esperanto-Suahila / Kamusi Kiesperanto Kiswahili*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Kraft, Charles kaj A. H. M. Kirk-Greene. 1973. *Teach Yourself Hausa*. London: Hodder and Stoughton.
- Muhire, Joel. 2024. *Kiesperanto Kwetu – Kitabu cha kujifunza Kiesperanto*. Arusha: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).
- [OIF] Organisation internationale de la Francophonie. 2025. <https://www.francophonie.org>
- Sekelj, Tibor. 1962a. *The International Language Esperanto. Common Language for Africa. Common Language for the World*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Sekelj, Tibor. 1962b. *La langue internationale Espéranto. La langue commune pour l’Afrique. La langue commune pour le monde entier*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Sekelj, Tibor. 1962c. *Al-lugha al-dualiyya al-isbirantiyya. Lugha al-’alam adjma’*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

- “Svahila lingvo.” *Vikipedio*. https://eo.wikipedia.org/wiki/Svahila_lingvo (17.04.2025)
- Topan, Farok kaj Ebrahim Husein. 1984. *Salale!* Pisa: edistudio.
- [UEA / TEJO] [Universala Esperanto-Asocio / Tutmonda Esperantista Junulara Organizo]. 1979. *Kwa kulinda tamaduni za afrika*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- UNESCO. 1953. *The Use of Vernacular Languages in Education*. Paris: UNESCO. https://www.tolerancia.org/upimages/Manifiestos/unesco_1953_english.pdf (01.10.2025)
- Vessella, Nino. 1980. *Skizo de sūahila metriko*. Bellinzona: Hans Dubois.
- Vessella, Nino. 1982. *Jifunze lugha ya Kiesperanto*. Latina: la aŭtoro.
- Vessella, Nino. 2024. *Sūahilaj studoj*. Baraka: Université Espoir du Congo, Faculté des Langues.
- “Wolof language.” 2025. *Britannica*. <https://www.britannica.com/topic/Wolof-language> (15.04.2025)
- [World Bank]. 2021. *Loud and Clear: Effective Language of Instruction Policies for Learning*. International Bank for Reconstruction and Development / The World Bank. <https://documents1.worldbank.org/curated/en/517851626203470278/pdf/Loud-and-Clear-Effective-Language-of-Instruction-Policies-For-Learning.pdf> (03.04.2025)
- “Yoruba.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/yor/> (15.04.2025)

Pri la aŭtoro

Renato Corsetti estis veterana esperantisto, kiu interesiĝis pri multaj aspektoj de la movado por la internacia lingvo Esperanto, interalie pri disvastiĝo de Esperanto en Afriko. Lia lasta profesia posteno estis profesoro pri psiĥolingvistiko en la Universitato de Romo “La Sapienza”.

About the author

Renato Corsetti was a veteran Esperantist who was interested in many aspects of the movement for the international language Esperanto, including the development of Esperanto in Africa. His last professional position was professor of psycholinguistics at the University of Rome “La Sapienza”.

Sull'autore

Renato Corsetti è stato un veterano esperantista interessato a molti aspetti del movimento per la lingua internazionale esperanto, tra cui la diffusione

dell'esperanto in Africa. È stato professore di psicolinguistica all'Università di Roma "La Sapienza".

Esperantists face to face with the African Languages

Summary: Esperanto is spreading very fast now in Africa and enthusiasm for it currently exceeds that of other continents. In the meantime, the linguistic situation in Africa is beginning to change in favour of using local languages in West Africa. There are a few main reasons for this, which can be summarised by a change in the policy of the World Bank, which for decades only gave loans to developing countries on condition that they teach major international languages. For this reason African languages are now being used more and more in education, and therefore the movement needs the same comparative studies that have already been done in the past decades on Swahili, if we really want to produce effective teaching material about Esperanto in African languages.

Keywords: Esperanto, Hausa, Niger-Congo languages, Swahili

Esperantisti avanti le lingue africane

Riassunto: L'esperanto si sta diffondendo molto velocemente in Africa e l'entusiasmo per esso supera quello degli altri continenti. Nel frattempo la situazione linguistica in Africa comincia a cambiare a favore dell'utilizzo delle lingue locali anche nell'Africa occidentale. Ci sono alcune ragioni principali che possono essere riassunte in un cambiamento nella politica della Banca Mondiale, che per decenni ha concesso prestiti ai paesi in via di sviluppo solo a condizione che insegnassero le principali lingue internazionali. Da ciò ne consegue che le lingue africane vengono utilizzate sempre di più nell'istruzione e quindi il nostro movimento ha bisogno degli stessi studi comparativi che sono già stati fatti negli ultimi decenni sullo swahili, se vogliamo davvero produrre materiale didattico efficace sull'esperanto in lingue africane.

Parole chiave: Esperanto, Hausa, lingue Niger-Congo, Swahili

Ilona Koutny

Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando

La rolo de István Szerdahelyi en interlingvistiko kaj esperantologio

Resumo: István Szerdahelyi instituciigis la universitatan instruadon de interlingvistiko kaj esperantologio – tio jam donus al li decan rolon en la historio de esperantologio. Sed li estis ankaŭ elstara interlingvisto, esperantologo kaj pedagogo. La artikolo skizas liajn plej gravajn atingojn en la tereno de interlingvistiko (loko kaj sistema prezento de la tereno, hungaraj planlingvoj) kaj esperantologio (nova, lingvistika aliro al morfemklasifiko, strukturaj trajtoj de Esperanto, komenco de la neglektita semantika esploro de Esperanto, sistema prezento de etimologiaj operacioj).

Ŝlosilvortoj: esperantologio; etimologio; interlingvistiko; morfemklasifiko; semantiko; sintakso

1 Enkonduko

La 100-jara jubileo de István Szerdahelyi (1924–1987) motivas la rememoron kaj trarigardon de lia rolo en interlingvistiko kaj esperantologio kies grava figuro li estas. Oni povas trovi lin inter la 200 eminentaj esperantistoj en *Nia diligenta kolegaro* (Gorecka kaj Korĵenkov 2018). Post iuj ŝtormaj eventoj en la historio de Hungario (2a mondmilito, revolucio en 1956) kaj influo al lia vivo, li dediĉis sin al la instruado kaj esplorado de tiuj ĉi terenoj kaj enkondukis ilin kadre de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE) ekde 1966. Pri lia rolo kiel ĝisosta instruisto vd. la artikolon Koutny (2024b), pri vivovojo Koutny (2009b).

Li aliris al la studo de Esperanto kaj planlingvoj kiel lingvisto, esploris ilian lokon inter aliaj lingvoj per lingvistikaj metodoj. Tiu aliro kaŭzis akrajn konfliktojn kun la tradicia gramatika aliro de esperantistoj, kun la Akademio de Esperanto (AdE) kaj la tiama hungara korifeo Kálmán Kalocsay (diskuto en *Literatura Foiro*), krome averaĝaj esperantistoj ne vidis sencon en la scienca esploro de Esperanto. Li ofte emfazis ke Esperanto estas ne nur amuzaĵo de ĝiaj adeptoj, sed ĝi devas solvi gravan komunikan problemon, por tio necesas ĝin prezenti en fakaj rondoj, krei ĝian sciencan priskribon (*Pri la lingvistika priskribo de Esperanto*, Szerdahelyi 1979b), necesas enkonduki Esperanton en la establitan normalan mondon, ne teni ĝin en iu ekstera Esperantujo (Szerdahelyi 1976a).

Aliflanke, lingvistoj malrespektis la “artefaritan lingvon”, konsideris la okupiĝon pri ĝi ne scienca afero. Li batalis dum sia tuta vivo por akceptigi Esperanton en lingvistikaj rondoj kaj por akceptigi ĝian sciencon traktadon inter esperantistoj. Intertempe la situacio iom ŝanĝiĝis en la bona direkto, dank’al la agado de Detlev Blanke (2003 entenas grandan nombron de fakaj verkoj) kaj aliaj interlingvistoj, esperantologoj.

Tamen, fine de sia vivo Szerdahelyi iĝis membro de AdE (en 1986) kaj honora membro de UEA, prezidanto de ILEI (1985–1987). Ankaŭ kun la Hungara Esperanto-Asocio li trovis kunlaboreblon pri la ekzamenoj. Li verkis la metodikan parton de la *Gvidlibro por superaj ekzamenoj* (Pechán 1966).

Li prelegis multe en Hungario kaj eksterlande, kunlaboris kun prof. Helmar Frank el la Kibernetika Instituto en Paderborn, kun Claude Gacond el la Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds kaj la Internacia Kultura Centro (IKS) el Zagrebo.

Szerdahelyi plenumis enorman laboron, li verkis sciencajn studojn en diversaj terenoj de interlingvistiko kaj esperantologio por montri la valoron de Esperanto kaj la lokon de planlingvoj en la scienca paletro, kaj havi studmaterialojn por la Esperanto-fako de ELTE. Li kompilis ankaŭ 3-voluman literaturan krestomation, pretigis lernolibrojn por diversaj niveloj kaj gvidis la leksikografian laboron por la Hungara-Esperanta mezvortaro (kiun mi finis kaj aperis fine nur en 1996).

Li vivis antaŭ la reta epoko, pro tio lia verkaro ne estas tiom konata kiom ĝi meritis, krome parto de liaj artikoloj kaj libroj aperis hungare, tiel por la plimulto de esperantistoj ne alireblas. Tio instigis min kunmeti modestan libron el kelkaj liaj artikoloj (Szerdahelyi 2024). Liaj tuta bibliografio kaj biografio troviĝas en la memorlibro dediĉita al li, *Abunda fonto* (red. Koutny 2009) dank’al Zsuzsa Tötösné Gados kaj Árpád Máthé.

Szerdahelyi estis multflanka sciencisto, precizema filologo kaj praktika mobilizanto, organizanto de instruado de Esperanto en diversaj niveloj, bona preleganto kaj aldone tre agrabla persono kiu trovis vojon al ĉiuj, ankaŭ pri siaj gestudentoj zorgis kvazaŭ patro. En la sekvoj lia interlingvistika kaj esperantologia agado estos analizata.

2 Interlingvistiko

La tereno de interlingvistiko estis kaj estas ofte diskutata, ĝi iĝas pli kaj pli larĝa, envolvante ne nur planlingvojn (t.e. planlingvistiko – aliro de Sakaguchi 1998), sed ankaŭ etnajn internacajn lingvojn, piĝinojn kaj kreolajn, lingvojn kreitajn por literaturo kaj filmoj (vd. Schubert 1989, 2024; Blanke 1998/2006; Barandovská-Frank 2020; Gobbo 2023). Same la loko kaj enhavo de esperantologio varias. Ĉu ĝi estas lingvistika branĉo aŭ pli, ja ĝi

okupiĝas ankaŭ pri la kultura kaj movada flankoj de Esperanto. Lindstedt (2024) jam konsideras esperantologion sendependa de interlingvistiko.

Szerdahelyi lokis esperantologion en interlingvistikon kaj difinis la lokon de **interlingvistiko kadre de la aplikata lingvistiko**, en ĝian heterolingvan parton kune kun instruado de fremdaj lingvoj kaj tradukado (en sia *Enkonduko en interlingvistikon* 1979, kun abunda bibliografio, ankaŭ en Szerdahelyi 1980, 2024), tiel li ligis ĝin al la lingvistika mondo. Jen lia skemo (bildo 1).




Bildo 1: Loko de interlingvistiko kaj esperantologio laŭ Szerdahelyi 1979a

Trakti interlingvistikon en rilato kun lingvopolitiko kaj -planado estis tiam nova aliro, nuntempe plene akceptata. Li verkis ampleksan hungarlingvan universitatan lernolibron pri interlingvistiko (1980) kaj ankaŭ pri aplikata lingvistiko (1985). Li formulis la problemaron de interlingvistiko, la internacian komunikadon kaj prezentis la historiajn interlingvojn etnajn kaj planitajn jam en sia hungarlingva sciencpopulariga verko *Bábelről a világnyelvig* (Szerdahelyi 1977, 'De Babelo ĝis la mondlingvo'). Iu el tiuj verkoj aŭ iu eĉ pli ampleksa devis ekzisti en esperanta versio, kiu malaperis ĉe iu esperantista eldonejo; mi ne sukcesis ĝin retrovi post lia morto, en la 90-aj jaroj. Li menciis la antaŭmendeblan duvoluman verkon (po 500 paĝoj!) *Interlingvistiko historia kaj kompara* en *Internacia Pedagogia Revuo* (anonco IPR (3) 1979, 70). D-ro Szerdahelyi laboris ankaŭ pri disertaĵo pri interlingvistiko,

same en la hungara, kiun li ne povis fini pro pli urĝaj konkretaj taskoj, kiel la vortaro. Ankaŭ tiu ĉi ne atingis publikigon, ja ekzistas nur notoj pri tio.

Interlingvistiko okupiĝas pri interlingvoj kiuj povas esti naturaj aŭ planitaj. Li jene sistemigis ilin, konsiderante jam ankaŭ la maŝinajn lingvojn (bildo 2).



Bildo 2: Klasifiko de interlingvoj laŭ Szerdahelyi

Li esploris diversajn planlingvojn, inter ili ankaŭ *hungarajn lingvoplanojn* kiel Homapar de József Fazekas, la filozofian universalan lingvon de György Kalmár, Romanid, pripensojn de la fama hungara matematikisto János Bolyai pri la ideala lingvo (Szerdahelyi 1980) kaj instigis siajn studentojn pri plua laborado. Tiel mi esploris la notojn de Bolyai por mia diplomlaboraĵo pri famaj matematikistoj kaj la lingvomodeligo (Koutny 1977). En la hungara libro pri interlingvistiko li dediĉas ĉapitron al la hungara modelo de lingvoplanado kiun li dividas al tri periodoj. Tio komenciĝis en la 18a jarcento kiam la latina komencis perdi sian rolon kaj oni volis eviti la uzon de la germana lingvo. La hungara lingvo estas sufiĉe izolita, tiel aperis la neceso de iu komuna lingvo.

Kiel duan periodon Szerdahelyi mencias ankaŭ la hungaran lingvonovigan movadon en la 19a jc. kiam miloj da vortoj estis kreitaj por modernigi la hungaran lingvon, la agado de Ferenc Kazinczy estas konata kaj la rezulto de la homa interveno ankaŭ nuntempe parte restas en la hungara lingvo. Do, li montras ke “artefariteco” estas parto de homaj lingvoj. Li traktis ankaŭ la komencojn de la hungara Esperanto-movado kun Gábor Bálint ĝis Géza Bárczy.

Szerdahelyi kontribuis al tio ke interlingvistiko nuntempe estas bone establita scienca tereno kun teorio, esploroj, publikaĵoj kaj konferencoj kiel la ĉiujara germana konferenco de la germana Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, ‘Societo pri Interlingvistiko’). La pli larĝa aliro al interlingvistiko estas vaste akceptata de interlingvistoj kiel Detlev Blanke, Aleksandr Duliĉenko,

Mark Fettes, Sabine Fiedler, Sergej Kuznecov, Liu Haitao, Klaus Schubert, Humphrey Tonkin, t.e. la problemo de internacia komunikado estas solv-ebla per etnaj lingvoj, kreoloj kaj planlingvoj.

3 Esperantologio

Koncerne esperantologion Szerdahelyi reprezentis novan aliron el pluraj vidpunktoj surbaze de la tiama moderna lingvistiko kaj esploris plurajn terenojn de morfemiko tra semantiko ĝis etimologio. Nur la plej gravaj ideoj estos citataj.

3.1 Morfemiko

La morfema sistemo de Esperanto kaj la vortfarado, la fifama *radikkaraktero* delonge estas centra problemo de esperanta gramatiko, ja tio influas la vortformadon. Kial necesas aldoni *-il* por formi ilon el *komb-* kaj ĉe *bros-sufiĉas* la finaĵo *-o*? René de Saussure (1910) ellaboris teorion kiun la Akademio akceptis. Ankaŭ la *Plena Gramatiko* (Kalocsay kaj Waringhien 1935) bazas sian vortfaradon sur tion. Multaj subtenis kaj pluraj kritikis tiun teorion. La problemo estas aktuala – tion montras ke en 2022 aperis la libro de Rokicki: *Enkonduko en la morfologion de Esperanto* kaj en 2024 la libro de Jansen: *Vortfarado en Esperanto*. Malgraŭ la evidentaj problemoj, kritikoj ankaŭ de aliaj esperantologoj, eĉ de akademianoj kiel Michel Duc Goninaz (2009), AdE ĝis hodiaŭ ne reviziis sian aliron. Szerdahelyi kontraŭis la oficialan opinion de la Akademio de Esperanto pri la gramatika karaktero de la radikoj, konfliktante ankaŭ kun la tiama korifeo Kalocsay. Liaj argumentoj aperis en la *Literatura Foiro*, poste en lia baza broŝuro *Vorto kaj vortelementoj* (1976a, 2024).

En la *Unua libro* (Zamenhof 1887) aperis nur listo de radikoj kun alilingvaj tradukoj en formo de vortoj, same en la *Fundamento* (Zamenhof 1905), kio subtenis la supozon ke la radikoj havas verban, substantivan aŭ adjektivan karakteron. Tiel al ĉiuj radikoj – finaĵbezonaĵoj aŭ memstaraj – kaj ankaŭ al deriviloj kaj finaĵoj, verba, substantiva aŭ adjektiva karaktero estis asignita. Fakte, tio influis ankaŭ la praktikon en la esperantaj vortaroj (kiel PIV: Waringhien ĉefred. 1970), kie la kapvortoj estas en verba, substantiva aŭ adjektiva formoj kaj ene de la vortartikolo aperas la aliaj formoj simplaj kaj derivitaj.

Szerdahelyi unue klarigas la konfuzon kiun kaŭzas la uzo de “vorto” far Zamenhof por ĉiuj vortelementoj (kiuj poste nomiĝis morfemoj) inklude leksikajn kaj ankaŭ finaĵojn. Vorto havas semantikan enhavon kaj gramatikan funkcion en frazo, tiel en TABLO *tabl-* portas la signifon kaj *o*


ebligas ĝian rolon en la lingva sistemo. Vortospecon kiel verbo, substantivo kaj adjektivo povas havi nur vorto kaj ne morfemo, do la radikoj ne povas havi gramatikan karakteron, temas pri semantika eco. Tamen la radikoj pli volonte vortiĝas en unu aŭ alia vortospeco: *tabl-* en *tablo*, *leg-* en *legi* kaj *bel-* en *bela*, kio influas ilian postan funkciadon. Li uzas la terminon *primara vorto* por tio kaj lasas la eblecon vortiĝi en aliaj kategorioj.

Li ne provis difini semantikajn kategoriojn por la radikoj, tion nur nun, post 50 jaroj faris Jansen (2024). Estas interesa ankaŭ la analizo de Jansen pri *La neĝa blovado*, kiom ofte certaj semantikaj kategorioj (kiujn li difinis) realiĝas en specifaj vortospecoj. Tio videble subtenas la aliron de Szerdahelyi paroli pri primaraj vortoj. Fakte, ankaŭ kaze de vortaroj estas pli bone paroli pri primaraj vortoj.

La gramatika karaktero ĉiukaze ne solvas la diferencojn en vortformado inter samkarateraj radikoj. Kial *biologo* kaj *fizikisto*? – la signifero profesio enestas en la unua vorto kaj en la alia ne – kiel tion bone klarigas Duc Goni-naz (2009). Eblas aldoni ankaŭ la diferencon en la transitiveco de verboj kiu estas karakterizo de iuj verboj, aliaj bezonas la sufikson *-ig* por iĝi tia: *montri*, sed *aperigi* aŭ simile por la netransitiveco: *evolui*, sed *disvolviĝi*. Entute samaj nocioj povas vortiĝi en diversaj lingvoj en malsamaj vortospecoj (Koutny 2013).

Szerdahelyi klarigas la diferencon inter la radikoj per la fakto ke Zamenhof **transprenis el la fontolingvoj vortojn** kaj nur en la sekva operacio li ekstraktis la radikojn. Tiel *broso* en la germana, franca, pola, rusa estas baze substantivoj el kiuj estas formitaj la verboj. Se ni serĉas la originon de *kombi* kaj *kombilo*, ni trovas malsamajn vortojn en la pola kaj rusa. Ankaŭ en la kazo de *hoko* kaj *hakilo*. Por *broso*, *brosi* kaj *hoko*, *pendigi* la radiko en la pola estas la sama, sed por la duaj malsamaj, tie Zamenhof elektis la verbon kaj el tio derivis la ilon. Tio subtenas ankaŭ tiun observon de Szerdahelyi ke la signifo de la vortoj transprenitaj el la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj montras *slavan influon*. Neniu povas eskapi de certa influo de sia gepatra lingvo.

Szerdahelyi montras la konfuzon kaj arbitrajn klasigojn en la Aktoj de la Akademio (1968) kie ĉiuj deriviloj, prepozicioj, eĉ interjekcioj devige ricevas sian O, A au I asignon. Ekz. *-ad* estas deklarita O-kategorio (pro la funkcio en *broso* > *brosi* > *brosado*), sed ĝi same havas verban uzon por krei durativan (pomenadi) kaj iterativan (saltadi) funkcion por la verboj. Ek- estas A-kategorio, kvankam ĝi kreas komencan verbon (*eklabori*). Anstataŭ la kritikebla sistemigo de la Akademio, Szerdahelyi (1972, 1976a) proponas pli simplan kaj efikan sistemigon de la morfemoj (bildo 3) kiu pli konsideras la originan sistemigon de Zamenhof (tion daŭrigas poste ankaŭ Gledhill 2000).



Bildo 3: Klasifiko de morfemaro laŭ Szerdahelyi

3.2 Sintakso

La frazstrukturo en Esperanto bone travideblas pro la klaraj vortofinaĵoj, la uzo de akuzativo (kazofinaĵo *-n*) por la rekta objekto kaj pro la prepozicioj por aliaj sintaksaj rilatoj. La agordo inter la epiteto kaj substantivo estas ofta en eŭropaj lingvoj, ankaŭ la uzo de pluralo post numeraloj estas kutima. Pro la prepozicioj, la agordo, la pluralo kaj ankaŭ la ofta vortordo SVO (kiun Gledhill 2000 kaj Jansen 2008 esploris) Szerdahelyi (1972) konsideris Esperanton kiel *minimuman hind-eŭropan lingvomodelon*. Tio donas ĝian gravan propedeŭtikan rolon por la lernado de aliaj eŭropaj lingvoj kaze de hungaroj en kies lingvo tiuj fenomenoj mankas. Tiu modela kaj lernfaciliga valoro de Esperanto validas ankaŭ por azianoj.

La lernolibro pri Esperanto por universitata uzo (Szerdahelyi 1972) krom la leksika enhavo entenas la gramatikan strukturon de Esperanto laŭ strukturisma maniero.

3.3 Semantiko kaj etimologio

La semantika flanko de Esperanto longe estis neglektita, la radikoj estis difinitaj per siaj tradukoj en la lingvojn rusa, pola, germana, franca kaj angla, komence en la Unua Libro (Zamenhof 1887) kaj ankaŭ en la *Fundamento* (Zamenhof 1905). Tamen tiuj lingvoj diferencas inter si koncerne la signifojn de tiuj ĉi vortoj! La *Plena Vortaro de Esperanto* (PV, Grosjean-Maupin 1930) estis la unua signifa unulingva vortaro kun difinoj. La Akademio de Esper-

anto aperigis la signifojn de la oficialigotaj vortoj nur ekde la 9-a aldono, kvankam vortoj sen signifoj ne estas ĝuste uzablaj.

Szerdahelyi vortigis siajn pensojn pri esperanta semantiko en siaj artikoloj (1976, 1981). Laŭ li, Zamenhof ne kreis novan semantikan modelon, sed li elektis el la semantikaj modeloj de la fontolingvoj: rusa, pola, germana, franca, angla, latina, greka, hebrea kaj jida. Szerdahelyi trafte konstatis ke nur tiam ni povas paroli pri aŭtonoma lingva sistemo se la vortoj pludivivas sian vivon en la nova sistemo. Li analizis la signifojn de diversaj esperantaj vortoj kaj komparis ilin kun la signifoj en aliaj lingvoj (Szerdahelyi 1976b) (vd. Bildon 4).

	E	R	Hu	A	F	G
1. konstruaĵo	X	X	X	X	X	X
2. mastrumado		X	X	X	X	X
3. familiano	X	X	X	X	X	X
4. hejmo, loĝejo	X	X	X	X	X	X
5. gento					X	X
6. firmao			X		X	X
7. instituto	X	X			X	
8. hotelo						X
9. publiko (ekz. teatra)			X	X		X
10. parlamento			X	X		X
11. dinastio		X	X	X	X	X
12. ujo, ingo			X			X
13. ulo						X
14. servistaro					X	
15. preĝejo				X		
16. scienca faktermino	X				X	
Entute	5	6	9	8	10	12

Bildo 4: La komponentoj de sememo DOM

La signifo de esperantaj vortoj estas pli limigita, restas tio kio aperas en pluraj lingvoj – kiel ankaŭ kaze de DOMo, la morfemo komencas sian novan vivon en la nova sistemo, perdas iujn signifojn kiuj estis en la fontolingvoj, sed povas akiri novajn. En Esperanto ekzistas la diferenco inter *domo* kaj *hejmo* kiu ne aperas en la slavaj lingvoj, sed ja en la angla, cetere ankaŭ en la hungara.

Tio gvidas Szerdahelyi al la **etimologio de la esperantaj vortoj**, kiuj estas pruntvortoj krom la tabelvortoj. Li prezentas sisteman kaj detalan analizon

de la esperantaj vortoj (*Principoj de Esperanta etimologio*, Szerdahelyi 1987a, 2024), komencante per la *interonomoj/internaciismoj* grek-latindevenaj kiuj aperas en la fontolingvoj de Esperanto (latina, franca, germana, rusa, pola, ankaŭ itala kaj angla) kaj konsistigas la 40%-ojn de la *Universala Vortaro*, poste sekvas la unu-, duetimaj vortoj. Li analizas la vortojn el grafika, fonemika kaj semantika vidpunktoj.

Li montras ankaŭ la nekonsekvencajn procedojn de Zamenhof en la elekto de la esperanta leksiko, t.e. eĉ ene de la sama semantika kampo estas vortoj el diversaj fontolingvoj (por la esprimo de tempo *minuto*, *horo*, *tago*, *semajno*, *monato*, *jaro* estas uzataj parte latinid- kaj parte ĝerman-devenaj vortoj, aŭ kaze de *hierau*, *hodiau*, *morgau*, ĉiuj devenantaj el malsamaj lingvoj), la transprenojn laŭ diversaj metodoj, foje laŭ la skriba, foje laŭ la prononco. Li listigas ankaŭ la procedojn de Zamenhof por eviti la plursignifecon de vortoj per ilia dissplitigo (F conduire > *konduki*, *konduiti*) kaj la ŝanĝojn por ke vorta parto ne koincidu kun afikso (defin- > *difini*, ricev- > *ricevi*, ekesto de *vipuro*, *bufedo*), redukton de silabonombro (incline > *klini*) kie li rimarkas similecon al kreolaj lingvoj. Li mencias fine ke li prezentis nur la formalan flankon de etimologio, necesus alia studo pri la semantika flanko.

Kvankam Zamenhof elektis laŭ la principo de internacieco de la lingvoj DEFIRS la formon, kapteblas ankaŭ la slava influo en la signifoj de latinid-devenaj vortoj surbaze de konkretaj analizoj (*plena vortaro* povas ekzisti en la rusa: *polnij slovar'*, sed ne en la franca, cetere vortaro neniam povas esti plena) – rimarkas Szerdahelyi, li ja estis ankaŭ slavisto. Pri la jida influo (Piron 1984) li ne okupiĝis. Post lia morto publikiĝis lia artikolo pri *La Etimologio de gramatikaj elementoj* (1997).

Waringhien (1959), Back (1980), Gold (1980) kaj aliaj jam tuŝis la problemon de etimologio, Szerdahelyi profunde analizis kaj grupigis la vortokreon de Zamenhof en sia studo. Poste sekvis la *Etimologia Vortaro* de Ebbe Vilborg en 5 volumoj (1989–2001) kaj la analizoj kaj vortaro de Cherpillot (2003).

3.4 Etapoj de Esperanto

En 1987, antaŭ sia morto, Szerdahelyi ankoraŭ pretigis resumon por Universala Kongreso pri la tri etapoj de nia lingvo kiun Rokicki (2009, 29) trafe nomis lia *esperantologia testamento*.

- **1a etapo: de la komencoj ĝis 1920** kiu produktas la unuan *Fundamenton* kun la *Universala Vortaro*;¹

1 Universala Vortaro de Zamenhof en 1894 aperis kiel aparta libro kaj poste fariĝis parto de la *Fundamento* (Zamenhof 1905).

- **2a etapo: de 1920 ĝis 60-aj jaroj** kiu fiksas la duan fundamenton kun la *Literatura Mondo*, *Plena Vortaro* kaj *Plena Gramatiko*;²
- **3a etapo: ekde la 60-aj jaroj** kiam jam eblas paroli pri scienca esperantologio pro la esploroj, apero de *Plena Ilustrita Vortaro*, sed ankoraŭ mankas lingvistika priskribo de Esperanto.³

Pli detaligita divido troveblas en Koutny (2018), jam konsiderante la nunan epokon, entute 5 periodojn de projekto ĝis natura lingvo. Kaj nun? La konciza *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* de Wells (1978) kaj la anglalingva verko de Gledhill (2000) bazita sur korpuso montras en tiu direkto. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) de Wennergren (2005/2020, sed daŭre aktualigata en la reto) estas ampleksa bone uzebla kaj grava didaktika gramatiko. Tamen la detala lingvistika priskribo de Esperanto estas ankoraŭ antaŭ ni.

Szerdahelyi prelegis dum siaj kursoj pri **Esperanta gramatiko** kaj verkis kelkajn artikolojn. Li planis verki sciencan gramatikon de Esperanto kies partoj estus: (a) grafiko kaj foniko; (b) morfemiko; (c) sintagmatiko; (d) sintakso kaj (e) tekst-gramatiko kaj stilistiko. La *Esperantologiaj kajeroj* – eldonitaj en ELTE – servis tiun celon por kiu li bonvenigis ankaŭ kolegojn kaj studentojn por kontribui. La unua kajero (1976) efektive plenumas tiun celon. Ĝi entenas artikolojn pri fonologio, leksikologio, formologio kaj singtagmatiko de diversaj aŭtoroj, i.a. lian *La Esperanta Morfemaro* (Szerdahelyi 1976b), kie jam aperas semantikaj-etimologiaj analizoj. En anonco en IPR (3) 1979 li mencias ankaŭ la aperontan *Skizon pri morfemiko de Esperanto*, sed tio neniam aperis. Laŭ mia scio, li verkis la volumon grafemiko en la fino de sia vivo, sed ankaŭ ĝi perdiĝis.

4 Konkludoj

István Szerdahelyi estas senkonteste grava figuro de interlingvistiko kaj esperantologio. Kiel fondinto de la Esperanto-fako kaj tiel instituciiganto de sistema instruado kaj esplorado de esperantologio kaj en vasta senco interlingvistiko en ELTE certigas al li unikan lokon.

- 2 *Literatura Mondo* estis revuo fondita de Kálmán Kalocsay, Julio Baghy kaj Theodor Schwartz (Tivadar Soros) kaj aperigita en Budapeŝto ekde 1922 kun plurjaraj interrompoj ĝis 1949. *Literatura Mondo* ankaŭ funkciis kiel eldonejo de libroj. *Plena Vortaro* (PV): Grosjean-Maupin (1930) kun pluraj postaj eldonoj. *Plena Gramatiko*: Kalocsay kaj Waringhien (1935), poste en du tralaboritaj kaj pliampleksigitaj eldonoj, ekde 1980 profunde reverkita sub la titolo *Plena analiza gramatiko de Esperanto* (PAG) plej laste (Kalocsay kaj Waringhien 1985).
- 3 *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV): Waringhien (ĉefred.) (1970), poste en du eldonoj reviziitaj sub kunordigo de Michel Duc Goninaz (2005) kaj de Michel Duc Goninaz kaj Klaŭdo Roux (2020). Nuntempe PIV disponeblas en reta versio vartata de Bertilo Wennergren (Waringhien ĉefred. 2020).

En la diskuto pri la enhavo kaj loko de interlingvistiko, li imagis ĝin ene de aplikata lingvistiko kaj montris ĝian rilaton kun lingvomodeligo kaj lingvopolitiko. Szerdahelyi prezentis sisteman aliron al interlingvistiko kaj speciale esploris la hungarajn lingvoprojektojn (universitata studlibro el 1980).

Li traktis ĉiujn lingvistikajn terenojn de esperantologio pro la bezono de la universitataj studoj kaj por prezenti iam sisteman lingvistikan priskribon de Esperanto. Kelkaj liaj konstatoj alportis novan lumon al Esperanto: la rifuzo de la gramatika karaktero de radikoj – valida ĝis nun en la Akademio de Esperanto – kaj turno de la atento al la semantika flanko de la internacia lingvo necesa por la memstara evoluo; li malkovris ke Zamenhof transprenis vortojn el la fontolingvoj kies vortkategorioj influis lin, la radikojn li poste ekstraktis. Li bone vidis la slavan influon por la signifo de la latinidaj vortoj.

Szerdahelyi prezentis sisteme la etimologiajn operaciojn en la kreo de la tiam jam 100-jara lingvo kion sekvis la *Etimologia Vortaro* de Ebbe Vilborg.

Bedaŭrinde, pro lia frua morto ne aperis la planitaj esperantlingvaj ampleksaj verkoj pri interlingvistiko kaj esperanta gramatiko, sed aperis la *Hungara-Esperanta meza vortaro*, kiun mi finis, kun ĉ. 65 mil leksikaj unuoj (Szerdahelyi kaj Koutny 1996). Minnaja skribis en sia recenzo pri *Abunda fonto*: “Se nun ni povas fieri, ke esperantologio estas scienco, tion ni ŝuldas grandparte al István Szerdahelyi.” (Minnaja 2010). Mi finas per la sama frazo kiel la antaŭparolon de la libro *Elektitaj artikoloj* (Szerdahelyi 2024): “... pluraj problemoj pri kiuj li okupiĝis ankoraŭ estas aktualaj. Necesas lia engaĝiĝo, laboremo kaj persisto por ke esperantologio kaj interlingvistiko atingu sian meritan pozicion en la mondo.” (Koutny 2024a, 9–10).

Bibliografio

- Akademio de Esperanto. 1968. *Aktoj de la Akademio 1963–1967*. Rotterdam: Akademio de Esperanto.
https://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1/Aktoj_de_la_Akademio_1963-1967.pdf (29.04.2025)
- Back, Otto. 1980. “Pri planlingva etimologio.” En *Miscellanea Interlinguistica*, redaktis István Szerdahelyi, 266–276. Budapeŝto: Tankönyvkiadó.
- Barandovská-Frank, Věra. 2020. *Interlingvistiko. Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj* (Interlingvistikaj Studoj/Studia Interlingwistyki 1). Poznań: Interlingvistikaj Studoj kaj Rys – http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Barandovska_Interlingvistiko_enkonduko.pdf (29.04.2025)
- Blanke, Detlev. 1998. “Interlinguistik und Plansprachen.” *Sitzungsberichte der Leibniz-Sozietät* 21: 45–76. – pliampleksigita versio: Detlev Blanke.

2006. "Zum Gegenstand der Interlinguistik." En Detlev Blanke: *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*, redaktis Sabine Fiedler. Frankfurt am Main: Peter Lang. 19–34.
- Blanke, Detlev. 2003. *Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al faka literaturo*. (Esperanto Dokumentoj 39E.) Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Cherpillot, André. 2003. *Konciza etimologia vortaro*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Duc Goninaz, Michel. 2009. "Szerdahelyi kaj la 'gramatika karaktero de la radikoj'." En *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al prof. István Szerdahelyi*, redaktis Ilona Koutny, 166–177. Poznań: ProDruk.
- Gledhill, Christopher. 2000. *The Grammar of Esperanto. A Corpus-based description* (Languages of the World / Materials 190). München: Lincom Europa.
- Gobbo, Federico. 2023. "Ses difinoj serĉantaj fakon." *Beletra Almanako* 17, kajero 46: 100–123.
- Gold, David L. 1980. "Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto." En *Miscellanea Interlinguistica*, redaktis István Szerdahelyi, 300–367. Budapeŝt: Tankönyvkiadó.
- Gorecka, Halina kaj Aleksander Korĵenkov. 2018. *Nia diligenta kolegaro. Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj*. Kaliningrado: Sezonoj kaj Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.
- Grosjean-Maupin, Émile. 1930. *Plena vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Jansen, Wim. 2008. *Naturaj vortordoj en Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Jansen, Wim. 2024. *Vortformado en Esperanto*. Rotterdam: Bero.
- Kalocsay, Kálmán kaj Gaston Waringhien. 1935. *Plena gramatiko de Esperanto*. Budapeŝt: Literatura Mondo.
- Kalocsay, Kálmán kaj Gaston Waringhien. 1985. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 5-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Koutny Ilona. 1977. *Grandaj matematikistoj kaj la lingvomodeligo*. Diplom-laboraĵo Budapeŝto. Universitato Eötvös Loránd.
- Koutny, Ilona, red. 2009a. *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al prof. István Szerdahelyi*. Poznań: ProDruk.
- Koutny, Ilona. 2009b. "Loke kaj fake, internacie kaj home. Prof. István Szerdahelyi (1924–1987)." *Internacia Pedagogia Revuo* kajero 3: 23–29.
- Koutny, Ilona. 2010. "István Szerdahelyi (1924–1987) und sein Wirken für die Interlinguistik." En *Die Rolle von Persönlichkeiten in der Geschichte der Plansprachen. Beiträge der 19. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 27.–29. November 2009, in Berlin* (Interlinguistische Informationen, Beiheft 17.), redaktis Sabine Fiedler, 81–92. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.

- http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/17/Koutny_81-92.pdf (24.02.2025)
- Koutny, Ilona. 2013. "Kiel niaj pensoj vortiĝas." En *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco*, redaktis Christer Kiselman kaj Mélanie Maradan, 35–48. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Koutny, Ilona. 2018. "De la planlingvo de Zamenhof ĝis nature disvolviĝanta lingvo: etapoj de la evoluo de esperanto." En *Ludwik Zamenhof okaze de la centa datreveno de la morto. Aktoj de la kunveno, Romo, 11. decembro 2017*, 89–98. Romo: Accademia Polacca Roma.
http://www.rzym.pan.pl/images/Conferenze_141_esperanto_ebook.pdf (24.02.2025)
- Koutny, Ilona. 2024a. "Antaŭparolo." En Szerdahelyi, István. *Elektitaj artikoloj* (Interlingvistikaj Studoj 4.), elektis, prilaboris kaj enkondukis Ilona Koutny, 7–10. Poznań: Interlingvistikaj Studoj kaj Rys.
<https://doi.org/10.48226/978-83-68006-44-5> (24.02.2025)
- Koutny, Ilona. 2024b. "István Szerdahelyi – ĝisosta pedagogo. Okaze de la 100-jara jubileo." *Internacia Pedagogia Revuo* kajero 4: 8–12.
- Lindstedt, Jouko. 2024. "Liberiĝi de interlingvistiko." *Esperantologio / Esperanto Studies* 13, nova serio 5: 54–66. <https://doi.org/10.59718/ees58914> (24.02.2025)
- Literatura Mondo*. 1922–1949. Revuo. Budapeŝto.
- Minnaja, Carlo. 2010. "Fonto vere abunda." *Literatura Foiro* kajero junio.
<http://retbutiko.be/eo/ero/afsz#Carlo%20Minnaja> (29.04.2025)
- Pechán, Alfonz, red. 1966. *Gvidlibro por supera ekzameno*. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio.
- Piron, Claude. 1984a. "Contribution à l'étude des apports du yiddish à l'espéranto." *Jewish Language Review* kajero 4: 15–29.
<http://claudepiron.free.fr/articlesenfrancais/yiddish.htm> (24.02.2025)
– traduko de Doron Modan: Claude Piron. 1984. "Kontribuajo al la studo pri la influoj de la jida sur Esperanton."
<https://me.in-berlin.de/~maxnet/esperanto/piron/jida.htm> (24.02.2025)
- Rokicki, Ryszard. 2009. "Esperantologia testamento." En *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al prof. István Szerdahelyi*, redaktios Ilona Koutny, 29. Poznań: ProDruk.
- Rokicki, Ryszard. 2022. *Enkoduko en la morfologion de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj kaj Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.
- Sakaguchi, Alicja. 1998. *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt am Main: Peter Lang.

- Saussure, René de. 1910. *La logika bazo de vortfarado en Esperanto*. Genève: Universala Esperantia Librejo.
- Schubert, Klaus. 1989. "Interlinguistics – Its Aims, Its Achievements, and Its Place in Language Science." En *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages* (Trends in Linguistics, Studies and Monographs 42.), redaktis Klaus Schubert kun Dan Maxwell, 7–44. Berlin kaj New York: Mouton de Gruyter.
<https://doi.org/10.1515/9783110886115.7> (24.02.2025)
- Schubert, Klaus. 2024. "Interlinguistik und Esperantologie: eine neue Bestandsaufnahme." En *Jahrbuch de Gesellschaft für Interlinguistik 2024*, redaktis Cyril Robert Brosch kaj Sabine Fiedler, 109–122. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag.
<https://media.interlinguistik-gil.de/beihefte/JGI2024/JGI2024.pdf> (20.11.2024)
- Szerdahelyi, István. 1972. *Eszperantó. Bevezetés és nyelvgyakorlatok*. [Esperanto. Enkonduko kaj lingvoekzercoj.] Budapest: Tankönyvkiadó.
- Szerdahelyi, István. 1976a. *Vorto kaj vortelementoj*. La Chaux-de-Fonds: KCE & Kuopio: Literatura Foiro.
- Szerdahelyi, István. 1976b. "La Esperanta morfemaro." En *Esperantologiaj kajeroj 1*, redaktis István Szerdahelyi, 61–117. Budapest: Tankönyvkiadó.
- Szerdahelyi, István. 1976c. "Semantika modelo de Esperanto." En *Internacia Lingvistika Simpozio, Kumrovec 1975*, redaktis Zlatko Tišljár, 85–148. Zagreb: Internacia Kultura Servo.
- Szerdahelyi, István. 1977. *Bábelről a világnyelvig*. Budapest: Gondolat.
- Szerdahelyi, István. 1979a. "Enkonduko en interlingvistikon." En *Einführung in die Interlinguistik (Enkonduko en la Interlingvistikon)* (Europäische Reihe: Entnationalisierte Wissenschaft.), redaktis Tazio Carlevaro kaj Günter Lobin, 9–85. Alsbach: Leuchtturm.
- Szerdahelyi, István. 1979b. "Pri la lingvistika priskribo de esperanto." En *Esperanto – La internacia lingvo – Sciencaj aspektoj*, redaktis Detlev Blanke. Berlin: Kulturligo de GDR, Centra Laborrondo Esperanto. 111–116.
- Szerdahelyi, István. 1980. *Bevezetés az interlingvisztikába. Történeti vázlat és forrástanulmány*. Budapest: Tankönyvkiadó.
- Szerdahelyi, István. 1981. "Signo, signifo, signifo-integrado." En *Li kaj ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien*, redaktis Reinhard Haupenthal, 313–336. Antverpeno: TK kaj La Laguna: Stafeto.
- Szerdahelyi, István. 1985. *Alkalmazott nyelvészeti alapfogalmak. Tanulmányok, szemelvények I. Kézirat*. Budapest: Tankönyvkiadó.
- Szerdahelyi, István. 1987a. "Principoj de Esperanta etimologio." En *Studoj pri la Internacia Lingvo*, redaktis Michel Duc Goninaz, 109–138. Gent: AIMAV.

- Szerdahelyi, István. 1987b. “Diakrona kaj sinkrona esperantologio.” *Informilo por Interlingvistoj* kajero 2.
- Szerdahelyi, István. 1997. “Etimologio de gramatikaj elementoj.” En *Struktura kaj socilingvistika esploro de Esperanto*, redaktis Ilona Koutny kaj Márta Kovács, 153–161. Budapeŝto: Steleto kaj ILEI.
- Szerdahelyi, István. 2024. *Elektitaj artikoloj* (Interlingvistikaj Studoj 4.), elektis, prilaboris kaj enkondukis Ilona Koutny. Poznań: Interlingvistikaj Studoj kaj Rys.
<https://doi.org/10.48226/978-83-68006-44-5> (24.02.2025)
- Szerdahelyi, István kaj Ilona Koutny. 1996. *Hungara-Esperanta meza vortaro*. Budapeŝto: MESZ.
- Vilborg, Ebbe. 1989–2001. *Etimologia vortaro de Esperanto*. Vol. 1–5. Stockholm: Eldona Societo Esperanto.
- Waringhien, Gaston. 1959. *Lingvo kaj vivo*. La Laguna: Stafeto.
- Waringhien, Gaston, ĉefred. 1970. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Waringhien, Gaston, ĉefred. 2020. *PIV 2020*. <https://vortaro.net/> (29.04.2025)
- Wells, John. 1978. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado.
- Wennergren, Bertilo. 2005. *Plena manlibro de esperanta gramatiko*. s. 1.: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. – 2-a eld. 2020. Partizánske: E@I, La Ranetoj. – reta eldono (versio 15.5). 2024. https://bertilow.com/pmeg/elshutebla/pmeg_15.5.pdf (29.04.2025)
- [Zamenhof, L. L.] D-r Ĝesperanto. 1887. *Meždunarodnyj jazyk*. Varŝava: Kel’ter [presejo]. <http://data.onb.ac.at/dtl/7001741> (29.04.2025)
- Zamenhof, L. L. 1905. *Fundamento de Esperanto*. Paris: Hachette. <http://data.onb.ac.at/dtl/5424176> (29.04.2025)

Pri la aŭtoro

Ilona Koutny, profesoro pri lingvistiko (hungarologio kaj esperantologio) en la Universitato Adam Mickiewicz (AMU), Poznano, Pollando. Iama disĉiplo (1972–1977) de I. Szerdahelyi, lia posteulo en la Esperanto-fako de la Universitato Eötvös Loránd (ELTE), Budapeŝto (1987–1995). Fondinto kaj gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj en AMU (1998–2024). Post longa okupiĝo pri komputa lingvistiko, lastatempe ŝi esploras la rilaton inter lingvo kaj kulturo. Leksikografio ĉeestas en ŝia vivo dekomence. Ŝi publikigis kelkajn librojn, vortarojn kaj multajn artikolojn.

Retadreso: ikoutny@amu.edu.pl

ORCID-numero: 0000-0001-7950-1470

About the author

Ilona Koutny, profesor of linguistics (Hungarian and Esperanto studies) at Adam Mickiewicz University (AMU), Poznań, Poland. Former student of I. Szerdahelyi (1972–1977), his successor in the Esperanto department at Eötvös Loránd University (ELTE), Budapest (1987–1995). Founder and director of Interlinguistic Studies at AMU (1998–2024). After a long career in computational linguistics, she has recently been researching the relationship between language and culture. Lexicography has been present in her life from the beginning. She has published several books, dictionaries and many articles.

Über die Verfasserin

Ilona Koutny, Professorin für Sprachwissenschaft (Hungarologie und Esperanto) an der Adam-Mickiewicz-Universität (AMU), Poznań, Polen. Ehemalige Studentin von I. Szerdahelyi (1972–1977), seine Nachfolgerin am Esperanto-Fach der Eötvös-Loránd-Universität (ELTE), Budapest (1987–1995). Gründerin und Leiterin der Interlinguistischen Studien an der AMU (1998–2024). Nach einer langen Beschäftigung mit Computerlinguistik erforscht sie heute die Beziehung zwischen Sprache und Kultur. Die Lexikographie ist von Anfang an in ihrem Leben präsent. Sie hat eine Reihe von Büchern und viele Artikel veröffentlicht.

The role of István Szerdahelyi in interlinguistics and esperantology

Abstract: István Szerdahelyi institutionalized the university instruction of interlinguistics and Esperanto-studies – this alone would guarantee him a place of honor in the history of Esperantology. But he was also an outstanding interlinguist, Esperantologist and pedagogue. This article outlines his most important achievements in the field of interlinguistics (location and systematic presentation of the field, Hungarian planned languages) and Esperantology (new, linguistic approach to the classification of morphemes, structural features of Esperanto, beginning research on the hitherto neglected area of Esperanto semantics, and the systematic presentation of etymological operations).

Keywords: interlinguistics; Esperanto studies; morpheme classification; syntax; semantics; etymology

Die Rolle von István Szerdahelyi in der Interlinguistik und Esperantologie

Zusammenfassung: István Szerdahelyi institutionalisierte die universitäre Lehre der Interlinguistik und Esperantologie – das würde ihm bereits eine würdige Rolle in der Geschichte der Esperantologie einräumen. Er war aber auch ein hervorragender Interlinguist, Esperantologe und Pädagoge. Der Artikel skizziert seine wichtigsten Errungenschaften auf dem Gebiet der Interlinguistik (Verortung und systematische Darstellung des Fachgebiets, ungarische Plansprachen) und der Esperantologie (neuer, linguistischer Ansatz zur Morphemklassifizierung, Strukturmerkmale von Esperanto, Beginn der vernachlässigten semantischen Forschung von Esperanto, systematische Darstellung etymologischer Operationen).

Schlüsselwörter: Interlinguistik; Esperantologie; Morphemklassifikation; Syntax; Semantik; Etymologie

Martine Mussies
Universiteit Maastricht

Fanfiction in Esperanto – Esperanto in Fanfiction

its predisposition toward linguistic bricolage and semiotic experimentation – than about the health of the language being deployed. Moreover, this project has implicitly operated on the assumption that the use of Esperanto in fanfiction often carries ideological weight – whether utopian, egalitarian, or emancipatory. Yet, such assumptions warrant more empirical scrutiny. Are fan authors truly engaging with the political and historical dimensions of Esperanto, or is the language being used primarily as a world-building shortcut, or even as a form of aesthetic exoticism? Future research might benefit from reader reception studies, interviews with authors, or corpus-based analysis to discern the motivations and receptions of Esperanto use in fan contexts.

The methodology employed here also has its limitations. The analysis has relied predominantly on close reading of selected examples drawn from open-access platforms such as AO3 and Wattpad. These platforms, while influential, represent only a segment of global fanfiction production. More ethnographic or comparative research across different linguistic or regional fan communities – particularly those that operate outside Anglophone digital spaces – would deepen our understanding of how Esperanto functions transnationally and multilingually within fandoms. Finally, this investigation has largely treated Esperanto as a linguistic object, with occasional gestures toward its visual or symbolic properties. Yet there remains significant scope to theorise Esperanto not only as language but as cultural signifier – a form of linguistic cosplay, perhaps – especially in multimodal fanworks where written language operates less as code and more as visual artefact. Such a shift in perspective would open further avenues for examining how conlangs operate as aesthetic rather than communicative resources, aligning more closely with theories of translanguaging, performativity, and language-as-design.

8 Expanding the frame: alternative frameworks and comparative cases

While this article has largely approached Esperanto through the lens of conlangs and constructed linguistic systems, it is worth considering more radically alternative frameworks that could reposition our understanding of how the language functions within fanfiction. One such perspective would treat Esperanto not primarily as a communicative code but as a cultural signifier within what might be termed transmedial performance. Much like cosplay, in which fans wear costumes not to replicate historical accuracy but to embody affective or ideological alignment with a character or world, Esperanto can operate as a kind of linguistic costume. Its deployment in

fanfiction may thus signal thematic associations – utopianism, estrangement, resistance – regardless of grammatical precision or linguistic fluency. Within this framework, concerns about syntactic correctness are arguably beside the point, as Esperanto functions more as a semiotic resource than a strict linguistic system.

Relatedly, the framework of translanguaging (García and Wei 2014) offers a compelling alternative to the binary distinction between natural and constructed languages. Rather than viewing Esperanto as a bounded linguistic entity, one might understand its appearance in fanfiction as part of a dynamic and hybrid linguistic repertoire. In this sense, Esperanto becomes one of many tools – alongside English, fandom-specific jargon, emojis, and visual coding – used by fan authors to create meaning, perform identity, and delineate narrative boundaries. This approach would further support an understanding of Esperanto as a flexible, performative element within a multimodal fan ecology.

These perspectives are reinforced when we consider comparative examples. Klingon, a conlang with intentionally complex and alien syntactic features, appears far more frequently on AO3 than Esperanto, despite its more limited real-world speech community.⁵ This suggests that how a language fits into a given narrative world – its symbolic resonance and expressive potential – may be more important than whether it is widely spoken or used fluently. Similarly, Arabic and Russian are often used in espionage fanfiction (such as in *James Bond* universes, e.g. Flea 2007) to evoke secrecy or cultural specificity, whereas Esperanto’s constructed neutrality may lack the ethnolinguistic charge that such genres typically demand. In LGBTQ+ fanfiction, fictional sign languages or minimalist conlangs like Toki Pona are sometimes preferred for their associations with resistance, marginality, or otherness – aligning with queer and neurodivergent identity politics in ways that diverge from Esperanto’s historical mainstream. These counterexamples demonstrate that Esperanto’s presence in fanfiction must be understood not in isolation but in conversation with a wider array of linguistic practices and symbolic languages, each embedded in distinct affective, ideological, and narrative economies.

5 Unlike Esperanto, which was designed to maximise accessibility and ease of acquisition, Klingon was developed by linguist Marc Okrand to reflect the harsh, martial aesthetics of the fictional Klingon culture. Its syntax deliberately violates common typological patterns (e.g. object-verb-subject word order), which adds to its distinctiveness within fictional contexts.

9 Conclusions

This article has demonstrated that Esperanto, while rarely central in mainstream fanfiction, plays a versatile and often ideologically inflected role within certain fannish spaces. Whether used to signal character otherness, evoke utopian futures, or mark alignment with leftist traditions, its presence reveals the ways in which constructed languages continue to animate speculative storytelling. At the same time, the analysis suggests that the boundaries between communication, decoration, and ideology in fan language use are porous and unstable – making Esperanto in fanfiction a particularly rich object of study for those interested in the semiotic politics of language choice.

The key insight to emerge from this research is not that Esperanto is flourishing as a spoken or written vernacular within fanfiction communities, but rather that its symbolic affordances remain alive in participatory culture. Even when mediated through imperfect tools such as Google Translate, Esperanto retains a capacity to signify openness, neutrality, resistance, or estrangement – depending on narrative context. This flexibility is arguably what secures its continued relevance, not as a rival to English or naturalistic conlangs, but as a mutable cultural form shaped by those who choose to appropriate and recontextualise it.

Ultimately, the case of Esperanto in fanfiction invites us to reconsider what it means for a language to live – not merely in terms of fluent usage or demographic breadth, but as a dynamic and evolving presence within digital culture. It challenges us to think not only about linguistic survival, but about symbolic afterlives. As such, it provides fertile ground for interdisciplinary inquiry at the intersection of linguistics, media studies, fandom, and cultural semiotics. The present study is but an initial foray into this terrain, and a call to take up the challenge to map it further.

Platforms

Archive of Our Own. (n.d.). <https://archiveofourown.org>

FanFiction.net. (n.d.). <https://www.fanfiction.net>

Wattpad. (n.d.). <https://www.wattpad.com>

Primary sources

Asimov, Isaac. 1940. "Homo Sol." *Astounding Science Fiction* vol. 26, issue 1 (September): 43–59.

Collins, Suzanne. 2008. *The Hunger Games*. New York: Scholastic Press.

- Farmer, Philip José. 1971–1983. *Riverworld* series. New York: G. P. Putnam’s Sons.
- Flea. 2007. *Honor Among Spies*. FanFiction.
<https://www.fanfiction.net/s/3431826/1/Honor-Among-Spies>
- Galaxiulo. 2024. *Universal Understandings*, republished at
<http://martinemussies.nl/web/universal-understandings/>
- Harrison, Harry. 1957. “The Stainless Steel Rat.” *Astounding Science Fiction* 59, issue 6 (August): 9–40.
- Lifewonders. 2016. *Tokyo Afterschool Summoners* (Version 1.0) [Mobile app]. App Store. <https://apps.apple.com/app/id1165189145>
- Matenruĝulo. 2021. *Ruĝen: rakonto pri intima socialismo*. Archive of Our Own.
<https://archive.transformativeworks.org/works/33927097>
- Mussies, Martine. 2024c. *La Kanto de Tamar*. Musings.
<http://martinemussies.nl/web/la-kanto-de-tamar/>
- Mussies, Martine. 2024d. *La Rekompenco de Tamar*. Musings.
<http://martinemussies.nl/web/la-rekompenco-de-tamar/>
- Nytewing. 2019. *Error 404: Translation Unavailable*. FanFiction.
<https://www.fanfiction.net/s/13345082/1/Error-404-Translation-Unavailable>
- OliviaR5Warbler. 2019. *Finding You on Amorié Beta III*. FanFiction.
<https://www.fanfiction.net/s/13375983/1/Finding-You-on-Amori%C3%A9-Beta-III>
- Orwell, George. 1949. 1984. London: Secker & Warburg.
- Trashlations (D4tD). 2020. *La Glaciarium*. Archive of Our Own.
<https://archiveofourown.org/works/24036406>
- Vampyra142001. 2021. *Now You’re Thinking With Portals! Wait, That’s Knot Right*. Archive of Our Own.
<https://archive.transformativeworks.org/works/29421171>
- Wells, Herbert George. 1908. *The War in the Air*. London: George Bell & Sons.

References

- Barnes, Leslie, and Cornelia van Heerden. 2006. “Virtual Languages in Science Fiction and Fantasy Literature.” *Language Matters* 37, issue 1: 102–117.
- Barnes, Myra E. 1975. *Linguistics and Languages in Science Fiction-Fantasy*. New York: Arno Press.
- Bruin, Tom de. 2024. *Fan Fiction and Early Christian Writings: Apocrypha, Pseudepigrapha and Canon*. London: Bloomsbury Publishing.
- Carter, Steven R. 1980. “Harry Harrison’s *The Adventures of the Stainless Steel Rat*: A Study in Multiple Interfaces.” *Extrapolation* 21, issue 2: 139–145.

- Corsetti, Renato. 1996. "A mother tongue spoken mainly by fathers." *Language Problems and Language Planning* 20, issue 3: 263–273.
<https://doi.org/10.1075/lplp.20.3.04cor>
- "Esperanto in a victorious CP world." 2017. alternatohistory.com.
<https://www.alternatohistory.com/forum/threads/esperanto-in-a-victorious-cp-world.410629/>
- Farley, Shannon K. 2017. Translation, rewriting, and fan fiction: A literary history of transformative work. Doctoral dissertation. Amherst, MA: University of Massachusetts Amherst.
- Fians, Guilherme. 2021. *Esperanto revolutionaries and geeks: Language politics, digital media and the making of an international community*. Cham: Palgrave Macmillan.
- Fiedler, Sabine. 2012. "The Esperanto *denaskulo*: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community." *Language Problems and Language Planning* 36, issue 1: 69–84.
<https://doi.org/10.1075/lplp.36.1.04fie>
- Gaiman, Neil, and Terry Pratchett. 1990. *Good Omens: The Nice and Accurate Prophecies of Agnes Nutter, Witch*. London: Gollancz.
- Gaiman, Neil (writer), and Douglas Mackinnon (director). 2019. *Good Omens* [TV series]. London/Edinburgh: BBC Studios; Narrativia; The Blank Corporation; Amazon Studios.
- García, Ignacio, and María Isabel Hernández Pena. 2011. "Machine translation-assisted language learning: Writing for beginners." *Computer Assisted Language Learning* 24, issue 5: 471–487. <https://doi.org/10.1080/09588221.2011.582687>
- García, Ofelia, and Li Wei. 2014. *Translanguaging: Language, Bilingualism, and Education*. New York, NY: Palgrave MacMillan. <https://doi.org/10.1057/9781137385765>
- Jenkins, Henry. 1992. *Textual Poachers: Television Fans and Participatory Culture*. New York: Routledge.
- Jenkins, Henry. 2008. *Convergence Culture: Where Old and New Media Collide*. New York: NYU Press.
- Le Guin, Ursula K. 1968. *A Wizard of Earthsea*. Berkeley, CA: Parnassus Press.
- Meluzzi, Chiara. 2019. "Real communities for invented languages. Dothraki and Klingon on the Web." *American Language Journal* 3, issue 2: 16–29.
- Mussies, Martine. 2009. Лолита и Синестезия: сравнительный анализ английского и русского переводов [Lolita and Synesthesia: A Comparative Analysis of the English and Russian Translations]. Master's thesis. Sankt Peterburg: St Petersburg University.
- Mussies, Martine. 2022a. "Posidaeja and Mami Wata: The online afterlives of two mermaid goddesses." *Shima* 16, issue 2: 186–196.
<https://doi.org/10.21463/shima.175>

- Mussies, Martine. 2022b. “Pedig edhellen?” *Lembas (Journal of the Dutch Tolkien Society)* issue 200: 40–45.
- Mussies, Martine. 2023. “The multilingual tapestry of King Alfred fanfiction.” *Langues de l’Angleterre médiévale / Languages of Medieval England*, edited by Élise Louviot, special issue of *Études Médiévales Anglaises* issue 102: 109–156.
- Mussies, Martine. 2023b. *Feminist Hacking/Making: Empowering Changes in Digital Media Fandoms*. Raffia – Radboud Gender & Diversity Studies. <https://raffia-magazine.com>
- Mussies, Martine. 2023c. “‘ τ is Beith and means birch’ – An exploration of Ogham in online fanfiction featuring King Alfred the Great.” *Studia Celtica Posnaniensia* 8: 26–54.
- Mussies, Martine. 2024a. “Zombie mermaids: ‘The Lake of Mystery’ (Tooba 2023).” In *Zombie Futures in Literature, Media and Culture: Pandemics, Society and the Evolution of the Undead in the 21st Century*, edited by Simon Bacon, 157–165. London: Bloomsbury Collections. <http://dx.doi.org/10.5040/9781350285521.ch-11>
- Mussies, Martine. 2024b. “The King and I. Representations of BDSM in Fanfiction about King Alfred.” In *What is Medieval? Decoding Approaches to the Medieval and Medievalism in the 21st Century*, edited by Claire Kennan and Emma J. Wells, 213–234. Turnhout: Brepols. <https://doi.org/10.1484/M.NEO-EB.5.136271>
- Okrent, Arika. 2009. *In the Land of Invented Languages: Esperanto Rock Stars, Klingon Poets, Loglan Lovers, and the Mad Dreamers Who Tried to Build a Perfect Language*. New York: Spiegel & Grau.
- Peacey, Brianna. 2020. You’re the only one who knows my true identity: how fandoms create new identities for constructed language learners. Master’s thesis. Vancouver: University of British Columbia. <https://open.library.ubc.ca/media/download/pdf/24/1.0394130/3>
- Peterson, David J. 2015. *The Art of Language Invention: From Horse-Lords to Dark Elves, the Words Behind World-Building*. New York: Penguin.
- Search results for query: *esperanto*. 2025. [alternatelyhistory.com](https://www.alternatehistory.com). <https://www.alternatelyhistory.com/forum/search/18917708/?q=esperanto&o=date>
- Sherborne, M. 2014. “Educating Heinrich: HG Wells and the Germans.” *The Wellsian: The Journal of the HG Wells Society* 37: 31–37.
- Smith, Arden R. 2022. “Invented Languages and Writing Systems.” In *A Companion to J. R. R. Tolkien*, edited by Stuart D. Lee, 1st edn, 177–187. Hoboken, NJ: Wiley.
- Stanley, Elizabeth. 2003. *Tongues of Malevolence: A Linguistic Analysis of Constructed Languages in Fantasy Literature*. Bachelor’s thesis. Athens: University of Georgia. <https://doi.org/10.13140/RG.2.2.24534.42561>

- Stockwell, Peter. 2006. "Invented Language in Literature." In *Encyclopedia of Language & Linguistics*, edited by K. Brown, 2nd edn, vol. 6: 3–10. Oxford: Elsevier.
- Thibault, Mattia. 2020. "Tlhngan maH! (We Are Klingon): Conlang, Play and Fandom in a Ludicising World." In *Languagescapes: Ancient and Artificial Languages in Today's Culture*, edited by Vincenzo Idone Cassone, Jenny Ponzio, and Mattia Thibault, 99–111. Rome: Aracne.
- Thomas, Angela. 2007. "Blurring and Breaking Through the Boundaries of Narrative, Literacy, and Identity in Adolescent Fan Fiction." In *A New Literacies Sampler*, edited by Colin Lankshear and Michele Knobel, 137–166. New York: Peter Lang.
- Toral, Antonio, and Andy Way. 2018. "What Level of Quality Can Neural Machine Translation Attain on Literary Text?" In *Translation Quality Assessment: From Principles to Practice*, edited by Joss Moorkens, Sheila Castilho, Federico Gaspari, and Stephen Doherty, 263–287. Cham: Springer International Publishing.
https://doi.org/10.1007/978-3-319-91241-7_12
- Using Esperanto in Fiction. 2008. Reddit.
https://www.reddit.com/r/Esperanto/comments/71t8t6/using_esperanto_in_fiction/

About the author

Martine Mussies is an autistic academic and artistic researcher based in Utrecht, the Netherlands. She recently published her first monograph, *Inside the Outside – a Misfit Manifesto*. Martine is a PhD candidate at Maastricht University, and also a musician, visual artist, avid language learner, and budo practitioner.

E-mail: martinemussies@gmail.com

Website: <http://www.martinemussies.nl>

ORCID number: 0000-0002-0891-8217

Pri la aŭtoro

Martine Mussies estas aŭtisma sciencisto kaj arta esploristo loĝanta en Utreĥto, Nederlando. Ŝi lastatempe publikigis sian unuan monografion, *Inside the Outside – a Misfit Manifesto*. Martine estas doktoriĝa kandidato ĉe la Universitato de Maastricht, kaj ankaŭ muzikisto, bildartisto, fervora lingvolernanto kaj budo-praktikanto.

Over de auteur

Martine Mussies is een autistische academica en artistiek onderzoeker uit Utrecht, Nederland. Onlangs publiceerde ze haar eerste monografie, *Inside the Autside – a Misfit Manifesto*. Martine is promovenda aan de Universiteit Maastricht en daarnaast ook musicus, beeldend kunstenaar, enthousiaste taalleerder en budoka.

Fikcio de fanoj en Esperanto – Esperanto en fikcio de fanoj

Resumo: La rolo de Esperanto en fikcio de fanoj donas konvinkan ekzemplon pri la manieroj, per kiuj konstruitaj lingvoj funkcias ene de la cifereca partoprena kulturo. Ĉi tiu artikolo ekzamenas la rimedojn, per kiuj Esperanto aperas en rakontoj kreitaj de fanoj, kaj kiel rakonta ilo kaj kiel rimedo por lingva eksperimentado. Ĝi ankaŭ esploras kiumaniere Esperanto uziĝas kiel estonteca komuna lingvo en sciencfikcio, kiel sekreta aŭ rezista lingvo en distopiaj scenaroj, kaj kiel ponto inter diversaj kulturoj kaj roluloj. Aldone, ĝi konsideras la fenomenon de fanfikcio tute verkita en Esperanto, elstarigante ĝian uzon en tradukprojektoj kaj originaj rakontoj. Per analizo de ekzemploj, inkluzive de *Ruĝen: rakonto pri intima socialismo* kaj *Now You're Thinking With Portals! Wait, That's Knot Right*, la artikolo esploras la defiojn de lingva aŭtenteco, precipe kiam Esperanto estas uzata pere de maŝintradukado. Plue, ĝi ekzamenas la vastiĝon de esperantista fan-kreado preter teksta rakontado, kiel montras *La Kanto de Tamar*, fankreita kanto (fare de la aŭtoro de ĉi tiu artikolo), kiu kunfandas sciencfikcion kaj historian legendon. Ĉi tiu studo finfine montras, ke la ĉeesto de Esperanto en fanfikcio transpasas simplan lingvan ludon; ĝi funkcias kiel dinamika ilo por mondkonstruado, identeca esplorado kaj alternativa rakontado en la nuntempa fankulturo.

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Fanfikcio; Konstruitaj lingvoj; Lingva eksperimentado; Partoprena kulturo; Sciencfikcio

Fanfiction in het Esperanto – Esperanto in fanfiction

Samenvatting: De rol van Esperanto in fanfiction biedt een fascinerende casestudy over hoe geconstrueerde talen functioneren in de digitale participatiecultuur. Dit artikel onderzoekt de rol van Esperanto als narratief middel en als taalkundig experiment in door fans geschreven verhalen. Het beschrijft het gebruik van Esperanto als een toekomstige lingua franca in sciencefiction, als geheime of verzetstaal in dystopische settings, en als een brug tussen verschillende culturen en personages. Daarnaast wordt fanfiction die volledig in Esperanto is geschreven geanalyseerd, met aandacht voor zowel vertaalprojecten als originele verhalen. Aan de hand van voorbeelden zoals *Ruĝen: rakonto pri intima socialismo* en *Now You're Thinking With Portals! Wait, That's Knot Right* worden de valkuilen rond taalkundige authenticiteit besproken, vooral wanneer Esperanto wordt geïntegreerd via machinevertaling. Verder wordt de uitbreiding

van Esperanto-creativiteit buiten het tekstuele verkend, zoals in *La Kanto de Tamar*, een fan-gecomponeed lied (door de auteur van dit artikel), dat sciencefiction met historische legenden verweeft. Dit artikel toont aan dat Esperanto in fanfiction verder gaat dan enkel taalkundig spel; het fungeert als een dynamisch hulpmiddel voor wereldbouw, identiteitsverkenning en alternatieve vormen van storytelling binnen hedendaagse fancultuur.

Trefwoorden: Esperanto; Fanfiction; Geconstrueerde talen; Participatiecultuur; Sciencefiction; Taalkundig experiment

GONG Xiaofeng
Universitato Nanchang, Ĉinio

Apliko de Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperantigita ĉina klasika romano *Ruĝdoma Songô*

Resumo: *Hong Lou Meng* ‘*Ruĝdoma Songô*’ estas unu el la kvar famaj klasikaj romanoj en Ĉinio. De ĝi aperis ĝis nun tradukaĵoj en 22 fremdlingvoj, inter ili ankaŭ troviĝas esperanta versio tradukita de s-ro Xie Yuming. La romano estas bona esplorcela materialo por tradukarto. Pro diferencoj en kulturo kaj kognaj temoj, malkongruoj inter la originala teksto kaj la tradukita teksto estas neeviteblaj dum la integra procezo de tradukado. Laŭ hipotezo de Mona Baker (1992), tradukitaj tekstoj ankaŭ havas apartan “tradukan stilon”, kiun oni povas karakterizi per kvar Universalaj Trajtoj de Tradukado, nome: simpligo, eksplicitigo, normigo kaj interfero. Subbaze de tiu teorio, ĉi tiu studo prezentas analizon pri la plej ofte cititaj Universalaj Trajtoj en la esperanta versio de *Ruĝdoma Songô*, kompare kun du konataj tradukoj en la angla lingvo (Cao Xueqin, trad. Hawkes kaj Minford 1973; Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978). La rezultoj montras, ke la hipotezo de Universalaj Trajtoj de Tradukado estas valida aŭ parte valida en la tri tradukaĵoj.

Ŝlosilvortoj: Universalaj Trajtoj de Tradukado; simpligo; eksplicitigo; normigo; interfero; *Ruĝdoma Songô*

1 Enkonduko

Ruĝdoma Songô (*Hong Lou Meng*, 红楼梦), ankaŭ nomata la *Rakonto de la ŝtono* (石头记), verkita de Cao Xueqin meze de la 18-a jarcento, estas unu el la majstroverkoj de ĉina literaturo, nome unu el la Kvar Grandaj Klasikaj Romanoj de Ĉinio¹. Ĝi estas ĝenerale konsiderata kiel la pinto de ĉina fikcio kaj honorita kiel “Enciklopedio de la feŭda socio de Ĉinio”. La romano ne nur heredas la tradician popularan lingvon, sed ankaŭ uzas parolan lingvon, popoldirojn, idiomojn, proverbojn, dialektojn kaj klasikan literaturan lingvon, kiuj estas malfacile tradukeblaj en fremdlingvojn. Samtempe la romano estas bona esplorcela materialo por tradukarto. Tial

1 La aliaj tri estas: Ĉe akvorando, Romano pri tri regnoj kaj Pilgrimado al la Okcidento, esperantigitaj de Laŭlum (Li Shijun) (Kvar famaj klasikaj romanoj 2022).

multaj tradukistoj dediĉis sin al tradukado kaj studado de ĝi ekde ties eldono en la 18-a jarcento.

Ĝis nun aperis tradukaĵoj en 22 fremdlingvoj kaj 8 etnaj naciminoritataj lingvoj, inter ili ankaŭ troviĝas esperanta versio de Xie Yuming eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo en Pekino en la jaroj 1995–1997. La romano *Ruĝdoma Songô* en esperanta traduko havas 1893 paĝojn en tri volumoj, konsistanta el 120 ĉapitroj (Cao Xueqin/Xie Yuming 1995–1997). Pro la majstra traduko, Xie estas premiita per OSIEK-premio (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj, OSIEK) en 1999.

Korpuso (aŭ tekstaro) estas aro da tekstoj aŭ transskribitaj konversacioj/paroloj, kiun oni uzas kiel tuton por studo. Kun la evoluo de elektronika informa teknologio, korpusa esplorado, kiu aperis nur en la 1990-aj jaroj, rapide disvolviĝis en la lastaj jaroj kaj fariĝis pli kaj pli grava metodo por tradukarto. Helpe de la korpuso, fakuloj serĉis kaj provis malkovri regulecojn en vastaj produktoj, kiuj kunhavas komunajn procezojn kaj metodojn en tradukprocezado. La vasta uzo de korpusoj en tradukesplorado ne nur ebligis la evoluon de novaj teorioj, kiel la Universalaj Trajtoj de Tradukado, sed ankaŭ montris, ke eĉ unuopa traduko povas funkcii kiel ‘korpuseto’ por analizi tiujn fenomenojn.

El ĉiuj studoj pri Universalaj Trajtoj de Tradukado, la hipotezoj de Mona Baker estas la plej famaj. Laŭ Baker, Universalajoj estas lingvaj trajtoj kiuj tipe okazas en tradukitaj prefero ol originalaj tekstoj kaj supozeble estas sendependaj de la influo de la specifaj lingvoparoj implicitaj en la procezo de tradukado (Baker 1993, 243). Post pli ol jardekaĵoj studoj, la hipotezoj pri la Universalaj Trajtoj de Tradukado de Baker estas konkluditaj kiel simpligo, eksplacito, normigo kaj leĝo de interfero.

Spertuloj kombinis korpusojn por entrepreni multajn studojn por kontroli la hipotezojn. Granda nombro da korpus-bazitaj tradukstudoj konfirmis la tradukajn universalajojn proponitaj de Baker (Laviosa 2002, 60–62; Bernardini 2004; Becher 2010; Xiao 2010, 8; LI Bingru 2022). Kaj la postaj esploroj ĉefe koncentriĝis sur tri aspektoj, t.e. simpligo (Laviosa 1998; Olohan kaj Baker 2000), eksplacito (Øverås 1998; Pym 2005) kaj normigo (Touy 1995; Kenny 2001; Mauranen 2007), kaj kun malpli da esplorado pri interfero (Laviosa 1998). Ankaŭ ne mankas esploroj pri Universalaj Trajtoj de Traduko en la anglaj versioj de *Ruĝdoma Songô* (ZHU Chaowei 2016). Sed ĝis nun oni ankoraŭ ne faris esploron kaj komparadon inter la ĉina, esperanta kaj la anglaj versioj de *Ruĝdoma Songô*.

Ĉi tiu artikolo celas fari sisteman kaj teorian studon de la Universalaj Trajtoj de Tradukado aplikitaj en la esperanta versio, observi kiel la trajtoj estas reflektitaj en la tradukaĵoj, kaj enketi kiajn efikojn ili havas sur la kvaliton de la tradukaĵoj, komparante kun la du anglaj versioj.

2 Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperanta versio

Estas grandaj diferencoj inter la fona kulturo kaj lingvostrukturo de la cellingvo kaj la fontlingvo. Kun la progreso de la korpusa esplorado, homoj malkovris per kompara esplorado, ke ekzistas kelkaj Universalaj Trajtoj de Tradukado, kaj la malkovro de tiuj komunaj trajtoj plibonigis la kvaliton de la traduko.

Universalaj Trajtoj de Tradukado havas grandan signifon en tio, ke ni povas esplori la naturon de traduko, kompreni la interagadon dum lingvaj interŝanĝoj, kaj studi la kreopovon de la cellingvo, esprimante lingvajn kaj kulturajn mankojn.

2.1 Simpligo

Simpligo, kiel difinas Baker, estas “the tendency to simplify the language used in translation” ‘la tendenco simpligi la lingvon uzatan en tradukado’ (Baker 1996, 181–182). Tio signifas, ke traduk-teksto supozeble estas pli simpla ol la fonto-teksto en vortfarado, sintakso kaj/aŭ stilo. Tri specoj de simpligo estis identigitaj en tradukita teksto: leksika, sintaksa kaj stila (ekzemplojn oni prezentos sube).

La simpliga tendenco de tradukitaj tekstoj manifestiĝas ĉefe en la anstataŭigo de hiponimoj per hiperonimoj (Baker 1996, 176), kaj anstataŭigo de maloftaj vortoj en la fontlingvo per oftaj vortoj. Tial simpleco reflektiĝas en la longeco de frazoj, elekto de vortprovizo ktp.

Oni povas vidi en la sekvaj ekzemploj, ke la trudukinto ankaŭ uzis sintaksajn rimedojn por simpligi la fraztradukojn.

2.1.1 Anstataŭigo de frazoj per substantivaj vortgrupoj

<i>Ĉine</i>	如今太爷也没了, <u>只有老奶奶带着一个亲生的姑娘过活, 也并没有哥儿兄弟</u> , 可惜他竟一门尽绝了。 Rújīn tàiyé yě méiliǎo, <u>zhǐyǒu lǎonǎinai dàizhe yīgè qīnshēng de gūniáng guòhuó, yě bìng méiyǒu gē er xiōngdì</u> , kěxī tā jìng yī mén jīn juéle.
<i>Interlinia traduko</i>	Nun la sinjoro jam mortis, <u>Nur la maljunulino vivas kun sia biologia filino, kiu ne havas fratojn.</u> Kia domaĝe, ke lia familio estingiĝas.
<i>Esperante</i>	<i>La maljuna Xia jam mortis. <u>Nur senfila vidvino kun filino.</u> Tia familio venas al fino!</i> (Ĉapitro 79) (Xie Yuming)

Ĉi tie, la originala signifo de la frazo substrekita estas ‘Nur la maljunulino vivas kun sia biologia filino, kiu ne havas fratojn’, tre longa frazo, la tradukinto uzis tre simpligitan rimedon: *Nur senfila vidvino kun filino*. Koncize kaj fidele.

Krome, la tradukinto ankaŭ uzas eksplicitan metodon (klarigitan sube), ĉar li aldonis la familian nomon *Xia* por ekspliciti kiu mortis.

2.1.2 Sensubjektaj aŭ nekompletaj frazkomponentoj

Ankoraŭ troviĝas en la tradukita teksto multaj esprimoj kun neniuj subjektoj aŭ nekompletaj frazkomponentoj, kiel “Ja malfacile administri tiel grandan domon”:

<i>Ĉine</i>	刘姥姥因说：“这凤姑娘今年大还不过二十岁罢了，就这等有本事， <u>当这样的家，可是难得的。</u> ” Liú lǎolao yīn shuō: “Zhè fèng gūniáng jīnnián dà hái bùguò èrshí suì bàle, jiù zhè děng yǒu běnshì, dāng zhèyàng de jiā, kěshì nándé de.”
<i>Interlinia traduko</i>	Anjo Liu diris, “Ĉi tiu knabino Feniksa ĉi-jare havas nur dudek jarojn, sed jam tiel kapabla, mastrumi tian domon estas malofte.”
<i>Esperante</i>	“Feniksa, malpli ol dudekjara, estas jam tiel kapabla,” rimarkis Anjo Liu. “ <u>Ja malfacile administri tiel grandan domon.</u> ” (Ĉapitro 6) (Xie Yuming)

La tradukita romano abundas je tiaj ekzemploj, kiaj “La leteron ĝuste al li” (Ĉapitro 3), “Kial plage li?” (Ĉapitro 52), “La kapo dolora, nazo obstrukcita kaj voĉo raŭka.” (Ĉapitro 52) (Xie Yuming).

2.1.3 Koncizaj dialogoj

La tradukinto uzas tre koncizajn dialogojn. En ĉapitro 2, *Jia Yucun* eliras kaj direktas sin al vilaĝa drinkejo por eksciti la sensojn; tie renkontas metropolan antikvajiston *Leng Zixing*, jen la dialogoj inter ili:

“**Kiam ĉi tien, frato?**” ridete demandis Jia Yucun. “**Ekster mia atendo! Vere, hazardo vin revidi.**” (Ĉapitro 2)

En la substrekita partoj mankas subjektoj, tamen kun klaraj signifoj. Tiaj frazoj spicas la tutan scenon kaj psikajn agojn de la rolanto.

2.1.4 Esprimi rime

<i>Ĉine</i>	子兴道：“依你说，‘成则王侯败则贼了’。 “Zi xìng dào: “Yī nǐ shuō, 'chéng zé wánghóu bài zé zéile'.”
<i>Interlinia traduko</i>	Zixing diris: “Laŭ viaj vortoj, se li sukcesus, li fariĝu la reĝo, se li malsukcesus, li estus ŝtelisto.”
<i>Esperante</i>	“Laŭ vi ‘ <u>Venkinto – reĝo, venkito – feĉo</u> ’, ĉu ne?” (Ĉapitro 2)

En tiu ĉi frazo la idiomaĵo “成则王侯败则贼” (Chéng zé wánghóu bài zé zéi), rilatas al du partioj konkurantaj por superregado: Tiu, kiu sukcesas, estas nomata imperiestro, kaj tiu, kiu malsukcesas, bandito. “Imperiestro” kaj “bandito” estas juĝitaj nur surbaze de sukceso aŭ malsukceso. Ankaŭ konata kiel “La venkanto estas la reĝo, la perdanto, la ŝtelisto”. En la romano *Ruĝdoma Sonĝo*, la tradukinto nur uzas kvar vortojn por esprimi ĝin, “Venkinto – reĝo, venkito – feĉo”, tre koncize, perfekte, eĉ kun (preskaŭ-) rimo. Krome, la tradukinto aldonas “ĉu ne?”, kiu tuj transdonis la tonon de la origina frazo. Pliaj rimaj esprimoj troviĝas en la romano:

‘Domo nobela – maro malhela’. (Ĉapitro 6)

Por kio veni, se neniom preni? (Ĉapitro 6)

buŝa promeso, tuja forgeso. (Ĉapitro 12)

Ĉe falo de la arbo, simioj je malvarbo. (Ĉapitro 12)

Alia loko, alia moro’ (Ĉapitro 41)

Lok’ favora – hom’ valora. (Ĉapitro 48)

Lavange la malsano venas, kurac’ ĝin lante malbobenas.
(Ĉapitro 52)

Eĉ objekto forte sonas, se maljuston al ĝi donas. (Ĉapitro 58)

...

2.2 Eksplicitigo

Baker difinis, ke “Explicitation is the tendency in translation to ‘spell things out rather than leave them implicit’” “Eksplikio estas la tendenco en traduko “literumi aferojn prefere ol lasi ilin implicitaj”” (Baker 1996, 180). En sia korpuso de romanoj tradukitaj de la nederlanda en la anglan, Vanderauwera (1985) montris multnombrajn okazojn, kie la tradukintoj aplikas eksplicitajn teknikojn, ekzemple, la uzoj de interjekcioj por esprimi pli klare la progresadon de la pensoj de la roluloj aŭ por akcenti difinitan interpreton, plivastigon de densigitaj fragmentoj, aldonon de modifiloj, kvalifikiĝoj kaj konjunkcioj por atingi pli grandan travideblecon, aldonon de kromaj informoj, enmeton de klarigoj, ripeton de antaŭmenciitaj detaloj por klareco, precizajn interpretojn de implicaj aŭ neklaraj datumoj, disponigon de pli precizaj priskriboj, eksplicitan nomadon de geografiaj lokoj kaj la malambiguigon de pronomoj kun precizaj formoj de identigo. Baker (1992) ankaŭ raportis plurajn ekzemplojn, en kiuj la tradukistoj enmetis pliajn fon-informojn en la celtekston por transponti kulturajn diferencojn. Tio estas ebla kaŭzo de pli longa traduka teksto. Rilate kohercon oni atendus ankaŭ pli da nominalaj frazoj ol personaj pronomoj en tradukoj (YANG Chongchong 2013).

Eksplicitigo ofte estas menciata kune kun la aliaj trajtoj de tradukitaj tekstoj, ekz. kune kun implicigo, kune kun aldono- kaj preterlaso-strategioj.

2.2.1 Aldono de kunligantaj vortoj

La evidenta trajto de la eksplicita fenomeno estas plimultigo de la funkci-ovortoj. Eksplicitigo estas facile rimarkebla precipe en ĉina-esperantaj tradukoj de la markiloj de koherco. Esperanto havas elstaran hipotakson kaj riĉajn markitajn subjunkciojn. Sed la ĉina havas fortan paratakson kaj malofte uzas koherajn markilojn. En la procezo de ĉina-esperanta tradukado, influita de la eksplicita strategio, la logika rilato inter la subfrazoj estas ĝenerale esprimita eksplicite aldonante koher-signojn.

Jen kelkaj ekzemploj en Ĉapitro 4, por bone kompari, la anglaj tradukoj ankaŭ estas cititaj el la plej fama angla versio (Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978).

Ĉine	我家小主人原说, 第三日方是好日, 再接入门。 Wǒjiā xiǎo zhǔrén yuán shuō, dì sān rì fāng shì hǎo rì, zài jiē rùmén.
Angle (Yang kaj Yang)	Our master said he'd take her home three days later because that would be a lucky day.
Esperante (Xie Yuming)	<i>Tamen</i> mia mastro diris, ke li prenos la knabinon en la tria tago, ĉar ĝi estas bonaŭgura.

Ĉine	老爷明日坐堂, 只管虚张声势, 动文书, 发签拿人。 Lǎoyé míng rì zuò táng, zhǐ guǎn xū zhāng shēng shì, dòng wén shū, fā qiān ná rén.
Angle (Yang kaj Yang)	When Your Honour tries the case tomorrow, make a great show of sending out writs and issuing warrants.
Esperante (Xie Yuming)	<i>Morgaŭ</i> Via Moŝto faru la grandan scenon disdoni skriban ordonon kaj sendi homojn por kapti la krimulon.

Ĉine	咱们且忙忙的收拾房子, 岂不使人见怪? Zánmen qiě máng máng de shōu shì fáng zǐ, qǐ bù shǐ rén jiànguài?
Angle (Yang kaj Yang)	It will appear very strange to them if we're in such a rush to open up one of our houses.
Esperante (Xie Yuming)	Ĉu oni ne sentus strangecon pri nia hasta aranĝo de la propraj domoj?

Ĉine	请姨太太就在这里住下, 大家亲密些。 Qǐng yítàitai jiù zài zhèlǐ zhù xià, dàjiā qīnmì xiē.
Angle (Yang kaj Yang)	Do invite your sister to stay here, so that we can all be close together.
Esperante (Xie Yuming)	<i>Via fratino</i> restu ĉi tie, tiel do pli intime!

Ĉine	小人告了一年的状, 竟无人作主。 Xiǎo rén gào le yī nián de zhuàng, jìng wú rén zuò zhǔ.
Angle (Yang kaj Yang)	I lodged a charge a year ago, but nothing came of it.
Esperante (Xie Yuming)	<i>De unu jaro</i> mi akuzas, sed vane!

En tiuj ĉi ekzemploj, la logikaj rilatoj estas implicite esprimitaj en la origina verko. Tamen, kiam ili estas tradukitaj en la cellingvon, interligaj signoj estas aldonitaj por legebleco. Ĉi tio ŝajnas esti plia pruvo pri inter-lingva eksplicitigo en traduko, kiel Huang Libo indikis, “ekzistas du specoj de ekspliciteco, inter-lingva ekspliciteco kaj komparebla ekspliciteco” (HUANG Libo 2007, 13).

Per korpusoj, oni trovis, ke ĉi tiuj eksplicitaj trajtoj estas plejparte reflektitaj en konjunkcioj kiuj esprimas logikajn rilatojn.

2.2.2 Aldono de specifa informo

La strategio de “eksplicitigo” rilatas aldonon de kelkaj vortoj aŭ piednotoj por pliiigi informojn (inkluzive de politikaj, ideologiaj, kulturaj, ktp.) dum la tradukprocezo, por ke la legantoj povu pli bone kompreni la signifon de la originala teksto. La diferencoj inter ĉinaj kaj okcidentaj kulturoj postulas, ke la tradukisto faru profundan analizon de la kultura fono kaj lingvostilo de la fontlingvo dum la interpretado de la originalteksto; la kultura fono kaj lingvostilo de la cellingvo same kiel la mensa spaco de la leganto devas esti pripensita dum la integriĝoprocezo. Tial aldoni kelkajn necesajn klarigajn informojn al la traduko povas igi la tradukon pli kompleta.

Ekzemple, en la suba fontteksto nur aperas nomo *Miaoyu*, sed en la esperanta traduko aldoniĝis kroma informo “ĝia mastrino”:

Ĉine	当下贾母等吃过茶，又帶了刘姥姥至栊翠庵来。妙玉忙接了进去。 Dāngxià jiǎ mǔ děng chīguò chá, yòu dài le liú lǎolao zhì lóng cuì ān lái. Miào yù máng jiē le jìnqù.
Esperante (Xie Yuming)	Post teo Avino gvidis la vilaĝaninon al la Verdlatisa Bonzinejo. <u>Ĝia mastrino Miaoyu</u> prompte bonvenigis Avinon en la korton kie arboj kaj floroj prosperis. (Ĉapitro 41)

Fakte, “en la korton kie arboj kaj floroj prosperis” ankaŭ estas aldonita informo.

Alia ekzemplo en ĉapitro 9, la intrigo okazas en la klasĉambro, sed en tiu ĉi originala teksto tio ne estas menciita; por bone komprenigi legantojn, la tradukinto aldonis informon pri la loko “plonĝis ... en la klasĉambro”:

Esperante (Xie Yuming)	Mingyan estis la plej fidela al Jado, kvankam juna kaj sen-sperta. Aŭdinte tion li, kiu eĉ sen ia kaŭzo ofte turmentadis aliajn, <u>plonĝis</u> kun la instigo de Jia Qiang <u>en la klasĉambro</u> kaj, anstataŭ voki “Sinjorido Jin!”, kriis “Ulo Jin, kio vi estas!” (Ĉapitro 9)
---------------------------	-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Similaj kazoj troviĝas multe en la tradukaĵo.

2.2.3 Eksplicado de pronomoj per substantivoj

Substantivoj ofte estas eksplikitaj, kiel montras la sekva ekzemplo en *Ruĝdoma Sonĝo*: En ĉapitro 3, Jaspas rakontas al sia avino, ke ŝi prenas medikamentojn ĉiutage kaj multaj famaj kuracistoj penis, sed vane. Foje fava bikŝuo volis forporti ŝin, tiam nur trijaran, sed ŝiaj gepatroj rifuzis. Siatempe, la bikŝuo diris:

Ĉine	他又说:既舍不得他,只怕他的病一生也不能好的了。 Tā yòu shuō: Jì shěbudé tā, zhǐ pà tā de bìng yīshēng yě bùnéng hǎo dele.
Interlinia traduko	Li ree diris, jam domaĝi lin, tre probable lia malsano dumvive ne resaniĝos.
Esperante (Xie Yuming)	<i>Tiu do diris, "Vi domaĝas? Ŝi neniam resaniĝos."</i>

En la fontoteksto troviĝas tri *ta*-oj, la unua *ta* indikas la bikŝuon, sed la aliaj du *ta*-oj rilatas al Jaspas. Multaj popolaj romanoj en la dinastio Qing, kiel *Ruĝdoma Sonĝo*, simple uzis la vorton *ta* 'li', ĉar *ta* en la ĉina tiam ankoraŭ ne diferencis inter viro kaj virino. La fokuso sur la triapersonaj pronomoj li, ŝi, kaj ĝi en la moderna ĉina originis de la tradukpraktiko en la kultura fono de la disvastiĝo de okcidenta lernado al la Oriento en la Dinastio Qing.

El la esperanta teksto por senambiguigi, la tradukinto distingas tiujn *ta*-ojn, la unua *ta* estas tradukita kiel *tiu*, kaj la dua ellasita, la tria *ŝi*. Ne nur tio, sed ankaŭ aldoniĝis pronomo *Vi*.

2.2.4 Klarigoj ĉe la idiomaĵoj

Idiomaĵoj kaj proverboj estas koncizaj kaj vivecaj, kaj havas pli fortan esprimopovon ol ordinaraj vortoj. La plej multaj el ili venas de historiaj kaj literaturaj aludoj kaj havas profundajn kulturajn konotaciojn. En *Ruĝdoma Sonĝo* troviĝas sennombraj idiomaĵoj, kvar-silabaj vortoj, la tradukinto foje simpligas ilin por ke alilandaj legantoj povu kompreni ilin, samtempe evitante klarigojn de historiaj aludoj, sed plejparte ili estas detale eksplikitaj per klarigaj piednotoj.

Jen la ekzemplo:

<p><i>Ĉine</i></p>	<p>彩霞咬着嘴唇, 向贾环头上戳了一指头, 说道: “没良心的! 狗咬吕洞宾, 不识好人心。” Cǎixiá yǎozhe zuǐchún, xiàng jiǎ huán tóu shàng chuōle yī zhī tóu, shuōdao: “Méi liángxīn de! Gǒu yǎo lǚdòngbīn, bù shí hǎo rénxīn.”</p>
<p><i>Esperante</i> (Xie Yuming)</p>	<p>Ŝi mordis la lipon kaj fingre pikis lian kapon. “Sendankulo! <u>‘Bojado al Lü Dongbin sonas – la bonkorulon hund’ ne konas!’</u> (Ĉapitro 25) * kun piednoto: Lü Dongbin: (798 – ?) Laŭlegende li, ĉar tre bonkora, fariĝis feo. Fakte li estis eruda taoisto.</p>

Ĉi tio estas duporta alegoria diraĵo transdonita ĝis hodiaŭ. *Lü Dongbin* estas unu el la ok eternuloj en la ĉina mitologio. Oni kutime uzas la diraĵon por riproĉi homojn sendankemajn ne sciantajn kio estas bona kaj kio malbona por si mem. Ĉinaj legantoj konas la aludon “La hundo mordis *Lü Dongbin*”, sed estas malfacile por la cellingvaj legantoj kompreni ĝin. Tial la tradukinto unue laŭvorte tradukas ĝin, kaj poste aldonas komentadon kaj klarigan piednoton al la figuro “*Lü Dongbin*”. Tio permesas al cellingvaj legantoj kompreni la profundan kulturan ligan inter “hundo” kaj “*Lü Dongbin*”.

2.3 Normigo

Normigo estas difinita de Baker tiel: “The tendency in translation to conform to patterns and practices that are typical of the target language, even to the point of exaggeration” ‘la tendenco konformiĝi al ŝablonoj kaj praktikoj, kiuj estas tipaj de la cellingvo, eĉ ĝis troigi ilin.’ (Baker 1996, 183). Baker rimarkis, ke normigo estas reflektita en gramatiko, tipa interpunkcio kaj kunuzataj ŝablonoj. Vanderauwera trovis ampleksajn signojn de ŝanĝoj en interpunkcio, vortelektio, stilo, frazstrukturo, kaj tekstorganizo, ĉion el kiuj ŝi konsideris kiel manifestiĝojn de ĝeneralaj tendencoj en tekstaj konvencioj, ŝajne aprobita de la celgrupo (Vanderauwera 1985, 93).

Normiga fenomeno ankaŭ troviĝas en la traduko de *Ruĝdoma Sonĝo*, ĉefe montriĝas en formulaj frazoj, nomoj de rolantoj kaj poezia strukturo.

2.3.1 Formulaj frazoj

Ruĝdoma Sonĝo estas tipo de tradicia ĉina romano kun ĉiu ĉapitro havanta ĉe la kapo versoduon, kiu donas la esencon de sia enhavo. En tiuspecaj romanoj la ekzisto de formulaj frazoj estas absolute necesa. Komenca frazo ofte uzatas en tradiciaj rakontoj aŭ romanoj kiel “La rakonto diras, ke...”; “Estas rakontate, ke...”. Je la fino de ĉiu ĉapitro, la originala aŭtoro uzos la

formulon “Se vi volas scii kio okazis, bonvolu legi la sekvan ĉapitron” por prezenti la rakonton al la sekva ĉapitro.

En *Ruĝdoma Sonĝo*, estas entute 120 ĉapitroj; preskaŭ je komenco kaj fino de ĉiu ĉapitro legiĝas supraj formuloj, sed la tradukinto ne esperantigis ilin en ĉiu ĉapitro. Mi ĉitis kelkajn por prezenti:

En la komenco de la ĉapitro:

Kiel menciite, Jaspa kaj ŝiaj kuzinoj vidis, ke Matrono Wang diskutas pri familiaj aferoj, pro kio ili iris al la apartamento de Teksa. (Ĉapitro 4)

Kiel dirite, Keqing tre miris, ke Jado kriis sonĝe ŝian infannomon; tamen ŝi sin ĝenis por fari demandon al li. (Ĉapitro 5)

Informite, ke Feniksa respondecas pri la internaj aferoj, Lai Er, ĉefekonomisto de la Domo de Ningguo, kolektis siajn subulojn. (Ĉapitro 14)

Jado, kiel ni scias, rakontis pri rataj spiritoj en la ĉambro de Jaspa. (Ĉapitro 20)

Kiel rakontite, Jaspa atribuis al Jado tion, ke Qingwen ne ovris al ŝi la pordon. (Ĉapitro 28)

Kiel rakontite, Anjo Liu kriis kun larĝa gesto, “Floroj falas, tiom tiom grandan kukurbon naskas!” (Ĉapitro 41)

Kiel supre dirite, Jia Zhen kaj Jia Lian tuj ordonis al siaj servoknaboj disŝuti monerojn sur la scenejon. La monera tintado forte plezurigis Avinon. (Ĉapitro 54)

Kiel dirite, Pacema prenis la manĝon kune kun Feniksa kaj servis al ŝi en la manlavo kaj gargarado. (Ĉapitro 56)

Kiel supre dirite, ... (Ĉapitro 58)

Kiel dirite, Jia Lian vizitis Matronon Wang por raporti al ŝi la okazaĵon. (Ĉapitro 103)

Fine de la ĉapitro:

Kio okazis poste al la dando? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 11)

Kio sekvis? Bonvole legu plu! (Ĉapitro 12)

Jen la kvin punktoj, de ŝi resumitaj. Kiel ŝi traktis ilin? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 13)

Sed kian impreson li havis en proksimo? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 14)

Ĝis la sekva ĉapitro! (Ĉapitro 15)

Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 18)

Kio sekvis? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 20)

Pri kio? Bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 21)

Por scii, kio okazis plu, bonvole legu la sekvan ĉapitron! (Ĉapitro 28, 53, 54, 56, 57, 58, 59, 60.....)

2.3.2 Normigita traduko de personaj nomoj kaj loknomoj

La ĉefaj roluloj en la *Ruĝdoma Songô* havas esperantigitajn nomojn, ekz.: Jado, Jaspas, Ora, Feniksa, Teksa, Penetra (ĉambristino de Jado), Koincida, Lotusa, Pacema, ktp. Plej multaj nomoj de homoj uzas pinjinon, ekz. Jia Yucun, la ceteraj 7 el 12 ĉarmulinoj de Jinling estas Yuanchun, Tanchun, Xiangyun, Miaoyu, Yingchun, Xichun, Qin Keqing. Por tiuj, kiuj ne havas konkretajn nomojn, la tradukinto uzas esperantaj alparolojn, ekzemple: Avino, Matrono Wang, Matrono Xing, Dua Fratino You, Tria Fratino You, Anjo Liu, Bofranjo Zhou, Onklino Xue, ktp.

En la romano, troviĝas multe da homofonoj, la tradukinto uzas piednotojn por klarigi ilin, ekz. Zhen Shiyin: Homofono de “veraj aferoj estas kaŝitaj” (*zhen* ‘vera’, *shi* ‘afero’ kaj *yin* ‘kaŝi’). Por historiaj nomoj, la tradukinto uzas pinjinon kaj aldonas piednotojn, kiel Pan An, Zijian, Xizi, Wenjun.

Cao Xueqin mencias multajn verajn loknomojn en la libro, sed plejparte Cao Xueqin uzas la nomojn de malsamaj dinastioj, eĉ kelkaj veraj el ili estas ruze anstataŭigitaj per malveraj, kiuj estas tiel preskaŭ perfektaj, ke oni prenas ilin por la veraj. Entute troviĝas preskaŭ cent loknomoj en la libro. Plejmulto de la loknomoj estas fikciaj, sed konsiderinda nombro el ili estas realaj urboj, stratoj kaj pitoreskaj lokoj. La urboj kiuj estas plej menciitaj estas Jinling, Gusu kaj Weiyang, aŭ la nunaj Nankino, Suzhou kaj Yangzhou. Xie Yuming uzas pinjinon en ĉiuj tradukoj de realaj loknomoj, kiel la prefektujo Jiangning, la prefektejo Yingtian, la gubernio Chang’an, Lin’an, Suzhou, Jinling, Weiyang (Yangzhou), la Palaco Daming, ktp. Male, ses lokoj en *Ruĝdoma Songô* estas tradukitaj tute laŭ esperantaj nomoj: la Majesta Ĝardeno, Bambua Loĝio, Delicruĝa Korto, Galanga Parko, Tollava Montvilao kaj la Verdlatisa Bonzinejo.

La ĉefurbo en *Ruĝdoma Songô* estas “Chang’an”, kaj la origino de la kvar famaj familioj estas en urbo “Jinling” (Nankino). En la esperanta versio, la tradukinto nur mencias ĝin kiel “nia ĉefurbo” (ĉapitro 6), “la urbo” (ĉapitro 79), eĉ ellasis la tradukon aliloke en ĉapitro 79.

En la romano, dufoje aperas lokonomo “大明宮” (Dà míng gōng), unu el la reĝaj palacoj dum la Tang-dinastio. En la esperanta versio estas malsamaj esprimoj kiel “la Palaco Daming” (Ĉapitro 13) kaj “la Grandluma Palaco” (ĉapitro 18).

Koncerne la budhanan vorton: 阿弥陀佛 (ē mí tuó fó) Amitabo (Amitaba Budho), en la esperanta versio la tradukinto uzas unuigitan esprimon de komenco ĝis fino: Amitabo. La angla traduko de Yang kaj Yang estas konsekvenca: en la tuta libro aperas du esprimoj: “Amida Buddha!”, “Buddha be praised!” (Cao Xueqin, trad. Yang kaj Yang 1978). Tamen Hawkes & Minford uzas malsamajn esprimojn por tiu ĉi budha vorto, krom la supremenciitaj anglaj esprimoj (Cao Xueqin, trad. Hawkes kaj Minford 1973).

2.3.3 Normigo en poezia strukturo

Estas diferencoj inter la esperanta kaj la ĉina poezio en multaj aspektoj. El fonologia vidpunkto, ĉina rimiĝo signifas, ke la vokalmezo kaj vokalfinaĵo estas samaj. En Esperanto-poezio la rimvortoj, kiuj finas versojn, estas samaj. El metrika vidpunkto, la ĉina estas tona lingvo, kaj la altiĝoj de la ritmo estas reflektitaj per “ebenaj kaj oblikvaj” tonoj, dum Esperanto-poezio uzas piedon kiel la unuon, kaj la tonoj estas reflektitaj per “senakcentaj kaj akcentaj” silaboj. Tial, tradukante ĉinan poezion en Esperanton, oni devas integri la poeziajn esprimkutimojn de la celteksto kaj la fontoteksto, kaj uzi tradukmetodon konforman al la lingvaj trajtoj kaj esprimkutimoj de Esperanto por igi la tradukon legebla kaj inverse.

<i>Ĉine</i>	满纸荒唐言，一把辛酸泪！ mǎn zhǐ huāngtáng yán, yī bǎ xīnsuān lèi! 都云作者痴，谁解其中味？ Dōu yún zuòzhě chī, shéi jiě qízhōng wèi?
<i>Interlinia traduko</i>	Plena papero de absurdaĵoj, Plenmano da maldolĉaj larmoj! Ĉiuj diras, ke la aŭtoro estas freneza, Kiu komprenas la guston en ĝi?
<i>Esperante (Xie Yuming)</i>	<i>De fantastaj kaj larmsaturitaj historioj la folioj plenas!</i> <i>Ĉiuj diras, ke l' aŭtor' manias.</i> <i>Sed kiu la guston jam komprenas? (Ĉapitro 1)</i>

Tiu ĉi kvinsilaba verskvaro en formo de la antikva *Jue*-stilo (kvin-silaba kvarono) aperas en la unua ĉapitro. Ĝi estas la sola poemo verkita de la aŭtoro en sia propra titolo. Laŭvorta signifo de la unua verso “满纸荒唐言 (mǎn zhǐ huāngtáng yán)” estas ‘La papero estas plena de sensencaĵoj’, jen la sinmoko de la aŭtoro por sia verko. La aŭtoro maltrankviliĝas, ke lia peniga verko ne estos komprenata de estontaj generacioj, kaj antaŭvidas, ke

oni ridos pro lia nescio kaj naiveco. Kvankam la lingvo de ĉi tiu poemo estas simpla kaj facile komprenebla, la animstato estas sufiĉe profunda.

- Fried, Alfred H[ermann]. 1904. "Eine neutrale Kommando- und Armeesprache für die die österr.-ungar. Armee." *Die Wage* [!]. *Eine Wiener Wochenschrift* VII, 1. Halbjahr, Januar-Juni: 72-76.
- Hamann, Brigitte. 1978. *Rudolf. Kronprinz und Rebell*. Wien/München: Amalthea. Poŝlibra eld. 1997. München/Zürich: Piper.
- Hamann, Brigitte, red. 1979. *Kronprinz Rudolf. "Majestät, ich warne Sie..." Geheime und private Schriften*. Wien/München: Amalthea.
- Hamann, Brigitte. 2005. *Kronprinz Rudolf. Ein Leben*. Wien: Amalthea Signum.
- Horn, Paul. 1905. *Die deutsche Soldatensprache*. 2-a eld. Gießen: Alfred Töpelmann. <https://archive.org/details/diedeutschesold02horngoog/page/n5/mode/2up> (27.01.2025)
- Hugo, Victor. 1845. *Le Rhin. Lettres à un ami*. Nova eld. Paris: Renouard.
- H. v. M. 1871. "Ueber die herbstlichen Truppen-Uebungen." *Neue Militär-Zeitung* [Wien] kajero 83 (14.10.1871): 665-666.
- Jaksch, Wenzel. 1958. *Europas Weg nach Potsdam. Schuld und Schicksal im Donauraum*. Stuttgart: Deutsche Verlags-Anstalt.
- Kniele, Rupert. 1887. "Vortrag des Herrn Obervorstandes und vpa.-plofed's Kniele Rupert, gehalten bei der 5. Generalversammlung des Württ. Weltsprachevereins am 1. Mai 1887 in Stuttgart." *En Öffentlicher Vortrag des Herrn Weltsprache-Obervorstandes und Plofed's Rupert Kniele, Arzt in Allmendingen, über die Ausbreitung der Weltsprache volapük: gelegentlich der 5. Generalversammlung des ersten württembergischen Weltsprachevereins in Stuttgart 1. und 2. Mai 1887: nebst 4 berichterstattenden Artikeln hierüber aus öffentlichen Blättern*, 6-17. Konstanz: Zentralbureau der Schleyer'schen Weltsprache. <http://data.onb.ac.at/dtl/6945289> (27.01.2025)
- Kniele, Rupert. 1889. *Das erste Jahrzehnt der Weltsprache Volapük. Entstehung und Entwicklung von Volapük in den einzelnen Jahren, nebst Uebersicht über den heutigen Stand der Weltsprache, Weltspracheklubs u.s.w.* Überlingen am Bodensee: A. Schoy. <http://data.onb.ac.at/dtl/2973317> (27.01.2025)
- Lins, Ulrich. 2016. "Ein unbekannter Brief von Joseph Roth aus dem Jahr 1916." Wien: Literaturhaus Wien. <https://www.literaturhaus.at/index.php?id=11559&L=412> (29.12.2024)

- Lochner, Andreas. 1912. "Die Esperantosprache und ihre militärische Bedeutung." *Danzer's Armee-Zeitung* kajero 22 (30.05.1912): 4–5; kajero 23 (06.06.1912): 2–4; kajero 25 (20.06.1912): 4–5.
- Mitis, Oskar Freiherr von. 1928. *Das Leben des Kronprinzen Rudolf*. Leipzig: Insel. Nova eld. 1971. Wien/München: Herold.
- P. A. M. 1920a. Das neue Europa mit dem dauernden Frieden. Die Unionisierung Mitteleuropas. [Mapo.] https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Das_Neue_Europa_Mit_Dem_Dauernden_Frieden._Die_Unionisierung_Mitteleuropas.jpg (22.01.2025)
- P. A. M. 1920b. *Die Unionisierung Mitteleuropas! Ein Wegweiser zum Dauerfrieden*. Wien: aŭtoro. <https://archive.org/download/17-zz-2688/17ZZ2688.pdf> (22.01.2025)
- Penížek, Josef. 1906. *Aus bewegten Zeiten. 1895–1905. Lose Blätter*. Wien: Carl Konegen. <https://archive.org/details/ausbewegtenzeite00penuoft/page/n3/mode/2up> (27.01.2025)
- Pizzini, Ricco. 1917. *Durch! März bis Dezember 1917. Ein Erleben im Weltkriege*. Graz: Leykam.
- Roda Roda, [Alexander] [pseudonimo de Sándor Friedrich Rosenfeld]. 1903. "Die ungarische Armeesprache." *Die Zukunft* [Berlin] (05.09.1903): 397–400.
- Roda Roda, [Alexander]. 1904. "Wiener Rundgänge." *Danzer's Armee-Zeitung* kajero 6 (11.02.1904): 8–9.
- Roda Roda, [Alexander]. 1917. *Russenjagd*. Wien/Leipzig: Karl Konegen (Ernst Stülpnagel).
- Rudolf [Erzherzog]. 1881. *Eine Orientreise*. Wien: Kaiserlich-Königliche Hof- und Staatsdruckerei – traduko: Rudolf. 1889. *Lefūdānatāv fa klonaleson Rudolf de Löstän-Nugän ko demag e disapenäd klonalesona*, tradukis P. Lederer. Leipzig: Mayer. <http://data.onb.ac.at/dtl/3059688> (27.01.2025)
- Scheer, Tamara. 2022. *Die Sprachenvielfalt in der österreichisch-ungarischen Armee (1867–1918)* Wien: Heeresgeschichtliches Museum. (Schriften des Heeresgeschichtlichen Museums, 31).
- Schiemann, Th. 1906. *Deutschland und die große Politik anno 1905*. Berlin: Georg Reimer. <https://www.degruyter.com/document/doi/10.1515/9783112376805/html> (27.01.2025)
- Schönemann-Behrens, Petra. 2011. *Alfred H. Fried. Friedensaktivist – Nobelpreisträger*. (Disertaĵo Universität Bremen 2004.) Zürich: Römerhof. – traduko: Petra Schönemann-Behrens. 2022. *Alfred Hermann Fried. Peace Activist and Nobel Prize Laureate*. Leiden/Boston: Brill.
- "Staatsgrundgesetz vom 21. Dez. 1867." *Reichs-Gesetz-Blatt für das Kaiserthum Oesterreich*, Jaro 1867: 394–396.
- Szeps, Julius, red. 1922. *Kronprinz Rudolf. Politische Briefe an einen Freund, 1882–1889*. Wien/München/Leipzig: Rikola.

- Thiele, Johannes. 2008. *Kronprinz Rudolf 1858-1889. Mythos und Wahrheit*. Wien: Brandstätter. Nova eld., redaktis Adam Wandruszka. Wien/München: Herold.
- Tuider, Bernhard. 2010. *Alfred Hermann Fried. 1881*. (Magistra laboraĵo Universität Wien 2007.) Saarbrücken: VDM Verlag Dr. Müller.
- Tuider, Bernhard. 2018. “Kiel vi vidas, via incito je lerni Esperanton ne estis vana.’ Alfred Hermann Fried (1864-1921) kaj lia rilato al Esperanto.” En *En la mondon venis nova lingvo. Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins*, redaktis Gotoo Hitosi, José Antonio Vergara, Kimura Goro Christoph, 220-241. Novjorko: Mondial.
- Tuider, Bernhard. 2023. “Alfred Hermann Fried: Mein Kriegs-Tagebuch.” En *Weltkriegstagebücher. Von Bachmann bis Zweig*, redaktis Gernot Wimmer, 13-40. Wien: Böhlau.

Pri la aŭtoro

D-ro Bernd Krause estas liberprofesia historiisto. Liaj laborkampoj estas interalie muzikhistorio kaj -scienco, genealogio, paleografio, interlingvistiko kaj onomastiko. Li ankaŭ laboras kiel lektoro kaj estas fakdelegito por historio, muzikhistorio kaj muziko klasika ĉe UEA.

Retpoŝto: bernd.krause@geschichtswissenschaften.com

Retejo: www.geschichtswissenschaften.com

About the author

Bernd Krause, PhD, is a freelance historian. His work focuses i. a. on music history and science, genealogy, palaeography, interlinguistics, and onomastics. He also works as a reader, furthermore he is special delegate for history, music history, and classical music for the Universal Esperanto Association UEA.

Über den Verfasser

Dr. Bernd Krause ist freiberuflicher Historiker. Arbeitsschwerpunkte sind u. a. Musikgeschichte und -wissenschaft, Genealogie, Paläographie, Interlinguistik und Onomastik. Er ist auch als Lektor tätig und ist Fachdelegierter für Geschichte, Musikgeschichte und klassische Musik beim Esperanto-Weltbund UEA.

Between army language and language of peace Observations on the use of Volapük and Esperanto in the Dual Monarchy of Austria-Hungary

Abstract: In a documentary about the heirs of the thrones William (Wilhelm) of Hohenzollern and Rudolf of Habsburg, published in 2022, it is mentioned that Rudolf was dreaming of a united Europe with Esperanto as its official language. Looking into the most important sources (Rudolf's own writings and letters) and considering biographical studies on Rudolf, this statement can be proved wrong. In fact, Rudolf is concerned with the army language of Austria-Hungary, the language of the military in which orders were given and reports were transmitted. Since this was German, many soldiers in the multi-ethnic state who had only learned their own mother tongue did not understand it. To counteract this problem, Volapük and Esperanto were considered as possible army languages. In 1920, after the dissolution of Austria-Hungary, there was even a vision of a future unified state in Central Europe in which Esperanto would be the only language used in the long term, and thus also as the army language of united armed forces.

Keywords: army language(s), Volapük and Esperanto in Austria-Hungary, united Europe

Zwischen Armeesprache und Sprache des Friedens Beobachtungen zur Verwendung von Volapük und Esperanto in der Doppelmonarchie Österreich-Ungarn

Zusammenfassung: In einer 2022 veröffentlichten Dokumentation über die Thronfolger Wilhelm von Hohenzollern (1859–1941) und Rudolf von Habsburg (1858–1889) wird erwähnt, dass Rudolf von einem vereinten Europa mit Esperanto als Amtssprache geträumt habe. Unter Berücksichtigung der wichtigsten Quellen (Rudolfs eigene Schriften und Briefe) sowie biographischer Studien kann belegt werden, dass diese Behauptung falsch ist. Rudolf thematisiert vielmehr die Armeesprache Österreich-Ungarns, die Sprache des Militärs, in der Befehle gegeben und Meldungen vermittelt wurden. Da dies Deutsch war, verstanden sie viele Soldaten im Vielvölkerstaat nicht, die nur ihre eigene Muttersprache erlernt hatten. Um dem Problem entgegenzuwirken, wurden Volapük und Esperanto als mögliche Armeesprachen ins Kalkül gezogen. 1920, nach Auflösung Österreich-Ungarns entstand sogar die Vision eines zukünftigen Einheitsstaates Mitteleuropa, in dem Esperanto auf Dauer als einzige Sprache verwendet werden sollte, also auch als Armeesprache vereinigter Streitkräfte.

Schlüsselwörter: Armeesprache(n), Volapük und Esperanto in Österreich-Ungarn, vereinigtes Europa

Kristin Tytgat
Belgio

La Internacia Asocio de Policistoj kaj Esperanto Notico

Resumo: La Internacia Asocio de Policistoj (IPA) uzas Esperanto-emblemon: “Servo per amikeco”. En tiu ĉi artikolo ni esploras kio estas IPA kaj kio estas ĝiaj celoj kaj historio. Ni komparas la multajn paralelojn en la organiza strukturo de IPA kun tiuj de Universala Esperanto-Asocio.

Ŝlosilvortoj: Internacia Asocio de Policistoj; Amikeco; Paco; Emblemo; Celoj; Organiza strukturo

1 Enkonduko

Dum iu vintra tago je la komenco de 2024 mi vojaĝis de Belgio al Rusio. Pro la milito en Ukrainio la itinero de tiu vojaĝo estas tre komplika. Mi flugis de Bruselo al Tallinn, la ĉefurbo de Estonio. Poste mi daŭrigis la vojaĝon buse al Sankt-Peterburgo. Je la limo Estonio–Rusio, en la urbo Narva, io okazis pri kio mi nun volas rakonti al vi, enkonduke al la temo de tiu ĉi artikolo.

Eble vi scias ke nuntempe estas multe da politika maltrankvilo en tiu estonia limurbo Narva ĉar ĝi troviĝas tre proksime al Rusio kaj en ĝi loĝas precipe rusparolantoj.

Nia buso el Tallinn al Peterburgo enviciĝis por la limproceduroj kaj la pasaĝeroj devis longe atendi, kio kompreneble estas tre enuiga. Cetere, nuntempe busoj ne plu povas traveturi tiun limstacion. Oni nur piede povas pasi la estonian-rusian limon. La atendotempo estas fakte ne nur enuiga, sed samtempe streĉiga, ĉar neniam estas certe ĉu civitano de NATO-lando povos eniri Rusion.

Sekve oni sidas sur la busa seĝo kun ĉiuj dokumentoj enmane kaj rigardas kiel limkontrolistoj eniras la buson kiel blankaj neĝopupoj. Kiel ili faras demandojn, kolektas kaj rigardas dokumentojn kaj nervoziĝas kiam pasaĝero havas ukrainian pasporton. Se ĉio estas en ordo, la limkontrolistoj denove eliras. La estonia polico kontrolas ĉu ĉiuj pasaĝeroj rajtos poste trapasi la rusian limon, aliel oni restos en iu neniulando sur neŭtrala ‘ponto

de amikeco'. Intertempe mi jam estis iom dormema, sonĝis pri paco kaj malfermaj limoj kaj pri la internacia lingvo de amikeco Esperanto.

Ĝuste en momento kiam mi vekiĝis, la estonia policisto pasis min en la mallarĝa busa koridoreto, ekstaris apud mia seĝo, kaj subite mi rimarkis tre belan insignon sur lia dekstra supra brako kun la vortoj "Servo per amikeco". Unue mi pensis ke mi vere ekdormis kaj havis belan sonĝon pri Esperanto ĉar ne eblas renkonti Esperanton en tiu ĉi danĝera, politike streĉita loko. Poste mi lernis lian nomon (Anto) kaj demandis kial li portas emblemon en Esperanto. Li klarigis ĉion sed diris "amikeko". Mi korektis lin kaj diris ke la prononco estas "amikeco". Ĉar la dokumentoj de ĉiuj buspasaĝeroj intertempe jam estis en ordo, li afable vokis min eliri el la buso en la neĝo por pli rakonti pri tiu insigno.

Tie mi staris en politika maltrankvila angulo de Eŭropo, parolanta pri Esperanto kun afabla estonia policisto. Mi volis foti la emblemon sed bedaŭrinde oni ne rajtas foti ĉe la limo. Mia intereso kompreneble vekiĝis pri la afero, mi iom esploris kaj hodiaŭ ŝatas rakonti al vi pli da detaloj pri tiu ĉi polica asocio kiu uzas emblemon en Esperanto.

2 Kio estas IPA?

IPA aŭ Internacia Asocio de Policistoj estas tutmonda organizo por stimuli amikecon inter la membroj de la polico kiuj aŭ ankoraŭ laboras aŭ jam pensiigis. IPA akceptas membrojn sen diferenco de funkcio, sekso, raso, lingvo aŭ religio. IPA havas proksimume 372.000 membrojn en preskaŭ 100 landoj. En 65 landoj ekzistas landaj sekcioj de IPA sur la ses kontinentoj. IPA estas ne-registara organizo kies celoj estas krei kaj plifortigi amikecajn ligojn inter la membroj de la polico, stimuli internacian kunlaboron sur socia, kultura kaj profesia kampoj, enkuraĝigi pacan kunvivadon inter la popoloj kaj konservi la mondan pacon. IPA respektas la principojn de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj havas interalie konsultajn rilatojn kun Unesko.

3 Iom da historio

La brito Arthur Troop naskiĝis en 1914 en Anglio kaj fariĝis policisto post siaj studoj. Post la Dua Mondmilito li revis pri la fondo de monda organizo por amikeco ĉe policistoj. Li preferis ke homoj inter si parolu kaj ne batalu. En tiu tempo tamen la policistoj kaj la ministerio pri internaj aferoj ne subtenis lin kaj konsideris lin strangulo.

En 1948-1949 Troop publikigis artikolon pri sia revo en la brita polica revuo sub pseŭdonimo kaj ricevis surprize pozitivan reagon. Tio instigis

lin fondi IPA-n la 1-an de januaro 1950 kun la Esperanto-slogano ‘Servo per Amikeco’. IPA kreis sekciojn en la tuta mondo kaj en septembro 1955 okazis la unua monda kongreso en Parizo. Troop estis Ĝenerala Sekretario ĝis 1966. Post la fondiĝo de IPA la opinio pri la organizo ŝanĝiĝis en pozitiva direkto kaj ĝi ricevis multajn medalojn, interalie en 1965 Troop ricevis la Britan Empirian Medalon por sia laboro. En 1969 estis fondita internacia konferenccentro en la kastelo Gimborn apud Kolonjo en Germanio kie oni instruas kaj kunsidas.

Nuntempe la kvanto da IPA-membroj ankoraŭ kreskas. En 2020 la asocio ekzistis 70 jarojn. Ekzistas landaj sekcioj en Afriko en interalie Botsvanio, Esvatinio, Kenio, Lesotio, Maŭricio, Mozambikio kaj Sudafriko. Laŭ mia scio ankoraŭ ne en Tanzanio.

4 Emblemo kaj himno

La emblemo estis desegnita de Arthur Troop mem kaj ĝi montras okpunktan stelon kun terglobo, kelkaj laŭrofolioj kaj skribbulaĵo.



Bildo 1: La emblemo de IPA laŭ Ipa-international.org

Ĝia slogano estas ‘Servo per Amikeco’ en Esperanto post kontaktoj kun la brita esperantisto Bob Hamilton. Parto de la IPA-estraro volis la sloganon en la latina lingvo ‘Servire per Amicitiam’ sed Esperanto gajnis kun 3 kontraŭ

2 voĉoj, ĉar IPA opiniis ĝin la lingvo de la estonteco. Dum la unua Monda Kongreso en 1950 en Parizo oni longe diskutis pri la emblemo sed ĝi restis finfine ĝis nun senŝanĝe kiel mi povis rimarki sur la brako de la estonia policisto.

En 1966 la organizo akceptis himnon: la teksto estis verkita en la franca de Pierre-Marie Guillemot kun muziko de Alfred Couat. Ĝi sonis unuafoje dum la kongreso en 1966 en Toronto.

5 Paraleloj kun UEA

Mi mencias mallonge kelkajn elementojn de la strukturo de IPA. Konante UEA-n kaj ĝian strukturon, vi povos mem malkovri plurajn paralelojn inter la du organizoj.

5.1 Statutoj

Artikolo 1	IPA estas politike sendependa, neŭtrala organizo, neprofitdona kaj en konsultaj rilatoj kun Unesko.
Artikolo 3	La emblemo estas ‘Servo per Amikeco’ (en Esperanto).
Artikolo 6	La oficiala lingvo estas la angla. IPA-dokumentoj povas ankaŭ esti publikigitaj en la franca, germana kaj hispana lingvoj. Novaĵleteroj ankaŭ en aliaj lingvoj.
Artikolo 7	<p>Celoj estas interalie</p> <ul style="list-style-type: none"> • krei kaj plifortigi ligojn de amikeco inter la membroj. • antaŭenigi internacian kunlaboron en socia, kultura kaj profesia kampoj. <p>Por atingi tiujn celojn, IPA subtenante toleremon, pacon, respekton por leĝo kaj ordo, komprenemon inter la popoloj, evoluigas nacie kaj internacie interalie:</p> <ul style="list-style-type: none"> • interŝanĝoprogramojn kaj vizitojn • profesiajn seminariojn • kulturajn ekspoziciojn • kontaktojn kun aŭtoritatoj • publikaĵojn kaj kampanjojn.

5.2 Strukturo de la organizo

1. Estraro kun prezidanto, kasisto, sekretario, estrarano pri internaciaj rilatoj, estrarano pri administrado kaj profesia kaj soci-kultura komisionoj.
2. Sidejo: internacia administra centro.
3. Komisionoj: internaciaj rilatoj, profesia komisiono kaj soci-kultura komisiono.

4. Landaj sekcioj.
5. Jarraporto.
6. Strategia plano 2023–2027 kun projektoj pri interalie diverseco, egaleco, instruado, virinoj, junuloj, sporto, vojaĝoj, arto kaj kulturo kaj ekologio.
7. Ĉiujara monda kongreso.
8. Pasporta servo.

6 Konkludo

IPA havas multe da similaj celoj kaj ideoj kompare kun UEA, kvankam la organizo havas alispecajn membrojn kaj aktivecojn. Sed la esenco estas klara: ni vivas sur la tero kun aliaj homoj kaj ni faru tion kiel eble plej amikece. Tio estas sendube la komuna celo de ambaŭ organizoj.

IPA estas fortega, grandega organizo de kiu UEA eble ankoraŭ povas lerni ion rilate al organizado kaj agado. Aliflanke UEA havas ankaŭ siajn fortajn flankojn kiel ekzemple la ekziston, kreskon kaj prosperon de esperantistoj en malpli evidentaj landoj sur la tero.

Kaj kompreneble UEA havas unu lingvon, kio stimulas bonan interkompreniĝon inter la membroj kaj evitas malegalecon surbaze de la lingvo.

En mia hejmurbo Antverpeno (Belgio) apud la Esperanto-centro troviĝas la sidejo de la belga sekcio de IPA. Ĉu eble indas foje kontakti la belgan prezidanton de IPA?

Bibliografio

Service through Friendship. 2025. <https://www.ipa-international.org> (13.04.2025)

Pri la aŭtoro

Kristin Tytgat estas Esperanto-aktivulino el Belgio. Ŝi studis lingvojn kaj ilian kulturon. Dum la profesia vivo ŝi instruis al tradukistoj kaj interpretistoj en la Libera Universitato de Bruselo. En Esperanto-aranĝoj ŝi ofte prelegas pri interkultura komunikado.

Retadreso: kristin.tytgat@skynet.be

About the author

Kristin Tytgat is active in the Belgian Esperanto movement. She studied languages and their culture. During her professional life she taught translators and interpreters at the Free University of Brussels. She often lectures

on intercultural communication at Esperanto events.

Über die Verfasserin

Kristin Tytgat ist in der belgischen Esperanto-Bewegung aktiv. Sie studierte Sprachen und deren Kultur. Während ihrer beruflichen Laufbahn unterrichtete sie Übersetzer und Dolmetscher in der Freien Universität Brüssel. Sie hält häufig Vorträge zu interkulturellen Themen bei Esperanto-Veranstaltungen.

The International Police Association and Esperanto

Abstract: The International Police Association (IPA) uses a motto in Esperanto: “Servo per amikeco” (Service through friendship). In this article we explore what IPA stands for and what the goals and the history of IPA are. We compare the many parallels in the organisational structure between IPA and the Universal Esperanto Association.

Keywords: International Police Association; Friendship; Peace; Emblem; Objectives; Organisational Structure

Die International Police Association und Esperanto

Die International Police Association (IPA) verwendet eine Devise auf Esperanto: “Servo per amikeco” (Dienst durch Freundschaft). In diesem Artikel untersuchen wir, wofür die IPA steht und welche Ziele und Geschichte sie hat. Wir vergleichen die vielen Parallelen in der Organisationsstruktur zwischen der IPA und der Universala Esperanto-Asocio.

Schlüsselwörter: International Police Association (Internationale Vereinigung der Polizei); Freundschaft; Frieden; Emblem; Ziele; Organisationsstruktur

Ulrich Lins

Gesellschaft für Interlinguistik, Germanio

Recenzo de la libro

Rapley, Ian. 2024. *Green star Japan: Esperanto and the international language question.*

Honolulu: Hawai'i University Press.

Pri “Esperanto en Japanio” temas tiu ĉi libro de la brita japanologo Ian Rapley. Enkonduke li konstatas, ke la temo ĝis nun ricevis nur marĝenan trakton en la historiografio pri Japanio. Por montri, ke tiu neglekto estis erara, li unue levas la demandon, kiel la lando rilatis al la ekstera mondo, kiam meze de la 19a jarcento ĝi forlasis sian longan izolitecon. Observante la alvenon de eksterlandaj ŝipoj en siaj havenoj, Japanio devis rapide esplori, kio konsistigas la potencon de la fremduloj kaj kiel ĝi armu sin kontraŭ deekstera minaco. Por lerni tion ĝi komence dependis de la nederlanda lingvo, kiu estis la ĉefa perilo de scio antaŭ la malfermiĝo. Baldaŭ la japanoj komprenis, ke por la grandega ekonomia kaj politika tasko konstrui modernan ŝtaton ili devas ankaŭ lingve adaptiĝi. Estis interligiĝo de du taskoj: reformoj en la japana lingvo kaj energiaj paŝoj por aranĝi la manieron de komuniĝo kun la mondo ekster la propraj landlimoj. La defio de modernigo portempe naskis radikalajn ideojn kiel tiun, ke Japanio devos forskui sian lingvon kaj komplikan skribon kaj plene transiri al la angla lingvo.

Scivolo kaj eksperimentemo estis la ĉefaj karakterizaĵoj de la epokaj ŝanĝoj, kiujn Japanio travivis fine de la 19a, komence de la 20a jarcento. Dum kelkaj monatoj en 1887/88 kelkaj fervoruloj levis la demandon, ĉu ne enkonduki tute novan lingvon. Estis ioma propagando por Volapük, kies adeptoj entuziasme skribis pri estonta mondo, kiu ne plu konas lingvajn problemojn. En 1889 aperis ampleksa vortaro: *Vödasbuk volapükik-japänik*. Sed ne estiĝis movado, kaj malpli ol dudek jarojn poste la atento de multaj japanoj, ofte kun tre malsama persona fono, koncentriĝis al Esperanto rapide disvastiĝanta ekde la nova jarcento. Surprize, en 1906 la japana Esperanto ne plu estis nur ricevanto, sed komencis jam doni: anarkiistoj helpis al areto da ĉinoj kaj eŭropanoj krei per Esperanto reton de samideanoj-revoluciuloj.

En 1919 estis fondita Japana Esperanto-Instituto (JEI), fakte tutlanda asocio. Helpis ĝian disfloradon, ke en la jaroj post la Unua Mondmilito en Japanio simile kiel en aliaj landoj estiĝis novaj esperoj pri paco kaj harmonio en la mondo. La “interna ideo” de Esperanto, kiu dekomence estis populara inter japanaj esperantistoj, akiris novan aktualecon, kiam prezentigis la okazo varbi por Esperanto en la diskutoj en Ligo de Nacioj. Krom Nitobe Inazō, la ĝenerala subsekretario de la Ligo, japanoj rimarkinde rolis en tiuj diskutoj, kelkaj el ili eĉ surloke en Ĝenevo, inter ili la poste famiĝonta folkloristo Yanagita Kunio, kiu multe admiris la verkon *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat kaj rekomendis uzi ĝin kiel kontribuon al la stila plibonigo de la japana lingvo.

Japanaj diplomatoj fine ne povis malhelpi la venkon de la kontraŭ-esperanta pozicio de Francio, sed ili demonstris la ŝancojn de internaciismo, precipe tiun, kiun apogis malgrandaj, nepotencaj nacioj. La pledo por Esperanto ligiĝis kun la ideo de egalrajteco de lingvoj kaj popoloj, eksplicite kun kontraŭstaro al koloniismo kaj rasismo. Prave la aŭtoro emfazas, ke la japanaj agantoj en la Ligo ludis ŝlosilan rolon en unu el la plej atentindaj momentoj en la historio de Esperanto. Paralele en Japanio mem la movado kreskis ankaŭ ekster la grandurboj. Al la evoluigo de loka kulturo estis donita internacia perspektivo, en kiu Esperanto servis kiel ilo kaj krome helpis kontraŭbatali antaŭjuĝojn pri postrestinteco de la enlandaj nordaj regionoj.

Ĉirkaŭ la sama tempo atenton altiris la karisma figuro de la ukraina-rusa poeto Vasil Eroŝenko, kiu impresis pro la spitado al la malavantaĝo de blindeco kaj, ne malpli, pro kortuŝaj literaturaĵoj, en kiuj ankaŭ ne-esperantistoj ekvidis la ĝermojn de nova mondo. Eroŝenko sukcesis demonstri la emocian potencialon de Esperanto. Kvankam tute ne ribelema, li estis false akuzita pro subfosado kaj en 1921 forpelita el Japanio. Adiaŭante lin homoj ploris. Poste, japanoj rimarkis kun admiro, ke Eroŝenko en Ĉinio amikis kun Lu Xun kaj aliaj influaj intelektuloj.

Eĉ se longe apenaŭ eblis praktiki Esperanton ekzemple per vojaĝado, la movado kontentige progresis en la 20aj kaj 30aj jaroj. Ĝi restis politike neŭtrala, sed profitis la altirprovon, kiun havis la socialismo kaj la kresko de esperantista aktivado en Soveta Unio. Sekvo estis, ke japanoj ekhavis pli ideologian komprenon de la laboro por Esperanto, tamen neeviteble ankaŭ, ke estiĝis inter komunistoj la tendenco forlasi idean flekseblon kaj dogme hardiĝi. Politikaj persekutoj kontraŭ maldekstraj esperantistoj sekvigis nombron da personaj tragedioj.

Dum la konflikto kun Ĉinio pliakriĝis, la japanaj esperantistoj alfrontis senprecedencan defion. Ili opiniis, ke, ĉar la ĉinoj estas pli kapablaj en lernado de lingvoj kaj plurlingve tre efike propagandas en eksterlando por

sia starpunkto, al la japanoj nur restas la klopodo uzi Esperanton por sciigi al la mondo la pozicion de Japanio. Sed la imperio jam troviĝis en senelirejo; la kunpuŝiĝo kun Usono evoluis al mondmilito. Estis terura tempo por la japanaj esperantistoj, nun devigitaj akordigi sian internaciismon kun la imperiisma retoriko de la regantoj. Tiurilate Rapley konkludas, ke diference de Germanio kaj aliaj landoj la Esperanto-movado en Japanio ne faris troajn cedojn al la reĝimo kaj tiel evitis kompromitiĝon. Li emfazas, ke tra sia historio la japana Esperanto-movado, laborante por tio, ke la japanoj akiru internacian engaĝiĝon, konservis mirindan kontinuecon. Kvankam heterogena, la movado sukcesis esti tre solidara. Io simila kiel la ŝanco ĉe Ligo de Nacioj ne revenis al ĝi (nek al la monda movado), sed post la milito, ekde la sesdekaj jaroj, japanaj esperantistoj malkovris, kiom utila kaj plezuriga estas la utiligo de Esperanto dum vojaĝado. Iĝis pli grave, ankaŭ por ili, apogi sin sur la esperantista komunumo ol sur esperoj pri “venko”.

La studo de Ian Rapley estas interesege. Similan pri la movad-historio de alia lando mi ne konas.

Pri la recenzanto

Ulrich Lins estas germana historiisto, kies studo pri la persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado (1988, 2016), estas tradukita en ok lingvojn.

Retadreso: u.lins@gmx.net

About the reviewer

Ulrich Lins is a German historian whose work on the persecutions of the Esperanto movement has been translated into eight languages.

Über den Rezensenten

Ulrich Lins ist Verfasser des Buches *Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin* (1988).

Dan Savatovsky

(Professeur émérite à l')

Université Sorbonne Nouvelle, Paris

Compte-rendu du livre

Mira Sarikaya. 2023. *Die bestmögliche aller Sprachen. Eine exemplarische Betrachtung künstlicher Sprachen und ihre Einbettung als Folgeprojekte des Leibniz'schen Traums einer Lingua Universalis.*

Dissertation Universität Hamburg.

<https://ediss.sub.uni-hamburg.de/bitstream/ediss/10880/1/Sarikaya-Die%20beste%20aller%20mo%CC%88glichen%20Sprachen.pdf>

Le titre de cette thèse¹ évoque au premier chef, bien entendu, le *topos* leibnizien du « meilleur des mondes possibles » et c'est, en effet, à l'examen des projets leibniziens de langue universelle (désormais : LU) que l'auteure consacre la première partie de son ouvrage. Tout en s'étendant aussi en-deçà (Llull, Dalgarno, Wilkins...) et au-delà de Leibniz (Sudre, Zamenhof...), son investigation demeure cependant tout entière placée sous l'égide de Leibniz, puisque c'est à l'aune des « critères » identifiables chez ce dernier que sont examinés divers projets de LU (le solresol de Sudre principalement) ou de langue internationale auxiliaire (désormais : LIA) – l'espéranto principalement. Des projets qui appartiennent, on le voit, aussi bien aux systèmes *a priori* qu'aux systèmes *a posteriori* – pour reprendre la distinction, désormais classique, introduite par Couturat et Leau dans leur *Histoire de la langue universelle* (1903), une distinction dont l'auteure relativise cependant la pertinence et dont elle souligne de manière convaincante l'inaptitude à permettre de catégoriser telle ou telle langue particulière (p. 78-80), voire à identifier les pasigraphies dans leur ensemble comme des langues *a priori*. Elle étudie donc à la fois des langages formels (idéographies lo-

1 *La meilleure des langues possibles*. Deux chapitres de la thèse ont été publiés antérieurement (Sarikaya 2020).

gico-mathématiques, langages de programmation), des langages philosophiques (propres surtout à l'âge classique) et des LIA, réunies sous l'expression de « langues planifiées » (*Plansprachen*) empruntée au terminologue E. Wüster.

Dans la mesure où M. Sarikaya s'attache à montrer que « les objectifs de la LU et de la plupart des langages planifiés sont difficiles, voire impossibles à atteindre » (p. 24), il est aussi question dans son ouvrage d'autres systèmes de signes visant à l'universalité, comme les codes pictographiques : un chapitre porte ainsi sur l'Isotype (*International System of Typographic Picture Education*) élaboré par Otto Neurath, un des membres du Cercle de Vienne. Le travail se poursuit avec une réflexion consacrée à l'*ingénierie conceptuelle* (p. 163–175), conçue comme une alternative aux LU et LIA. C'est dans ce cadre que M. Sarikaya discute, à la lumière des écrits du dernier Carnap (1950), des conditions et des formes d'une *intersémantique*, « un lexique (...) qui fixe de manière normative les termes nécessaires à une communauté mondiale. »²

Le choix par l'auteure de ces objets d'étude repose sur une double hypothèse qui vise à garantir l'unité de son propos : (i) la LU de Leibniz ne contient pas seulement des éléments formels, relevant d'un *calculus ratiocinator*, mais aussi proprement linguistiques – en témoigne notamment l'analyse leibnizienne de la structure de la proposition; (ii) « les langages planifiés sont plus formels que nous ne le pensons »³. Ainsi, les deux types de systèmes que sont les LU et les langages planifiés sont plus proches l'un de l'autre qu'il n'y paraît et on peut considérer les premières comme annonciatrices des seconds.

La genèse et le développement des différents projets de Leibniz – qu'il s'agisse de son *ars characteristica* (un « alphabet des pensées humaines ») ou de l'élaboration préalable d'instruments heuristiques intermédiaires (une grammaire rationnelle des langues vivantes ordinaires et, pour atteindre à cette grammaire, un latin rationalisé) – ainsi que ceux de ses précurseurs, ont donné lieu à une très abondante littérature et la thèse de M. Sarikaya n'apporte rien de vraiment nouveau à cet égard.⁴ L'intérêt de son approche

2 « Daher führe ich mit der *Intersemantik* die Idee einer Art partiellem und globalem [sic!] Lexikon ein, das Begriffe, die für eine Weltgemeinschaft nötig sind, normativ festlegt. » (p. 3).

3 « Plansprachen sind formaler als wir denken. » (p. 2).

4 Rappelons ici que Leibniz suppose, par provision, qu'entre la réforme grammaticale des langues vivantes et l'institution définitive de la LU (de type caractéristique), s'intercale le recours à une langue intermédiaire (« auxiliaire », commente Couturat) déjà en usage – utilisée de fait par les savants (d'où le choix du latin) – et dont la fonction serait surtout instrumentale : elle opérerait sur les langues sources de la grammaire rationnelle, dont elle serait la synthèse en acte, régulant leurs formes et permettant de les classer.

tient plutôt, d'une part, à la critique rétrospective des projets leibniziens, menée du point de vue de la logique contemporaine (de Gödel, en particulier, s'agissant de la visée d'exhaustivité ou, plus généralement, du calcul des prédicats du premier ordre, p. 99–104), d'autre part, à l'examen à la lumière des critères leibniziens des langages artificiels ultérieurement parus. Ces critères, étroitement liés entre eux, sont le degré d'universalité (nombre des locuteurs aussi bien que domaines d'application visés), la facilité d'apprentissage, la clarté et l'univocité des signes langagiers, la régularité grammaticale, l'exhaustivité expressive, la consistance logique. Ainsi, le solresol de Sudre souscrirait aux critères d'universalité, de facilité d'apprentissage, de faible nombre d'éléments de base, de catégorisation des concepts, d'utilisation de signes abstraits. Mais, en tant que langue partiellement *a priori*, il présente l'inconvénient de ne pouvoir s'adapter aux évolutions de nos connaissances sans qu'une grande partie de son lexique doive être modifiée. L'espéranto satisferait aux critères d'universalité (du moins en partie) et d'exhaustivité expressive, moins à celui de facilité d'apprentissage ou de consistance logique, mais, en tant qu'il suppose la libre formation des mots, nullement à celui de l'univocité du lexique requis par Leibniz (p. 151–157).

M. Sarikaya examine aussi à cette aune les raisons de l'échec de certaines langues à être adoptées ou diffusées de manière durable. Ainsi, s'agissant du volapük, le choix du lexique serait contre-intuitif, différerait trop de celui des langues qui en constituent le substrat et contreviendrait ainsi au critère de facilité. Plus généralement parlant, l'auteure montre que le critère de facilité recèle une difficulté, voire une contradiction constitutive. En effet, la nouvelle invention linguistique devrait, dans le meilleur des cas, mettre à contribution toutes les langues en usage comme langues sources ou, tout au moins, celles qui sont les plus répandues, afin de mobiliser le plus grand nombre possible « d'intuitions linguistiques »⁵ différentes, elles-mêmes relatives aux langues maternelles. Mais en même temps, elle doit contenir le moins possible d'éléments issus de langues inconnues pour les locuteurs individuels afin d'être plus facile à apprendre. Par ailleurs, comme M. Sarikaya croit pouvoir le vérifier à propos de l'espéranto – la seule LIA à avoir été adoptée par une communauté de locuteurs encore vivante – une LIA, une fois diffusée, est susceptible d'éclater en une pluralité de variétés dialectales:⁶ autant de variétés que de groupes professionnels, nationaux ou

5 « ... möglichst viele sprachliche Intuitionen » (p. 66).

6 « ... entstehen bei einer freien Wortbildung schnell mehrere Bezeichnungen für denselben Begriff. Auf diese Weise enthält die Sprache dann nicht nur Doppeldeutigkeiten, sondern – und dies passiert dann spätestens bei weiter Verbreitung der Sprache – es bilden sich ganze Dialekte heraus, da verschiedene Untergruppen der Sprachgemeinschaft verschiedene Wortbildungen vornehmen. » (p. 69). « Lors de la formation libre d'un mot, plusieurs désignations apparaissent rapidement pour le même concept. De cette manière,

« ethniques » différents auxquels appartiennent les locuteurs qui l'auront choisie comme langue auxiliaire. Ce qui contreviendrait à la visée d'universalité.

Le choix de ne décrire de façon détaillée que le solresol de Sudre, l'espéranto de Zamenhof et l'isotype de Neurath est dans l'ensemble justifié : comme l'auteure le remarque (p. 158), il s'agit en effet de langues représentatives de trois types assez clairement différenciés. Dans la mesure où il s'agit d'évaluer chacune d'elles d'après les réquisits leibniziens, on peut cependant regretter que certains autres projets, fussent-ils proches d'une de ces trois-là, ne soient pas examinés, alors même que leurs auteurs revendiquent pour leur propre compte une proximité accrue avec les visées de Leibniz. C'est le cas de l'ido que Couturat, son promoteur, présente comme un simple perfectionnement de l'espéranto, alors que sous deux aspects au moins cette langue, qui procède d'une critique de l'espéranto, apparaît plus conforme aux critères leibniziens. En ido, dérivation et composition sont régularisées selon deux principes. Un principe d'univocité d'après lequel toute notion doit pouvoir se réaliser en une forme et une seule ; un principe de réversibilité des dérivations : parce qu'il y a correspondance univoque et réciproque entre le sens et la forme des mots, l'on doit pouvoir retrouver l'ensemble des mots d'une même famille en supprimant les affixes des mots dérivés (voir Couturat 1907). L'articulation de ces deux principes, absents – selon Couturat – lors de la conception de l'espéranto, suppose que la racine d'un mot n'ait par elle-même aucun caractère grammatical déterminé.

S'agissant de la bibliographie mobilisée par M. Sarikaya, on peut également regretter que tous les travaux cités ne soient pas référencés et que la bibliographie seconde ne contienne presque exclusivement que des titres en langue anglaise ou en langue allemande. Par ailleurs, la plupart des références essentielles figurant dans l'ouvrage le sont rarement de première main, mais via divers auteurs, tel que J. Matt pour ce qui est des langages philosophiques de l'âge classique, V. Peckhaus pour ce qui est de l'influence de Leibniz sur les logiciens de la fin du 19^e siècle (Peano, Schröder, Frege) ou D. Blanke pour ce qui est des langages planifiés.

la langue ne contient pas seulement des ambiguïtés mais – et cela se produit plus tard lorsque la langue se répand – des dialectes entiers se forment, car différents sous-groupes de la communauté linguistique forment des mots différents. » [notre traduction].

Bibliographie

- Carnap, Rudolf. 1950. *Logical foundations of probability*. Chicago: University of Chicago Press.
- Couturat, Louis. 1907. *Étude sur la dérivation en Esperanto*. Coulommiers : P. Brodard.
- Couturat, Louis et Léopold Leau. 1903. *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette. <http://data.onb.ac.at/dtl/2912337>
- Sarikaya, Mira. 2020. « Die stille Sprache. Leibniz Traum in Neuraths Isotype und anderer Symbolik ». Dans *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2020*, redigé par Cyril Robert Brosch et Sabine Fiedler, 125–136. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag.
<http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2020/JGI2020.pdf>

Sur l’auteur

Dan Savatovsky est membre du laboratoire « Histoire des théories linguistiques » (Paris, CNRS). Ses recherches portent sur l’histoire et l’épistémologie de la linguistique ou de la philosophie du langage, en particulier aux XIXe et XXe siècles, et sur l’histoire de l’enseignement des langues.

Courrier électronique: dan.savatovsky@sorbonne-nouvelle.fr

Pri la recenzanto

Dan Savatovsky estas membro de la esplorgrupo Historio de lingvosciencaj teorioj (HTL, Parizo, CNRS). Lia esplorado koncernas la historion kaj epistemologion de lingvistiko aŭ filozofio de lingvo, kun fokuso sur la 19a kaj 20a; lia verkado ankaŭ okupiĝas pri la historio de lingvoinstruado.

About the reviewer

Dan Savatovsky is a member of the Laboratoire d’histoire des théories linguistiques (Paris, CNRS). His research concerns the history and epistemology of linguistics or philosophy of language, with a focus on the nineteenth and twentieth centuries; his work also engages with the history of language teaching.

Esperantologio estis fondita en 1949 de Paul Neergaard, kun 11-membra redakta komitato inter kiuj estis Björn Collinder, William E. Collinson, Kálmán Kalocsay, Stefano La Colla, Gaston Waringhien kaj Eugen Wüster. Ĝi aperis neregule ĝis 1961. En 1999 ĝi estis revivigita kiel *Esperantologio / Esperanto Studies* fare de Christer Kiselman, kiu aperigis ĝis 2018 entute ok kajerojn. En 2019 ĝia eldonanto fariĝis la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) fondiĝis en la jaro 1952 de Ivo Lapenna. Ĝia celo estas esplorado de ĉiuj aspektoj de lingva politiko kaj lingvoplanado je internacia nivelo kaj la studo de lingvaj baroj al internacia komunikado. Krom *Esperantologio / Esperanto Studies*, CED ankaŭ respondecas pri la revuo *Language Problems and Language Planning*, fondita en 1977 kaj eldonata de la eldonejo John Benjamins, Amsterdam. Nomo de CED, Esperantic Studies Foundation (ESF) publikigas ankaŭ la retan novaĵleteron *Informilo por Interlingvistoj* (<https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo>) kaj aperigas ĝian anglalingvan version *Information for Interlinguists*. CED, kies nuna direktoro estas Mark Fettes, organizas konferencojn kaj subtenas esplorojn pri diversaj temoj en sia interesosfero.

Esperantologio was founded in 1949 by Paul Neergaard, with an 11-member editorial board that included among others Björn Collinder, William E. Collinson, Kálmán Kalocsay, Stefano La Colla, Gaston Waringhien, and Eugen Wüster. It appeared irregularly until 1961. In 1999 it was revived as *Esperantologio / Esperanto Studies* by Christer Kiselman, who edited eight issues between then and 2018. In 2019, its publisher became the Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED).

The Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED) was founded in 1952 by Ivo Lapenna. Its mission is to explore all aspects of language policy and planning at the international level and the study of linguistic obstacles to international communication. In addition to *Esperantologio / Esperanto Studies*, CED is also responsible for the journal *Language Problems and Language Planning*, founded in 1977 and published by John Benjamins, Amsterdam. On CED's behalf, the Esperantic Studies Foundation (ESF) also publishes the online newsletter *Informilo por Interlingvistoj* and produces its English-language version *Information for Interlinguists* (<https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo>). CED, whose current director is Mark Fettes, organizes conferences and supports research on a range of topics within its fields of interest.

Esperantologio / Esperanto Studies

estas interfaka revuo kreita en 1949 kiu publikigas esplorojn pri ĉiuj fenomenoj rilataj al Esperanto kaj Interlingvistiko. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto, krom libro-recenzoj kaj pli esecaj esploraj notoj.

Esperantologio / Esperanto Studies

is an interdisciplinary journal created in 1949 that showcases research on all phenomena related to Esperanto and Interlinguistics. It publishes articles based on original studies about linguistic, historical, literary, psychological, sociological and political aspects of Esperanto, as well as book reviews and more experimental essays.

Nova Serio 6 (14)

New Series 6 (14)

Christopher Gledhill kaj Klaus Schubert: Antaŭparolo. Multifaceta Esperantologio

Mark Fettes: Renato Corsetti (1941–2025), Nekrologo

Renato Corsetti: Esperantistoj fronte al afrikaj lingvoj

Ilona Koutny: La rolo de István Szerdahelyi en interlingvistiko kaj esperantologio

Martine Mussies: Fanfiction in Esperanto – Esperanto in Fanfiction

GONG Xiaofeng: Apliko de Universalaj Trajtoj de Tradukado en la esperantigita ĉina klasika romano *Ruĝdoma Sonĝo*

Philippe Planchon: Evoluo de la afiksoj kaj de ilia memstara uzo en Esperanto

Bernd Krause: Inter arma lingvo kaj lingvo de paco. Observoj pri la uzado de Volapuko kaj Esperanto en la Duobla Monarkio de Aŭstrio-Hungario

Kristin Tytgat: La Internacia Asocio de Policistoj kaj Esperanto. Notico

Ulrich Lins: Recenzo de la libro Rapley, Ian. 2024. *Green star Japan: Esperanto and the international language question*

Dan Savatovsky: Compte-rendu du livre Sarikaya, Mira. 2023. *Die bestmögliche aller Sprachen*

ced



Mondial

interlingvistiko.net

mondialbooks.com

